avow, (admit), konfesi [tr]; (acknowledge), agnoski [tr]; **avowed**, ~inta; **disavow**, mal~i [tr]; malagnoski [tr]; (disclaim, repudiate), malakcepti [tr], malaprobi [tr], malapogi [tr]
avuncular, onkl(ec)a
await, atendi [tr]
awake, vekti [tr]; ~iĝi; (not asleep), maldorma; **awaken**, ~i; ~iĝi; **awakening**, ~iĝo; (disillusionment), seniluziiĝo
award, (grant, gen), aljuĝi [tr] (ion al iu); ~o; (prize), premii [tr] (ion al iu); premio
aware, konscia; **be aware of**, ~i [tr]; **become aware of**, ek~i [tr], ~iĝi pri; **awareness**, ~o; **make (one) aware (of something)**, ~igi (iun pri io); **take one unawares**, surprizi iun
awash, (at water level), akvonivela; (floating), flosanta; (flooded), inundita

away, for [adv], for- [pfx] (e.g.: *put it away*: meti ĝin ~ [or] ~meti ĝin; *I will be away*: mi estos ~ [or] mi ~estos); (at distance of), for, je distanco de (e.g.: *the bomb fell 100 meters away from us*: la bombo falis 100 metrojn ~ [or] je distanco de 100 metroj de ni); (out, in all directions), dis- [pfx] (e.g.: *chase away birds*: dispeli birdojn); **do away with**, (get rid of), ~igi; (kill), mortigi
awe, miro, respektego, admirego; **feel awe (about)**, ~i [int] (pri); **awesome**, **awe-inspiring**, ~iga; impona; **overawe**, ~egigi, imponegi [tr]
awful, (terrible), terura; (awesome), impona, miriga; (extremely), treege
awhile, iom, ~ da tempo
awkward, (clumsy), malgracia, mallerata; (inconvenient), maloportuna, embarasa; (difficult, delicate, re situation etc.), delikata
awl, aleno
awn, aristo
awning, (of translucent material), markizo; (canvas etc.), tol~o (etc.)
AWOL, (abb of "absent without leave"), dizert/inta, for sen permeso [no abb in Esperanto]; **go AWOL**, ~i [int], foriri sen permeso
awry, (askew), oblikva, malrekta; (amiss), misa; **go awry**, misiri [int], misiĝi, iri mise [cp "amiss"]
ax(e), (gen), hakilo; (w broad blade, short handle), toporo; **battle-ax**, milit~o [cp "halberd"]; **broadax**, toporo; **pickax**, pioĉo; **poleax**, stango~o; **ax to grind**, privata intereso
axial, aksa; **biaxial**, du~a; **coaxial**, sam~a [not "koaksa"]
axil, akselo
axilla, (gen), akselo
axiom, aksiomo; **axiomatic**, ~a
axis, (line, center of rotation, etc., gen), akso; (anat: vertebra), aksoido†; **semimajor axis**, (geom, ast), duonmaĵora ~o; **semiminor axis**, duonminora ~o
axle, akso
axolotl, aksolotlo
axon, aksono
axseed, koronilo

ayapana, ajapano
aye, (yes), jes; (always), ĉiam
Aythya, merganaso; **Aythya fuligula**, fuligulo
azalea, Azalea, azaleo
azarole, azarolo
Azerbaijan, Azerbajĝano; **Azerbaijani**, ~a; ~ano
azimuth, azimuto
azo-, (chem pfx), azo-
azoic, azoiko; ~a
Azores, Acoroj
Azov, Azovo; **Sea of Azov**, Maro ~a
azoxy-, (chem pfx), azoksi-
Aztec, Azteko; ~a
Azukia angularis, azukio
azulejo, azuleño
azure, lazuro; ~a [not "aĵura"]
azurite, lazurito
azygous, malpara

B

baa, (sheep noise), be!, be-e-e!; (goat), mek-mek-mek!; bei [int]; meki [int]

Baal, Baalo

baaskaap, blankulregado

baba au rhum, babao

babble, (talk), babili [int]; ~(ad)o; (onom), tra-ra-ra; (re stream), murmuri [int]; murmur(ad)o

babe, bebo

Babel, Babelo

babirusa, Babirusa, (zool), babiruso

baboon, paviano; **sacred baboon**, **hammadryas baboon**, hamadriado

babouche, babuŝo

baby, bebo; **babysit**, varti [tr], ~varti [int], infanvarti [int]; **babysitter**, infanvartanto; infanvartisto; **bush baby**, (zool), galago

Babylon, Babilono; **Babylonia**, ~io;

Babylonian, ~ia; ~iano

baccalaureate, bakalaŭro; ~a

baccara(t), bakarato

bacchanal, bakŝia; (person), ~an(in)o; (party etc.), ~ofesto

bacchanalia, bakŝianalio

bacchant, bakŝianto; **bacchante**, ~ino

Bacchus, Bakŝo

bachelor, (unmarried man), fraŭlo; (university degree), bakalaŭro; (graduate), bakalaŭrulo, diplomito (kun bakalaŭro); **bachelor woman**, ~ino

Bacillaria diatomea, diatomeo

bacillus, (gen), bacilo; **comma bacillus**, komoforma ~o; **Koch's bacillus**, ~o de Koch

Bacillus, bacilo; *Bacillus coli communis*, kojlo~o, kolibacilo; *Bacillus malleus*, maleo

back, (anat: rear side of person or animal; corresponding part of garment etc.), dorso; ~a; ~e(n); (rear of building or any object; opp front), malantaŭo; malantaŭa; malantaŭe(n); (spine), spino; spina (e.g.: *break one's back*: rompi la spinon; *back problem*: spina problemo); (of chair etc.), apogilo; (roof of mine), tegmento; (football etc.: in rear position), ariera;

arierulo; (after verb: returning), re-[pfx], returne (e.g.: *go back home*: reiri hejmen; *send a present back*: resendi donacon; *cut the weeds back*: retranĉi la trudherbojn); (adv: at or toward former place or time), ree(n) (e.g.: *back to the salt mine*: reen al la salminejo); (rear, backward), retro-[pfx] (e.g.: *step back*: retropaŝi; *lean one's head back*: retroklini la kapon); (support), apogi [tr], subteni [tr], substari [tr]; (bet on), priveti [tr]; (provide a backing, covering), tegi [tr]; (back up, go backward), retroiri [int]; (having returned), reveninta; **be back**, (returned), reveni [int] (e.g.: *are you back already?*: ĉu vi jam revenis?); **backing**, (support), apogo, subteno; (covering layer), tegaĵo; **backache**, ~doloro; **back and forth**, tien kaj reen; **backbencher**, (Br), senpostena parlamentano; **backbend**, retrofleksio; **backbite**, (slander), kalumnii [tr]; kalumnio; **backboard**, ~tabulo; **backbone**, (lit or fig), spino; **backdate**, antaŭdatigi; **back down**, **back off**, (withdraw), retiri sin, retiriĝi; **backdoor**, (secret, underhanded), postkulisasa; **backdrop**, (theat), fonkuliso; (background, gen), fono; **backfield**, (football etc.), ariero; **backfire**, (re motor), knali [int]; knalo; (re gun, plan, etc.), retropafi [int]; retropafo; **backlash**, (gen), retrofrapi [int]; retrofrapo; **backlog**, (accumulation of work etc.), retroakumuli [tr]; retroakumuliĝi; retroakumulaĵo, retrolaboro, farotaĵoj; (reserve), rezervi [tr]; rezervaĵo; **back out (of)**, (withdraw), ekŝigi sin, ekŝiĝi, retiri sin, retiriĝi; (not fulfill promise etc.), ne plenumi [tr]; **backside**, (gen), postaĵo; **backslide**, (morally etc.), refali [int]; **backspace**, (cmpr, typewriter, etc.), retroigi; retroiri [int]; (cmpr: delete ~wards), retroviŝi [tr]; **backspin**, retrorotacii [int]; retrorotaciigi; retrorotacio; **backstage**, postkulisasa;

backstitch, retrostebi [tr]; retrostebo;
backstop, postekrano; **backstroke**,
 (swimming), ~naĝado; **back-to-back**,
 (Am: consecutive), sinsekva(j); sinsekve;
backtrack, retroiĝi, retiri sin, retiriĝi;
back up, (go backward), retroiri [int];
 (support), apogi [tr], subteni [tr];
 (accumulate due to stoppage, as traffic etc.), (ŝtop)akumuli [tr];
 (ŝtop)akumuligi; [cp "backup"]; **backup**,
 (reserve, alternate), rezerva; rezervo;
 rezervulo; (piling up, as traffic etc.),
 (retro)akumuligo, ŝtop-akumuligo;
backward(s), (to rear), retroa, retroira;
 retro(ir)en, malantaŭen, retro- [pfx]
 (e.g.: *a backward step*: retro(ir)a paŝo,
 retro(paŝo)); (reverse), inversa; (behind the times),
 neprogresinta; neprogresema; eksmoda;
 (turned around; wrong), retroturnita
 (e.g.: *backward thinking*: retroturnita pensado);
backwardation, (\$), diporto; **backwash**,
 retrofrapo; **back water**, (row backward),
 retroremi [tr]; (w boat propeller), retro-
 ropeli [tr]; **backwater**, (behind dam etc.),
 retroakvo; eddy in stream etc.), akvokirleto;
 (stagnant place, re culture, stream, etc.),
 stagnejo; **backwoods**, malproksimejo;
 arbar(ec)a; **bareback**, sensela; sensele;
behind one's back, malantaŭ ies ~o; **be (flat)**
on one's back, kuŝi (senhelpe) sur la ~o;
fullback, (football etc.), plenarierulo;
halfback, halfo; **hatchback**, [see under "hatch"];
quarterback, kvaronarierulo; **get one's back up**,
 kolerigi iun; koleriĝi; **go back on**, perfidi [tr];
in back, malantaŭe; (in) **back of**,
 malantaŭ; **turn one's back on**, forturni sin de

backgammon, triktrako
backsheesh, bakŝiŝo
bacon, lardo; **chipped bacon**, grivoj
 [note plur]; **bacon-rind**, ~haŭto; **bring home the bacon**,
 gajni vivrimedon

bacterium, bakterio; **bacteria**, ~oj;
bacterial, ~a; **bactericide**, ~cido;
bacteriology, ~ologio; **bacteriologist**,
 ~ologo; **antibacterial**, kontraŭ~a

Bacterium, bakterio
Bactria, (ancient Balkh), Baktro; (Persian satrapy), ~io
bad, (not good, gen), malbona; ~e; ~o; ~aĵo;
 (poet), mava; (rotten), putra; (not valid),
 falsa (e.g.: *bad check*: falsa ĉeko); (severe),
 severa; (serious), grava; (naughty), ~kon-
 duta, miskonduta; (not tasty), ~gusta; **be bad**,
 (behavior), ~kondukti [int], miskonduti [int],
 konduti [int] ~e; **go from bad to worse**,
 de ~o pli~iĝi

Baden, (district), Baden/io, ~lando;
Baden-Baden, (city), ~o
badge, insigno
badger, (zool), melo; (hassle, gen), molesti
 [tr]; (put-down), ĉikani [tr]; (hassle w requests),
 tropetadi [tr]

badian, ilicia frukto
badinage, ŝercbabilado
badminton, volanludo
Baelt, (strait), Belto
Baffin, Bafina; **Baffin Bay**, Golfo ~a;
Baffin Island, Insulo ~a
affle, (confuse), konfuzi [tr]; (hinder),
 malhelpi [tr]; (deflector), obstaklo
bag, (sack etc.), sako; en~igi; (luggage),
 valizo; (catch), kapti [tr]; kaptajfo; (frumpy woman),
 plumpulino; **baggy**, (re clothing etc.),
 vasta, loza; **airbag**, (as in car), aer~o;
handbag, (purse), retikulo, monujo; (small valise),
 valizeto; **mailbag**, poŝt~o; **punching bag**,
 boksupilklo; **ratbag**, (Aus), strangulo,
 frenezeta entuziasmulo; **saddlebag**, sel~o;
shopping bag, (Am), **carrier bag**, (Br),
 aĉet~o; **sleeping bag**, dorm~o, lit~o;
be in the bag, esti certaĵo; **leave (be left) holding the bag**,
 las(iĝ)i kun la sekvoj

bagatelle, (trifle), bagatelo; (game), Japanbilardo
Bagdad, Bagdado
bagel, kringo
baggage, (trunks, bags, etc.), багаĝo†,
 pakaĵo [cp "package"]
Baghdad, Bagdado
bagpipe, sakŝalmo
bah, (interj), ba!
Bahai, Bahaa*; ~ano; **Bahaim**, ~ismo
Bahamas, Bahamoj; **Bahamian**, ~a; ~ano

Bahía, Bahio

Bahrain, Bahrein (Islands), Barejno

Baikal, Bajkalo

bail, (\$) , kaŭcio; ~i [tr]; (water etc.), ĉerpi [tr]; ĉerpilo; (cricket), bastoneto; **bail out**, (boat), priĉerpi [tr]; (from jail or oth difficult situation), ~e liberigi, liberigi per ~o; (from plane), paraŝuti [int]; (fig: get out), elsalti [int]

bailiff, (Am: deputy sheriff), subŝerifo; (officer of court etc.), pedelo; (overseer of estate etc.), intendanto, ekonomo; (Br: head of district), distriktestro
bailiwick, (district), distrikto; (area of activity etc.), kampo, regiono (de agado, intereso, etc.)

Bairam, Bajramo

bairn, infano

bait, (lure, gen), logi [tr]; ~ilo; (live, as for fishing), ~aĵo; (goad, harass), ĉikani [tr]; **bait a trap**, ~ilizi kaptilon

baize, felto

Baja California, Basa Kalifornio

bake, baki [tr]; ~iĝi; **baker**, ~isto; **bakery**, ~ejo; **half-baked**, (lit or fig), duonmatura, duon~ita, nov~ita

bakelite, bakelito

baksheesh, bakŝiŝo

Balaam, (Bib), Bileam

balaclava, balaklavo*

Balaena, baleno; Balaenidae, ~edoj

Balaenoptera, balenoptero; Balaenopteridae, ~edoj

balalaika, balalajko

balance, (equilibrium), ekvilibro; ~i [int]; ~igi; (scales), pesilo; (remainder), restaĵo, cetero; (\$), saldo; saldi [tr]; (stabilize), stabiligi; stabiligi; (an equation), bilanci [tr]; **balance sheet**, bilanco; **balance wheel**, balanciero; **balance brought forward**, (balance at bottom of page and reentered at top of next), transporto; **balance of payments**, ~o de pagoj; **balance of power**, ~o de potenco; **balance of trade**, ~o de komerco; **counterbalance**, kontraŭpezi [tr]; kontraŭpezo; **hang in the balance**, dependi de tio, resti dependa de tio

balantidium, balantidio; **balantidiasis**, ~ozo

Balantidium coli, balantidio

Balanus, balano, marglano

balaphone, balafono†

balata, (gum), balato; (tree), ~arbo

Balaton, Balatono

balcony, balkono

bald, kalva; **baldness**, ~eco, alopecio

baldachin, baldaquin, baldakeno

Bald(er), Balduro

balderdash, senseñaĵo, galimatio

baldric, balteo

Baldwin, Baldueno

bale, garbo; ~igi; **baler**, ~igato

Balearic (Islands), Balearoj

baleen, barto [not "baleno"]

baleful, sinistra, malbonaŭgura, misaŭgura

Bali, Balio†

balk, (hesitate, stop), heziti [int], kalcitri [int], (fig), baŭmi [int], panei [int]; (thwart), obstrukci [tr], malsukcesigi; (between furrows), intersulko; (beam), trab(ego)

Balkan, Balkana; **Balkan States**, ~io;

Balkan Mountains, ~oj

balkanize, balkanigi

Balkh, Balĥo

Balkhash, Balkaŝo

ball, (round or oval etc. object used in any game), pilko; (as part of name of specific game), ~ado (e.g.: *basketball*: korbo~ado) [note: some game names end w "balo"; see separate entries]; (any oth round or approximately round object), bulo (e.g.: *snowball*: neĝbulo; *ball of wax*: bulo de vakso); (throw of ball in game), ~oĵeto; (baseball: wide pitch), misĵeto; (globe), globo; (dance), balo; (of dust etc.), floko; (cover plant roots w dirt and burlap before planting), ĵosi [tr]; ĵos-aĵo; (colloq: testicle), kojono; **ball up**, (form balls), buligi; buliĝi; (mess up), fuŝi [tr]; **ball of string**, fadenbulo; **ball and chain**, globo kaj kateno; **ball and socket**, ball-and-socket joint, globartiko; **ball bearing**, globlagro; **ballroom**, balejo; **cannon ball**, kuglego; **behind the 8-ball**, en dilemo, en embaraso, en malfacilaĵo [see § 11]; **keep the ball rolling**, ne halti [int], resti aktiva, (fig), ne panei [int]; **be on the ball**, esti (resti) vigla

ballad, **ballade**, balado
ballast, balasto; ~i [tr]
ballerina, baletistino
ballet, baletio
ballista, balisto
ballistic, balistika; **ballistics**, ~o; **anti-ballistic**, kontraŭ~a
balloon, (gen), balono [cp "dirigible", "airship"]
ballot, (vote), baloti [int]; (paper, object, etc., used for ballot), ~ilo; (right to vote), ~rajto; **ballot-box**, ~ilujo
Ballota, baloteo
ballyhoo, bruo, pomp(aĉ)o, ekscit(aĉ)o
balm, (resin, ointment; also fig), balzamo; **balm of Gilead**, (tree), ~arbo; **(lemon) balm**, (bot: *Melissa*), meliso; **bee balm**, **fragrant balm**, monardo
balmy, (gen), balzama
baloney, (bologna), bolonjo*; (non-sense), sensencaĵo, galimatio
balsa, (tree), balzo; (wood), ~a ligno
balsam, (resin, oil, etc.), balzamo; (tree: *Commiphora*, *Balsamodendron*, or *Myroxylon*), ~arbo; (shrub: *Impatiens*), balzamio; **balsam of Peru**, peru~o; **balsam of Tolu**, tolu~o
Balsamina, balzamino
Balsamodendron, balzamarbo
balsamweed, gnafalio
Balthazar, (man's name), Baltazaro [cp "Belshazzar"]
Baltic, Balto; ~a; **Baltic Sea**, Maro ~a;
Baltic States, Ŝtatoj ~aj
Baltimore, Baltimoro
baluster, balustro
balustrade, balustrado
bamboo, bambuo; ~a
bamboozle, tromp(log)i [tr]; ~o
Bambusa, bambuso
ban, (prohibit), malpermesi [tr]; ~o; (exile, exclude), ekzili [tr], ekskludi [tr]; ekzilo, ekskludo; (rel condemnation), interdikto; (Hungarian etc. mil ruler), banuso
banal, banala; **banality**, ~aĵo; ~eco
banana, banano; **banana tree**, ~arbo
band, (any long, narrow object; strip; radio etc. frequency range), bendo; ~i [tr]; (stripe), strio; strii [tr]; (ribbon or similar object), rubando; (of cigar; mailing wrapper), banderolo; (musi-

cians or oth group), bando; (any group moving, acting together), roto, aro; (organized brigade, gang), brigado; **banded**, ~ita; striita; ringizita, ringohava; **bandstand**, (outdoor), muzik-kiosko; (indoor), muzikpodio; **band together**, ariĝi; bandiĝi; rotiĝi; (tie up), ligi [tr]; **bandwagon**, (lit), bandoĉaro; **jump on the bandwagon**, (fig; join the winners), aliĝi al la venkotajdo; **armband**, brak~o; **disband**, disigi; disigi; **hatband**, ĉapelrubando; **interference bands**, interferaj ~oj; **rubber band**, kaŭĉuka ringo, kaŭĉuka ~o; **sideband**, (radio etc.), flank~o
bandage, bandaĝo, pansbendo; ~i [tr]; (wrap, as w elastic bandage), vindi [tr]; vindo; **elastic bandage**, "Ace"
bandage, vinda
bandan(n)a, kaptuko
Bandar Seri Begawan, Bandar-Seri-Begavano*
bandeau, (ribbon), harbendo
banderilla, banderilo; **banderillero**, ~isto
banderol(e), (pennant), standardeto [not "banderolo"]
bandicoot, (Aus: any of *Paramelidae*, paramelo*; (India: *Bandicota*), bandikoto
Bandicota, bandikoto
bandit, bandito
bandoleer, **bandolier**, (to hold sword etc.), balteo, bandoliero; (for ammunition), kartoĉozono
Bandung, Bandungo
bandy, reĵetadi [tr]
bane, (cause of ruin etc.), ruinigo
baneberry, (plant), aketo; (berry), ~a bero
bang, (any loud noise), krako, knalo, bruego; ~i [int], knali [int]; ~igi, knaligi; (shut, knock, etc.), brue fermi [tr] (frapi [tr] etc.); (gunfire etc.), pafbruo; (hit hard), frapegi [tr]; (onom), bam!, krak!; **the Big Bang (Theory)**, (ast), (la Teorio de) la Granda K~o
Bangkok, Bankoko
Bangladesh, Bangladeŝo†
bangle, braceleto
Bangui, Bangvio*

banian, (tree), banjano
banish, ekzili [tr]
banister, balustrado
banjo, banĝo
bank, (\$ institution), banko; (of river etc.), (river)bordo; (any rise of ground, clouds, etc.), altaĵeto; (slope of earthfill, trench, etc.), taluso; talusi [tr, int]; (lean for curve), (turn)klini [tr]; (turn)kliniĝi; (turn)kliniĝo; (med: storage place), rezervejo (e.g.: *blood bank*: sangorezervejo); (blood, organs, etc., thus stored), rezervaĵo; (deposit in bank), deponi [tr]; (shallow area of water), malprofundejo; (billiards), resaltigi; resalti [int]; (row, tier), vico; (set fire etc. to burn low), malhejti [tr]; **banker**, (owner or manager), bankiero; **bankbook**, ~libro; **bank note**, ~bileto; **bank on**, (anticipate), anticipi [tr]; (trust), fidi [tr], dependi [int] de; **bankroll**, monprovizo; monprovizi [tr], financi [tr]; **piggy bank**, (or similar bank in oth form), ŝparmonujo; **soil bank**, noval(ar)o; **come out of its banks**, (re river etc.), superbordiĝi
bankrupt, bankrot/inta; ~ulo; ~igi; **go bankrupt**, ~i [int]; **bankruptcy**, ~o; **bankruptcy proceedings**, ~oproceso
banksia, Banksia, (Aus), banksio*
banner, (flag), standardo; (headline), tutpaĝa titolo
bannister, bafustrado
banns, geedziĝoanonco
banquet, bankedo; **banquet hall**, ~ejo
banshee, mortaŭgura feino
bantam, (bird), bantamo
banter, priŝerci [int]; ~ado
Bantu, Bantuo; ~a
banus, banuso
banyan, banjano
baobab, baobabo
baptism, bapto; **baptismal (font)**, ~ujo; **baptist(e)ry**, ~ejo; (esp outside church), baptisterio
Baptist, Baptisto; ~a
baptize, bapti [tr]
bar, (prevent), bari [tr]; ~o; (thing which prevents), ~aĵo; ~ilo; (pole, rod, etc.), stango; (soap, candy, etc.), briko, tabuleto; (tavern), drinkejo; (al-

so serving food), taverno; (counter as in tavern), verŝtabulo; (mus: measure), mezuro; (door bolt etc.), rigli [tr]; riglilo; (law, by statute of limitations), preskripti [tr]; preskripto; (rock or sand outcropping etc.), ~o; (stripe), strio; (hinder), malhelpi [tr]; malhelpo; (legal profession), advokataro; (exclude), ekskludi [tr]; ekskludo; **bar line**, (mus), taktostreko; **bartender**, drinkejmastro; **fraction bar**, **diagonal bar**, ("//"), oblikva streketo; **horizontal bars**, (gymnastics), reko; **milk bar**, laktotrinkejo; **space bar**, (on cmprtr, typewriter keyboard etc.), spacetostango

Barabbas, Barabaso

barb, pikilo; (thorn), dorno

Barbados, Barbado†

Barbara, Barbara

barbarian, barbaro; ~a; **barbaric**, **barbarous**, ~a; **barbarity**, **barbarism**, ~aĵo; ~eco; ~ismo; **barbarize**, ~igi

Barbarossa, Barbaroso

barbecue, fajrrosti [tr]; (food ~d), ~aĵo; (grill), ~ilo; (party etc.), ~ofesto; **barbecue sauce**, ~saŭco

barbel, (thread on fish), barb/fadeno; (fish: *Barbus*), ~fiŝo

barbell, halterego [cp "dumbbell"]

barber, barbiro; (cut one's hair), priton-di [tr]; **barbershop**, ~ejo

barberry, (shrub), berberiso; (berry), ~bero; **holly-leaved barberry**, mahonio

barbette, barbedo

barbican, barbakano

barbital, veronalo

barbiton, barbitono

barbiturate, barbituraĵo, barbiturato

barbituric, barbitura; **barbituric acid**, ~a acido

barcarol(le), barkarolo

Barcelona, Barcelono

bard, bardo

bare, (naked; plain, unadorned), nuda, senvesta; ~igi; (not more than), nura, apenaŭa; (reveal), malkaŝi [tr], riveli [tr]; malkaŝ(it)a, rivelita; **barely**, apenaŭ; **lay bare**, ~igi, malkaŝi, riveli

barège, bareĝo

Barents (Sea), (Maro) Barenca

- barf**, (colloq: vomit), vomi [tr]; ~aĵo
- bargain**, (agree), interkonsenti [int]; ~o; (discuss terms; haggle), marĉandi [int]; (thing bought after bargaining), marĉandaĵo; (good buy), bonaĉeto; (offer), mir-oferto
- barge**, (boat), barĝo; **barge in(to)**, en-puŝegi sin, enrud(eg)i sin
- bargee**, (Br), barĝisto
- barilla**, salsolo
- barite**, baria spato, baria sulfato [not "barito"]
- baritone**, (mus range; voice), baritono; (singer), ~ulo
- barium**, bario; **barium oxide**, (BaO), barito, ~a oksido [cp "barite"]
- bark**, (of tree or plant), ŝelo (arb~o, plant~o); (dog), boji [int]; bojo; (fig: shout words like dog ~), elboji [tr]; (boat), barko; **barker**, (circus etc.), ĉarlatano; **cassia bark**, kasio; **stringy bark**, (Aus: *Eucalyptus macrorrhyncha*), fibro~arbo
- barley**, hordeo
- barm**, biergisto
- bar mitzvah**, (rite), barmicvo*; (boy), ~ulo
- barn**, (farm storage building, gen), tenejo; (for animals), stalo; (for grain, hay, etc.), garbejo, grenejo, pajlejo (etc.); (Am: for busses, trolleys, etc.), garaĝo
- Barnaby**, **Barnabas**, Barnabo
- barncle**, balano, marglano
- barograph**, barografo
- barometer**, barometro; aneroid barometer, aneroida* ~o
- baron**, barono; **baronage**, (rank), ~eco; (all barons), ~aro; **baroness**, ~ino; **baronet**, ~eto; **baronial**, ~(ec)a; **barony**, (domain), ~ejo
- baroque**, baroko; ~a
- baroscope**, baroskopio
- barque**, barko
- barrack(s)**, (temporary), barako; ~aro; en~igi; (permanent), kazerno; enka-zernigi
- barrage**, (mil), pafbaraĵo; (fig, as of words etc.), pafadego, mitralado
- barramunda**, **barramundi**, (Aus), barramundo*
- barrel**, (container), barelo; en~igi; (unit of measure, gen), ~pleno [liquid mea-
sure: (Am: water), 119,2 litroj; (Br: water), 163,7 litroj; (oil, gen), 159,0 litroj; dry measure: (flour), 88,9 kilo-gramoj; (pork or fish), 90,74 kilo-gramoj; (see § 20)]; (of gun), (paf)tubo; (of padlock), ŝlostubo; **double-barreled**, dutuba; **rain-barrel**, (pluv)cisterno
- barren**, (not fertile), malfekunda; (w/o result), ~a, senfrukta, senrezulta; (desert), dezerta; (lifeless), senviva
- barricade**, barikado; ~i [tr]
- barrier**, (movable, across road etc.), bariero; (obstacle, obstaklo; (dike), digo; **sound barrier**, son~o
- barrio**, (section of city, gen), kvartalo; (tin shack slum), ladvilaĝo
- barrister**, advokato
- barrow**, (burial mound), tumulo; (cart), puŝĉaro
- barter**, (var)interŝanĝi [tr]; ~ado
- Bartholomew**, Bartolomeo
- Bartonellosis, verugao
- Baruch**, Baruĥo
- baryon**, barjono†
- Baryta, barito
- barytes**, [see "barite"]
- barytone**, [see "baritone"]
- basal**, baza
- basalt**, bazalto
- bascule**, baskulo
- base**, (bottom, support, basis, essence, etc.; mil; math; geom; chem), bazo; ~a; ~i [tr]; (low, menial, ignoble, etc.), maldeca, malnobla; (counterfeit), falsa; (of pedestal, statue, light bulb, electron tube, etc.), soklo [cp "basement"]; **be based on**, ~iĝi sur, esti fundamentita sur; **baseless**, sen~a; **base level**, ~nivelo; **base line**, ~linio; **touch base with**, kontakti [tr], konsulti [tr]
- baseball**, (game), basbalo; (ball), ~pilko
- Basel**, Bazelo
- basement**, (gen), subetaĝo†; (cellar), kelo; (arch base, as of monument etc.), bazamento [cp "base"]
- bash**, (hit), bategi [tr]; ~o; (party), festego
- bashful**, modesta, singena
- basic**, (fundamental), baza, fundamenta; (chem), ~a, alkala; **basics**, fundamen-

to(j), rudimentoj
basidiomycete, bazidiomiceto
 Basidiomycetes, bazidiomicetoj
basidium, bazidio
basil, (bot), bazilio; **sweet basil**, ~o;
wild basil, kalaminto
Basil, (man's name), Bazilo
basilica, baziliko
 Basiliscus, bazilisko
basilisk, (gen), bazilisko
basin, (pan, bowl, etc.), kuv/eto, pelvo;
 (for expectoration), sputujo; (pool, as
 of fountain etc.), geol; harbor, as yacht
 basin), baseno; **washbasin**, lav~o
basis, bazo, fundamento; **on the basis**
of, sur~e de
bask, ripozi [int], sin varmigi, sunĝui
 [int]
basket, korbo
basketball, (game), basketbalo†; (ball),
 ~a pilko
bas mitzvah, [see "bat mitzvah"]
bazoche, (former legal group in Paris),
 bazoĉo
Basque, Vasko; ~a; **Basque Provinces**,
 ~io
bas-relief, bareliefo
bass, (mus range; voice), baso; ~a;
 (singer), ~ulo; (bass fiddle), kontra-
 baso; (tuba), tubjo; (fish: any variety
 of *Centrarchidae*), centrarkedo*;
 (fish: any variety of *Serranus* or *Ser-
 ranidae*), seran(ed)o*; (fish: *Labrax*),
 labrako; (tree), [see "basswood"];
contrabass, **double bass**, kontrabaso
Bass (Strait), (Markolo) Bassa
 Bassia, basio
bassinet, korbiliteto
basoon, fagoto; **contrabassoon**, **dou-
 ble bassoon**, kontrafagoto
basswood, (tree), tilio; (wood), ~a ligno
bast, (phloem), basto, floemo; (fiber),
 ~ajo
bastard, (lit: born out of wedlock), bas-
 tardo; ~a; (fig: mean), ~o, kanajlo;
bastardy, ~eco
baste, (sew), duonkudri [tr]; (in cook-
 ing), priverŝi [tr]
Bastian, (man's name), Bastiano
Bastille, Bastilo; **Bastille Day**, ~tago
bastion, bastiono
bat, (baseball, cricket, etc.; any club),

klabo; (cricket batsman), batanto;
 (hit), bati [tr]; (zool), vesperto; **bat-
 man**, (Br), oficirservisto; **batsman**,
 (cricket), batanto; **batter**, [see "bat-
 ter"]; **at bat**, ~anta; **fruit bat**, ptero-
 po; **javelin bat**, filostomo;
pipistrel(le) bat, pipistrelo; **vampire
 bat**, (*Desmodus*, true blood-sucking
 bat), desmodo; (*Vampirus*, not blood-
 sucking), vampiro; **go to bat for**, (fig:
 defend), defendi [tr]; **right off the
 bat**, tuj, senprokraste; **he has bats in
 his belfry**, li havas muŝon en la cer-
 bo; muŝo zumas en lia cerbo
Batavia, (old name of Jakarta), Batavio;
 (re ancient Germanic people), Batavo;
 Batava
batch, (amount baked at one time),
 forpleno; (amount of anything used
 at one time), ŝarĝo; (amount made at
 one time; any oth lot, set, group), aro,
 opo, aropo
bateau, (river)boato
bath, (gen), bano; (Bib: unit of volume),
 bat'o; **bathe**, (gen), ~i [tr], sin ~i, ban-
 iĝi; (swim), naĝi [int]; **bathing suit**,
 (for men), ~kalsono; (woman's), ~ko-
 stumo; **bathing cap**, ~ĉapo; **bath-
 house**, ~ejo; **bathinette**, beb~ujeto;
bathmat, ~mato; **take a bath**, sin ~i,
 baniĝi; **acid bath**, acido~o; **birdbath**,
 bird~ujo; **fixing bath**, (phot), fiks~o;
(public) baths, (publika) ~ejo; **show-
 er-bath**, duŝo [see "shower"]; **sitz
 bath**, sid~o; **sun-bath**, sun~o; **steam-
 bath**, **Turkish bath**, vapor~o [cp
 "sauna"]
bathochromic, batokroma
bathometer, batometro
Bathsheba, Bat-Ŝeba
bathyscaphe, batiskafo
bathysphere, batisfero
batik, batiko
batiste, batisto
bat mitzvah, (rite), batmicvo*; (girl),
 ~ulino
baton, (any stick, rod), bastono; (of mus
 conductor), ~o, takto~o
 Batrachia, (*Salientia*), batrakoj; (*Am-
 phibia*), amfibioj
battalion, bataliono
batten, (wood strip etc.), lato; (strength-

- en or fasten w battens), ~izi [tr]; (fatten), grasigi; grasiĝi; **batten down**, fiksfermi [tr]
- batter**, (baseball, cricket), bat/anto; (pound), ~adi [tr]; (injure), ~vundi [tr]; (smash), frakasi [tr]; (cooking, for cakes, pancakes, etc.), farunmik-saĵo; **battering ram**, murrompilo
- battery**, (elec; mil), baterio; (beating), bat(ad)o; **storage battery**, akumulatoro
- battik**, batiko
- battling**, (cotton etc.), vato
- battle**, batalo; ~i [int]; ~i kontraŭ, kontraŭ~i [tr]; **battle-axe**, militakilo [cp "halberd"]; **battlefield**, ~ejo, ~kampop; **battlement**, krenelaro
- battledore**, (volan)rakedo
- battue**, batuo
- batz**, baco
- bauble**, breloko, brikabrakero
- Baucis**, Baŭcisa
- baud**, baŭdo
- Baudelaire**, Bodlero
- bulk**, [see "balk"]
- bauxite**, baŭksito
- Bavaria**, Bavario; **Bavarian**, ~a; ~o
- bawdy**, lasciva, malpruda
- bawl**, (yell), kriegi [int]; el~i [tr]; (cry), ploregi [int]
- bay**, (arm of ocean etc.), golfo; (small), ~eto, krekio; (alcove, wing of building), alkovo; (bin), kuvego; (compartment), fako; (bark, as dog), boĵi [int]; (howl, as wolf etc.), hurli [int], hoĵli [int]; (bot: laurel), laŭro; (color), ruĝbruna; (horse etc.), ruĝbrunulo; **bay leaf**, laŭrofolio; **at bay**, enangulita; **sick bay**, flegejo; **bring to bay**, enanguligi; **keep at bay**, forteni [tr]; **embayment**, (small inlet), krekio
- bayadere**, **bayadeer**, (dancer), bajadero; (fabric), ~aĵo
- bayonet**, bajoneto; ~i [tr]
- bayou**, marĉkrekio
- bazaar**, bazaro
- bazooka**, bazuko
- B.C.**, **B.C.E.**, (abb of "Before Christ" or "Before Common Era"), a.K. [abb of "antaŭ Kristo" or "antaŭ Komunerao"]
- bedelium**, (Bib jewel), bedelio
- be**, esti [int] [note: as auxiliary verb, "esti" is most often omitted (e.g.: *we are coming*: ni venas); but if needed for emphasis, add "ja" (e.g.: *we are indeed coming*: ni ja venas); in questions, add "ĉu" before phrase (e.g.: *are you coming?*: ĉu vi venas?); when followed by adj, the adj is occasionally made into verb (esp poet) in place of "esti -a" (e.g.: *the light is red*: la lumo ~as ruĝa [or] la lumo ruĝas)]; **being**, (entity), ~aĵo; ~ulo; ento; **there is (are)**, **there was (were)**, (etc.), ~as, ~is (etc.) (e.g.: *there is a book on the table*: ~as libro sur la tablo); **there is (are, etc.) no(t)**, (insufficient, lacking), mankas (~is, etc.) [int], ne ~as (~is, etc.) (e.g.: *there is not enough time to finish*: mankas sufiĉa tempo [or] ne estas sufiĉa tempo por fini; *there were no people in the room*: mankis homoj en la ĉambro); **which is to be -ed**, (must be -ed), ~enda [sfx] (e.g.: *those are the problems which are to be solved*: jen la solvendaj problemoj); (will be -ed), ~ota [sfx] (e.g.: *that package is yet to be sent*: tiu pako ~as ankoraŭ sendota); **be (distance) (away) from**, distanci [int] de (e.g.: *New York is 4500 kilometers from Los Angeles*: Nov-Jorko distancas 4500 kilometrojn de Los-Anĝeleso); **be that as it may**, ~u (tio) kiel ajn
- Bea**, (short for "Beatrice"), Beanjo
- beach**, plaĝo; (land boat etc.), alboardigi; alboardiĝi
- beacon**, (light), gvidlumino; (radio etc.), gvidsignalo; (fire), signalfajro
- bead**, (pierced), bido; (any small round object), globeto; (of tire), flangio; (on gun), celgrajno
- beadle**, pedelo
- beagle**, biglo
- beak**, beko
- beaker**, (goblet), pokalo; (chem etc.), (laboratoria) kruĉeto
- beam**, (of wood, metal, etc., for structural support), trabo (e.g.: *I-beam*: I-trabo); (support, as in mine, archway, etc.), stego; (horizontal, to keep spacing between vertical parts), ŝpalo;

(crossbeam of ship), baŭo; (arm of scales), vekto; (shine), brili [int] [cp "gleam"]; (radiate), radii [int]; elradii [tr]; (ray of light etc.), (lum)fasko, radio; (guide signal, beacon), gvidsignalo [cp "beacon"]; (show joy), ĝojbrili [int]

bean, (seed or food, gen), fabo; (plant), ~oplanto; (genus *Phaseolus*), fazeolo; **beanbag**, ~osako; **beanery**, restoraciaĉo; **beanie**, vertoĉapo; **bean trefoil**, anagi-ro; **bogbean**, **buckbean**, menianto; **butter bean**, **Lima bean**, **sieva bean**, **mung bean**, **kidney bean**, fazeolo; **carob bean**, **locust bean**, (fruit), karobo; (tree), karobarbo, karobujo; **castor bean**, ricina semo; **chestnut bean**, kikerero; **green bean**, verda fazeolo; **Indian bean**, katalpo; **mescal bean**, **coral bean**, (plant), soforo; (seed), soforsemo; **tonka bean**, **tonca bean**, **tonga bean**, **tonqua bean**, tonka* fabo; **full of beans**, viglega, plena de energio; **spill the beans**, malkaŝi la sekreton

bear, (zool, gen: *Ursus*), urso; (carry), porti [tr]; (support weight), subporti [tr]; (take upon self; withstand), elporti [tr] (e.g.: *bear the guilt*: elporti la kulpon); (resist), rezisti [tr]; (suffer through), trasuferi [tr]; (tolerate), toleri [tr], elporti [tr]; (give birth to, lit or fig), naski [tr]; (give forth), produkti [tr] [not "eldoni"]; (\$, re stock market etc.), (prez)basigā; basigisto; (require, call for), postuli [tr] (e.g.: *his actions bear watching*: liaj agoj postulas kontroladon); (face), fronti [int] (al, -en) (e.g.: *the house bears east*: la domo frontas al la oriento [or] frontas orienten); (aim at), celi [tr, int] (e.g.: *artillery bearing on the base*: artilerio celanta la bazon); (turn in given direction), turniĝi (e.g.: *bear right at the corner*: turniĝu dekstren ĉe la angulo); (relate to), rilati [int] al (e.g.: *your question doesn't bear on the subject*: via demando ne rilatas al la temo); **unbearable**, neelportebla, netolerebla, neelportebla; **bearing**, [see "bearing"]; **bear's-breech**, (bot), akanto; **bear's-ear**, (bot), aŭrikulo; **bear**

down (on), (forte) premi [tr]; **bear on**, (relate to), rilati al (e.g.: *this doesn't bear on the problem*: ĉi tio ne rilatas al la problemo); (aim at), celi [tr, int]; **bear out**, (confirm), konfirmi [tr]; **bear up (with, under, etc.)**, elteni [tr]; **bear up!**, (take heart!), kuraĝon!; **bear with**, pacienci [int] kun; **ant bear**, mirmekofago, formik~o; **black bear**, nigra ~o; **brown bear**, bruna ~o; **cat bear**, pando; **forebear**, antaŭulo, praulo; **grizzly bear**, griza ~o; **koala bear**, **kangaroo bear**, **native bear**, koalo; **offbear**, forporti [tr]; **overbearing**, aroganta; **polar bear**, polusa ~o; **Teddy bear**, (remburita) ludil~o; **woolly bear (caterpillar)**, arktia raŭpo

beard, (on man or animal), barbo; (re grains), aristo; **bearded**, ~(hav)a;

bearded man, ~ulo

bearing, (mech), lagro [cp "bushing", "hub"]; (direction), direkto, orientiĝo; (direction fix), biro; (manner, mien), mieno; (act of bearing), [see "bear"]; **ball bearing**, (the ball), ~oglobo; (the bearing), glob~o; **blade bearing**, eĝo~o; **journal bearing**, glit~o; **pivot bearing**, pied~o; **roller bearing**, rul~o, cilindra ~o; **get a bearing on**, biri [tr]; **get (lose) one's bearings**, (mal)orientiĝi

Béarn, Bearnio; **Béarnaise**, ~a

beast, (gen), besto; (esp wild), bestio; (brute), bruto; **beastial**, ~(ec)a; besti(ec)a; bruta

beat, (strike or pound, gen; flap; etc.), bati [tr, int]; (conquer), venki [tr]; (exceed, overcome), superi [tr]; (win game etc.), gajni [tr] (ludon) super (kontraŭulo); (mix by beating), ~miksi [tr]; (pulse, as between 2 slightly unequal sound frequencies), pulsi [int]; (puls(o~)o); (mus: rhythm), takto; (baffle, puzzle), konfuzi [tr]; (trick, cheat), superruzi [tr]; (escape, avoid, as criminal charge), eskapi [int] de; (route, as of police officer, reporter, etc.), kurso; (naut: progress by tacking), boardi [int]; boardo [cp "tack"]; (pre-hippie), prahipia*; prahipiulo*; (Bohemian, gen), bohemia; bohemi-

lo; **beating**, ~ado; **beat around the bush**, ĉirkaŭmarĉandi [int]; **beat to death**, mort~i [tr]; **beat one to the punch**, antaŭfrapi iun; **beat in**, en~i [tr]; **beat out**, el~i [tr]; **beat time**, (mus), ~i la takton; **beat up**, dis~i [tr], draŝi [tr]; **beat-up**, (worn, battered), kaduka, ŝlifita, dis~ita; (re clothes), ĉifona; **dead-beat**, ŝuldrifuzanto; **downbeat**, (mus), ĉeftakto, ĉefpulso; **heartbeat**, kor~(ad)o; **off-beat**, (mus), flanktakto; flankakta; (odd), stranga, kurioza, originala, nekonvencia; **upbeat**, (mus), antaŭtakto, malĉeftakto, antaŭpulso, malĉefpulso; (lively, cheerful), gaja, vigla

beatific, (blissful), beata; (making blissful), ~iga; **beatification**, ~igo; ~iĝo

beatify, beatiĝi

beatitude, beateco

beatnik, (pre-hippie), bitniko; ~a; (Bohemian, gen), Bohemiano; Bohemia

Beatrice, Beatrica

beau, amato

Beaufort, Boforto; **Beaufort scale**, ~a skalo; **Beaufort Sea**, Maro ~a

Beaufront, Bofronto

beauty, (condition), belo, ~eco; (thing), ~aĵo; (person), ~ul(in)o; (charm), ĉarmo; **beautiful**, ~a; **beautify**, ~igi; **beautician**, kosmetikist(in)o; **beauty shop**, **beauty parlor**, kosmetikejo

beaux-arts, belartoj

beaver, (zool), kastoro; **muskrat beaver**, ondatro

becalm, (calm), kvietigi; **be becalmed**, (re ship), senventiĝi

because, ĉar, tial ke; **because of**, pro (e.g.: *because of the fact that*: pro tio ke [more emphatic than "ĉar"])

béchamel, beŝamelo

bêche-de-mer, (zool: *Holothuria*; food), holoturio, markolbaso; (language), piĝino

beck, (Br), rivereto

beckon, (gesture), gestvoki [tr], geste alvoki [tr]; (lure, gen), logi [tr]

Becky, Renjo [cp "Rebecca"]

becloud, malklarigi, nubigi

become, (get to be), fariĝi, iĝi, ~iĝi

[sfx] (e.g.: *become hot*: varmiĝi, (far)iĝi varma; *become an actor*: aktoriĝi, (far)iĝi aktoro)

becoming, (proper), konvena, deca; (attractive), alloga, bela

bed, (furniture; sleeping place of animals etc.), lito; en~igi; en~iĝi; (of flowers etc.), bedo; (of lake, ocean), fundo; (of river), fluejo; (of truck etc.), ŝarĝplato; (any place for lying, resting), kuŝejo; (geol), kuŝujo; **bedding**, (blankets etc.), ~aĵo; (straw), pajlo~o; **bedframe**, **bedstead**, ~kadro; **bedridden**, ~malsana; **bedroll**, ~rulaĵo; **bedside**, ~flanko; ~flanka; **bed-sitter**, (Br), unuĉambra apartamento; **bedtime**, en~iĝa tempo; en~iĝotempo; **deathbed**, mort~o; **double bed**, duloka ~o; **hotbed**, (lit or fig), varmbedo; **kingsize bed**, grandformata ~o; **Murphy bed**, klap~o; **oyster bed**, ostrejo; **queensize bed**, plenformata ~o; **single bed**, "twin" bed, unuloka ~o; **sofa bed**, sofo~o; **straw bed**, pajlo~o; **truckle bed**, **trundle bed**, subŝovebla ~o; **go to bed**, en~iĝi; **put to bed**, en~igi; **bed and board**, (boarding house), pensiono; **bed and breakfast**, (for overnight), tranokta pensiono; **get up on the wrong side of bed**, miskomenci la tagon

bedeck, ornami [tr]

bedlam, (any chaotic place, situation), pandemonio, ĥaosejo

Bedouin, Bedueno; ~a

bedraggled, malsekaĉa, kotita

bee, (zool, gen), abelo; (contest), konkurso (e.g.: *spelling bee*: literuma konkurso); (any gathering), kunveno (e.g.: *sewing bee*: kudra kunveno); **bee-eater**, (zool), meropo; **beehive**, ~ujo; **beeswax**, ~vakso; **bumblebee**, burdo; **honey bee**, miel~o; **beekeeper**, ~bredisto; **beekeeping**, ~bredado; **beeline**, rektflinio

beech, (tree), fago; (wood), ~ligno; **copper beech**, **purple beech**, sango~o; **beechnut**, ~nukso

beef, bov/aĵo; **beefalo**, (animal), ~bizono; (meat), ~bizonajfo; **beefcake**, (re show or photo of attractive man),

(vir)figurmontr(ad)o; (vir)figurmontra [cp "cheese: cheesecake"]; **roast beef**, rostbefo, ~-rostaĵo; **corned beef**, spicita ~aĵo

Beelzebub, Baal-Zebub

beep, (honk car horn etc.), hupi [int]; ~ (ad)o; (small sound, as by digital watch alarm), pepi [int]; pep(ad)o

beer, biero; **root beer**, sasafraŝ-sodo, radik-sodo

beet, beto; **red beet**, ruĝa ~o; **sugar-beet**, suker~o

Beethoven, Betoveno

beetle, (zool, gen), skarabo, koleoptero; **black beetle**, blato; **bombardier beetle**, braĥino; **burying beetle**, nek-roforo; **calosoma beetle**, kalosomo; **carpet beetle**, larder beetle, **museum beetle**, (*Dermestes*), dermesto; **churchyard beetle**, blapto; **click beetle**, elatero; **cockchafer beetle**, melolonto, maj~o; **Colorado potato beetle**, leptinotarso; **darkling beetle**, **darkling ground beetle**, tenebrio; **death-watch beetle**, anobio; **diving beetle**, ditisko; **dung beetle**, (*Scarabaeus*), ~o; (*Geogrupes*), geotrupo, sterko~o; **furniture beetle**, anobio; **goliath beetle**, (*Cetonia*), cetonio; (*Goliathus*), goliato; **ground beetle**, karabo; **lady(bird) beetle**, kokcine-lo; **leaf beetle**, krizomelo, or~o; **long-horn(ed) beetle**, cerambiko; **oil beetle**, meloo; **sap chafer beetle**, cetonio; **stag beetle**, lukano, cerv~o; **tiger beetle**, cicindelo

befall, trafi [tr], okazi [int] al

befit, konveni [int] al, deci [int] al; **be-fitting**, ~a, deca

before, (prep, re time or place), antaŭ (e.g.: *before your arrival*: ~ via alveno; *she stood before the house*: ŝi staris ~ la domo); (conj), ~ ol (e.g.: *read it before you come*: legu ĝin ~ ol vi venos); (adv), ~e (e.g.: *I've never done that before*: mi neniam ~e faris tion); **beforehand**, ~e; **before long**, post nelonge

befuddle, (confuse), konfuzi [tr], perpleksigi, mistifiki [tr]; (stupefy, as w alcohol), stuporigi; **befuddlement**, ~o, perplekseco; stuporo

beg, (implore), pet/egi [tr]; (ask charity), almozi [int], almoz~i [int]; **beggar**, almozulo; **go begging**, resti ne~ita; **beggar('s)-sticks**, (bot), bidento

begam, begamo

beget, (re man), generi [tr], naskigi; (re woman), naski [tr]; (fig), ~i

begin, komenci [tr]; ~iĝi, (colloq), eki [int]; **begin to**, komenc(iĝ)i, ek- [pfx] (e.g.: *she began to sing*: ŝi ~is kanti [or] ŝi ekkantis; *it's beginning to rain*: ekpluvas) [cp "start"]; **beginning**, ~o; **beginner**, ~anto; **from the beginning**, de~e, de la ~o

begone, for!

begonia, Begonia, begonio

begrudge, domaĝi [tr]

beguile, (trick), trompi [tr], superruzi [tr]; (lure, attract), logi [tr]; (charm), ĉarmi [tr]

beguine, (dance), begindanco

Beguine, (rel), begino

begum, begamo

behalf, intereso; **in (on) behalf of**, por; en la nomo de, nome de

behave, (conduct self, gen), konduti [int]; (behave well, properly), bon~i [int], ~i bone; **behave oneself**, ~i bone; **misbehave**, malbon~i [int], mis~i [int]

behavior, (gen), konduto; **behaviorism**, behaviorismo; **behaviorist**, behaviorisma; behavioristo*; **misbehavior**, mis~o

behemoth, behemoto

behest, (order), ordono; (request), peto

behind, (prep: re place), malantaŭ (e.g.: *she sat behind me*: ŝi sidis ~ mi; *the sun went behind a cloud*: la suno iris ~ nubon); (remaining after), post (e.g.: *he left little behind him when he died*: li lasis malmulton post si kiam li mortis); (beyond), preter (e.g.: *behind the hill*: preter la monteto); (supporting), subtenanta (e.g.: *the group behind the proposal*: la grupo subtenanta la proponon); (adv), ~e(n); poste(n); (slow, re time), malfrue (e.g.: *the train is running behind*: la trajno kuras malfrue); (not current), malakurata (e.g.: *I am behind in my*

work: mi estas malakurata en mia laboro); (buttocks), postaĵo, (colloq), pugo; **be behind**, (support), subteni [tr]; (be late, slow), malfrui [int]; **behind the 8-ball**, en embaraso, en malfacilaĵo [see § 11]

behold, (see), rigardi [tr]; (interj), jen; **lo and behold**, jen

beholden, (danko)ŝulda

behoove, behove, endi [int] al, konveni [int] al, necesi [int] al, endi [int] al

beige, grizbruneta; ~o

Beijing, Pekino; **Beijingese**, ~a; ~ano

Beirut, Bejruto; ~a

bejewel, juvelizi [tr]

beka(h), bek'o

bel, belo; **decibel**, deci~o

Bel, Belo

belabor, (beat), bati [tr]; (scold; over-emphasize; etc.), draŝi [tr], troknedi [tr]

Belarus, Belarus/io†; **Belarussian**, ~o; ~a; ~ia

belated, malakurata, malfrua

Belau, Belao†

belay, fiksi [tr], ligi [tr]; ~(iĝ)o, lig(iĝ)o; **belaying pin**, bito

belch, rukti [int]; el~i [tr] (e.g.: *belch smoke*: el~i fumon); ~o

beleaguer, (gen), sieĝi [tr]

belemnite, belemnito

Belfast, Belfasto

belfry, (gen), sonorilejo; (for spying), belfrido

Belgium, Belg/io; **Belgian**, ~o; ~a; ~ia

Belgrade, Beogrado

Belial, Belialo

belie, malkonfirmi [tr], malpruvi [tr], dementi [tr]

belief, (gen), kredo; **disbelief**, mal~o; **belief in**, [see "believe"]

believe, kredi [tr, int] (e.g.: *I don't believe that tale*: mi ne ~as tiun rakonton; *do you believe her when she says that?*: ĉu vi ~as al ŝi [or] ~as ŝin kiam ŝi diras tion?; *I believe [that] it will rain*: mi ~as ke pluvos); (have opinion), ~i, opinii [int]; **believe in**, (believe veracity of person), ~i al; (believe existence of; have faith in), ~i je (e.g.: *believe in God, in ghosts*: ~i je Dio, je fantomoj; *believe in de-*

mocracy: ~i je la demokratio); **believable**, ~inda; **believably**, ~inde [not "~ebla", "~eble"]; see "course: of course"; **disbelieve**, mal~i [tr, int]

Belisarius, Belizaro

belittle, mallaŭdi [tr], subtaksi [tr], maltroigi

Belize, (country), Beliz/io†; **Belize City**, ~o

bell, (w clapper, gen), sonorilo; (hand-held, or of that size), ~eto; (bell jar, cloche), kloŝo; **bell-bottom(ed)**, larĝbaza; **bellhop**, **bellman**, grumo; **bellwether**, (lit or fig), estroŝafo; **bellwort**, (*Campanula*), kampanulo; (*Uvularia*), uvulario*; **bluebell**, blua kampanulo; **Canterbury bell**, (bot), kampanulo; **cathedral bells**, (bot), kobeo; **diving bell**, mergokloŝo; **doorbell**, pord~o; **jingle bell**, **sleigh bell**, (or similar-sounding bell), tintilo

belladonna, (plant), beladono; (drug), atropino

belle, belulino

Belle-Isle, (French island), Bel-Insulo†

Bellerophon, Belerofono

belles-lettres, beletr(istik)o

bellicose, militema, atakema

belligerent, (at war), milit/anta; ~anto; (quarrelsome; warlike), kverelema, ~ema, atakema; **belligerence**, atakemo, ~emo; **belligerency**, ~anteco; atakemo; **cobelligerent**, kunbatalanto, kun~o; kunbatalanta, kun~a

Bellis perennis, lekanteto

Bellona, Belona

belly, muĝegi [int], kriegi [int]; ~o, kriego

bellows, balgo [note sing]

belly, (gen), ventro [cp "abdomen"]; **bellyache**, ~odoloro; (colloq: grumble, complain), grumbli [int], plend(aê)ji [int]; **bellybutton**, umbiliko; **belly-flop**, ~ofrapo; **potbellied**, (re person), dik~a, ~aĉa, ~ega, dik~a; (re stove etc.), ~ega

Belone, belono

belong, aparteni [int]; **belongings**, posedaĵoj, havaĵoj

Belorussia, [see "Belarus"]

beloved, amata; ~o

below, (prep: under), sub (e.g.: *below*

the horizon: ~ la horizonto); (adv: under), ~e(n); (lower; later, as in written material), malsupre(n), infre(n) (e.g.: *the list given below*: la malsupre [or] infre donita listo)

Belshazzar, Belŝacaro [cp "Balthazar"]

belt, (garment, or any similar-shaped thing; zone; etc.), zono; ~i [tr]; (colloq: hit), bati [tr]; **beltway**, ~vojo; **chastity belt**, ĉasteco~o; **life-belt**, **seat-belt**, sav~o; **hit below the belt**, kanajlumi [int] (al); kajnalajo; **tighten the belt**, (lit or fig), streĉi la ~on

beluga, (*Husa*), huzo

belvedere, belvedero

bemoan, lamenti [int] (pri), pri~i [tr]

bemuse, (stupefy), stupor/igi; (distract), distri [tr]; **bemusement**, ~o; distriĝo; **bemused**, ~igita; distrita, sensob-tuzigita

Benares, Benareso

bench, (seat), benko; (place for judges), juĝistejo; (office of judge), juĝisteco; (all judges), juĝistaro; **benchmark**, (termezura) fiksnivela punkto; **work-bench**, stablo

bend, (flex), fleksi [tr]; ~iĝi; ~(a)jo; (curve), kurbigi; kurbiĝi; kurbaĵo; kurbiĝo; (in road), (voj)turno; (incline), klini [tr]; kliniĝi; kliniĝo; (twist, wind), sinui [int]; sinuo; (yield), cedi [int]; **bending**, (sinuous), sinua; **unbending**, (rigid), rigida; (unyielding), necedema; **the bends**, (decompression disease), kasonmalsano; [see "bent"]

beneath, (prep: below, under), sub; (adj, adv), ~a; ~e; (unworthy of), malinda de (e.g.: *such behavior is beneath him*: tia konduto estas malinda de li)

Benedict, Benedikto

benedictine, Benediktana likvoro

Benedictine, Benediktana; **Benedictine nun**, ~ino

benediction, beno

benefactor, bonfar/into; ~anto; ~onto

benefice, benefico

beneficence, bonfaro; **beneficent**, ~(em)a

beneficial, utila; bonfara

beneficiary, (receiver of insurance,

pension, gift, etc.), profitanto; (of bequest), heredanto; (holder of benefice), beneficulo

benefit, (help, advantage), helpi [tr], esti avantaĝo al; ~o; avantaĝo; (payment from insurance, pension, welfare, etc.), profito; (public performance, event, etc., for charity, specific person or organization etc.), benefico; **benefit of the doubt**, fido malgraŭ duboj

Benelux, Beleluko; ~a

benevolent, (charitable), karitata; (inclined to good), bonfarema; (beneficent), bonfara; **benevolence**, ~o; bonfar(em)o

Bengal, Bengalo; **Bay of Bengal**, Golfo ~a; **Bengalese**, **Bengali**, ~a; ~ano

benign, benigna

Benin, Benino†

Benjamin, Benjamins

bent, (inclination), inklino, emo; (not straight), [see "bend"]; (grass), agrostido

benzedrine, benzedrino†

benzene, (C₆H₆), benzeno [cp "gasoline"]

benzidine, benzidino

benzo-, (chem pfx), benzo-

benzoic, benzoa; **benzoic acid**, ~-karbonacido

benzoin, benzoo

benzol, (benzene: C₆H₆), benzeno; (mixture of aromatics), benzolo

benzyl, benzilo

Beograd, Beogrado

bequeath, testamenti [tr], heredigi; **bequest**, (act), ~o, heredigo; (thing bequeathed), ~aĵo, heredaĵo

berate, riproĉ(eg)i [tr]

Berber, Berbero; ~a

Berberis, berberiso

bereave, (cause to mourn), funebr/igi; (deprive), senigi; **bereaved**, ~anta; ~anto; **be bereaved**, (mourn), ~i [int]; **bereavement**, ~o

bereft, senigita

Berence, Berenica

beret, bereto

bergamot, (orange: fruit of *Citrus bergamia*), bergamoto; (tree), ~arbo; (oil), ~oleo; (herb: *Monarda*), monar-

do; **wild bergamot**, monardo
beriberi, beribero
Bering, Beringa; **Bering Sea**, Maro ~a;
Bering Strait, Markolo ~a
berkelium, berkelio
Berlin, Berlino
berm, bermo
Bermuda, (la) Bermudoj [note plur]
Bern, Berno
Bernard, (man's name), Bernardo;
Saint Bernard, (dog), hundo de San-
 ~o; (**Great**) **Saint Bernard Pass**, la
 (Granda) Trapasejo de San~o
Berne, Berno
Bernice, Berenica
berry, (gen), bero; **blackberry**, (plant),
 rubuso; (berry), rubus~o; **blueberry**,
 mirtelo; mirtel~o; **china berry**, (plant
 or berry), melio; **cranberry**, oksiko-
 ko; **cranberry tree**, **highbush**
cranberry, viburno; **huckleberry**,
loganberry, logan~ujo; logan~o;
raspberry, frambujo; frambo; (deri-
 sive noise), mokbruo; **strawberry**,
 fragujo; frago; **strawberry mark**,
 fragmarko; **strawberry pigweed**,
strawberry spinach, **strawberry**
blite, fragspinaco, blito; **whortleber-**
ry, mirtelo
berserk, berserk/eca; **berserker**, ~o;
go berserk, ~iĝi
berth, (room to maneuver), manovrejo;
 (place to anchor), ankrejo; (bunk etc.),
 litbenko, kuŝbenko, kuŝejo; (anchor),
 ankri [tr]; **give a wide berth to**, ne tro
 proksimiĝi al
Bertha, Berta
Bertholletia excelsa, Bertholletia nobi-
 lis, Brazila nukso
Bertrand, Bertrando
beryl, berilo
beryllium, berilio
besant, bizanto
beseech, petegi [tr]
beset, sieĝi [tr]
beside, (next to), apud; (in addition, oth-
 than), krom; **beside the point**, ne rilata;
be beside the point, ne rilati [int];
beside oneself, ekstaza, ekscitegita
besides, (prep: in addition to), krom
 (e.g.: *besides Esperanto, he also*
dominion, (rule), reg(iv)o; (country), dominio; **Dominion Day**, Dominia Tago
domino, domen/peco; **dominoes**, (the game), ~o
Domitian, Domiciano
don, (put on), surmeti [tr]; (Br university official), asociito, docento
Don, (river), Dono; (man's name), Donĉjo, Doĉjo
Donald, Donaldo
donate, donaci [tr]; **donation**, ~o
done, [see "do"]
Donets, Doneco
donga, uedo
Don Juan, Donjuano
donkey, azeno
donneybrook, tumulto, kverelego
donor, don/into; ~anto; ~onto
Don Quixote, Donkiĥoto
donut, pastoringo
doodad, umo
doodle, desegnet/adi [tr]; ~o
doohickey, umo
doom, (fate), sorto; (ruin, tragic end), pereo; (condemn), kondamni [tr]; **doomsday**, (la) Lasta Juĝo; **doomed**, pereonta; kondamnita
door, (gen), pordo; **doorbell**, ~sonorilo;
doorjamb, (~)framflanko; **doorsill**, sojlo; **doorstep**, ~ŝtupo [cp "porch"];
doorway, ~o; **closed-door**, (closed to public), malpublika, privata; **double door**, duklapa ~o; **front door**, ĉef~o [not "antaŭ~o"]; **indoor**, endoma; **indoors**, endome(n); **next-door**, najbara; apuda; **next-door neighbor**, apuda najbaro; **open-door**, (open to public), publika; **outdoor**, subĉiela, liberaera; **outdoors**, subĉiele(n), ekstere(n), eksterdome(n); **the outdoors**, la liberaero; **sliding door**, ŝov~o; (sliding vertically, as in garage, castle, etc.), herŝo; **swinging door**, ŝvingo~o; **trap-door**, klap~o
dope, (smear thick substance), ŝmiri [tr]; ~aĵo; (drug, gen), [see "drug"];

(use drugs to enhance sports performance etc.), dopi† [tr]; dopiĝi
Doppler, Doppler†; **Doppler effect**, ~-efekto†; **Doppler shift**, ~-ŝoviĝo
Dorian, Doria; ~ano
Doric, Dorika
Doris, (woman's name), Dora; (Greek), ~io
Doris, (zool), dorido
dorm, dormejo
dormant, dormanta
dormer, gablofenestro
dormitory, dormejo
dormouse, glioro
Doros, Doro
Dorothy, **Dorothea**, Dorotea
dorsal, dorsa
Dorus, Doro
dory, (boat), doriso; (fish), zeo
dose, dozo; ~i [tr]; **dosage**, ~o; **overdose**, super~o; super~i [tr]; **dosimeter**, ~ometro
dossier, dosiero
dot, punkto; ~i [tr]; **dotted**, (scattered), disa; dise; **polka dot**, piz~o
dotage, senileco
dote, (be foolish, senile), senili [int]; **dote (upon)**, dorloti [tr]
douar, duaro
double, (w 2 combined; twice normal; dual), duobla; ~e; ~o; ~igi; ~iĝi (e.g.: *double consonant*: ~a konsonanto; *the price doubled*: la prezo ~iĝis); (2-by-2, paired), duopa; duope (e.g.: *ride double*: rajdi duope); (substitute for actor etc.), dubli [tr]; dublanto; (any look-alike person), sozio; (mus: octave lower), kontra- [pfx] (e.g.: *double bassoon*: kontrafagoto); **double back**, (fold), refaldi [tr]; refaldiĝi; (turn), reĝiri [tr]; reĝiriĝi; **double-cross**, perfidi [tr]; perfido; **double-decker**, (re boat, bus, etc.), duetaĝa; (layers, as sandwich), dutavola; **double-edged**, dutranĉa, ambaŭtranĉa; **double entendre**, dusencaĵo [cp "ambiguous"]; **double-header**, (gen), ~aĵo; (baseball or oth game), ~a ludo; **double-jointed**, ambaŭdirekte artikigita; **double-space**, [see under "space"]; **double-take**, dofoja rigardo; **double-talk**, galimatjo; **redou-**

ble, (double), ~igi; ~iĝi; (double twice), re~igi; re~iĝi; (fold back), kuspi [tr], refaldi [tr]; kuspiĝi, refaldiĝi; (turn back), returniĝi; **play doubles**, (tennis etc.), ludi ~e

doublé dubleo

doubt, dubo; ~i [int] (pri), pri~i [tr]; **doubtful**, ~inda; **doubtless**, **beyond doubt**, **without a doubt**, sen~e; **cast doubt on**, **raise doubts about**, ~indiĝi, pri~igi; **self-doubt**, sin~o, nememfido

douche, duŝi [tr]; ~o; (device), ~ilo

dough, pasto; **doughnut**, ~oringo

dour, severa, malmilda

douse, (put out light, fire), estingi [tr]; (soak, immerse), trempi [tr]; (w divin-ing rod), [see "dowse"]

dove, kolombo; **dovecot(e)**, ~ejo;

dovetail, hirundovosta; hirundovostaĵo; hirundovostigi; hirundovostigiĝi;

ringdove, palumbo, arbo~o; **rock**

dove, livio, rok~o; **stock dove**, enado

Dover, Dovero; **Strait of Dover**, Markolo ~a

Dovre(fjeld), Dovro

dowager, (noble), nobelvidvino; (rich), riĉulino

dowdy, plumpa

dowel, dubelo; ~izi [tr]

dower, (vidvina) heredaĵo

down, (adv), malsupre; ~en, sob (e.g.: *go down*: iri ~en; *it's down there*: ĝi estas tie malsupre); [note: in expressions like "go downstairs", "go downhill", etc., "stairs" etc. is usually omitted ("iri ~en"), but may be included for emphasis or to be specific ("iri ~en la ŝtuparon", "iri ~en la deklivon")]; (prep: following along), laŭ (e.g.: *go down that road*: iri laŭ tiu vojo); (adj: directed downward), ~en(ir)a (e.g.: *the down escalator*: la ~enira eskalatoro); (less, smaller, lower, etc.), malpli (granda, alta, etc.) (e.g.: *prices are down*: prezoj estas malpli altaj); (not functioning), ne funkcia (e.g.: *the system is down*: la sistemo ne estas funkcia [or] la sistemo ne funkcias); (psych: depressed), deprimita (e.g.: *I feel down*: mi sentas min deprimita; *don't let that*

get you down: ne lasu tion deprimi vin); (feathers), lanugo; (hill), monte-to; (\$) kontanta; kontante (e.g.: *down payment*: kontanta pago; *pay \$500 down*: pagi \$500 kontante); (let go of), de- [pfx] (e.g.: *put it down*: demeti ĝin, delasi ĝin); (become), -iĝi [sfx] (e.g.: *calm down*: trankviliĝi; *cool down*: malvarmiĝi); (finished, completed), finita (e.g.: *two down, three to go*: du finitaj, tri farotaj); (defeat), venki [tr]; (make fall, by knocking, chopping, etc.), faligi (e.g.: *down a tree*: faligi arbon); **downbeat**, ĉef-pulso; **downcast**, (looking down), vizaĝaltera; vizaĝaltere; (sad, discouraged), malgaja, senkuraĝa, morna; **downer**, (drug), deprenzeno; (fig, depressing experience), depremilo; **downfall**, (fall), falo; (ruin), ruinigo; **downgrade**, (degrade, demote), degradi [tr]; (slope down), (~ena) deklivo; **downhearted**, senkuraĝa, malgaja; **downhill**, ~en (la deklivon) [see note above]; **downpour**, pluvego, pluvorento; **downrange**, subtrajektoria; subtrajektorie(n); **downright**, absoluta, entuta; abso lute, entute; **downspout**, pluvodukto; **downstairs**, ~en (la ŝtuparon) [see note above]; **downstream**, laŭflua; laŭflue(n); **downtime**, nefunkcia tempo; **downtrodden**, tiranata, subpremata; **downward(s)**, (adv) ~en, sob (e.g.: *the road leads downward*: la vojo kondukas ~en); (adj: leading downward), ~en(ir)a (e.g.: *a downward slope*: ~ena deklivo); **downwind**, laŭventa; laŭvente(n); **down with ...!** (protest slogan), for ...!, sob ...!; **down the street (hall, river, etc.)**, laŭ la strato (koridoro, rivero, etc.); **down and out**, malfeliĉega, mizeriga, plenvenkita; **down-to-earth**, realisma, praktik(em)a; **bring down**, (lower), malaltiĝi; (make fall), faligi; **come down**, malaltiĝi; fali [int]; **go down**, ~eniri [int]; **keep down**, (restrain), bridi [tr]; **let down, set down**, demeti [tr], delasi [tr]; **get down to**, (start to deal w bsns at hand), ekatenti [tr]; **take down, put down, get**

down, (on paper), surpaperigi; (on tape), surbendigi; **upside down**, [see under "up"]; [see also subentries under verbs followed by "down"]

dowry, doto

dowse, (search for water etc. w dowsing rod), rabdi [tr], radiestezi [int]; **dowser**, (person), ~isto; **dowsing rod**, ~o

doxology, doksolologio

doyen, dojeno; **doyenne**, ~ino

doze, somnoli [int]; ~o

dozen, dekduo; ~o(j) da (e.g.: *three dozen eggs*: tri ~oj da ovoj); **dozens**, (imprecise number), dekoj (e.g.: *there were dozens of people in the pool*: estis dekoj da homoj en la naĝejo); **a half dozen, half a dozen**, (imprecise number), kvin-ses, ses-sep, ĉirkaŭ ses, pluraj [less awkward than "duono de ~o da"]

Dr. (abb of "Doctor", as title), d-ro [abb of "doktoro"]

drab, (dull color), malhela; (not lively), malsprita, malvigla; (yellowish brown), flavbruna; **olive drab**, oliveca

Draba, drabo

dracaena, Dracaena, draceno

drachma, draĥmo, drakmo

Draco, (Greek), Drakono; (ast), Drako;

Draconian, ~a

Draco, (bot), drako

Dracocephalum, drakocefalo; Dracocephalum moldavica, moldaviko

Dracunculus medinensis, medina filario

draff, feĉo

draft, (of air), trablovo; (check, gen), ĉeko [see "check"]; (\$: by one person requiring oth to pay),trato; (money order), mandato; (payment order), asigno; (conscription), konskripcio; konskripcii [tr]; (pulling, as of vehicle), tiro; (drink), trinko; (portion for drinking), ĉerpo; (available to be drawn from cask, as beer), ĉerpebla (e.g.: *draft beer, beer on draft*: ĉerpebla biero); (test writing or drawing, unpolished), malneto; malneta; malnetigi, malnete verki [tr], skizi [tr]; (mech: taper), bevelo; (displacement of ship), enakviĝo; **drafts**, (Br: game

of checkers), damludo; **draftee**, kon-skripto; **draftsperson**, **draftsman**, desegnisto; **drafty**, ~a; **draft animal**, tirbesto; **draft dodger**, konskripcievitantulo; **indraft**, enblovo, entiro; **overdraft**, (\$) , troretrato; **rough draft**, malneto; **final draft**, neto

drag, (pull trailing object; trail; resist etc.), treni [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (dredge), dragi [tr]; (draw, pull, as on cigarette or drink), tiri [tr]; tiro; (brake), bremso; (swallow), gluto; (bore), tedulo; **drag on**, **drag out**, trodaŭri [int]; trodaŭrigi; **drag one's feet**, rezisti [tr], malkunlabori [int]

dragée, drageo

dragnet, dragneto

dragoman, dragomano

dragon, drako; **dragonfly**, (*Odonata*), odonato; (*Libellula*), libelo; **dragon-head**, (bot), drakocefalo

dragoon, dragono

drain, (carry off excess liquid, gen, lit or fig), dreni [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (pipe), ~ilo, defluilo; (drink up), eltrinki [tr]; **drainage**, ~aĵo; ~ado; **drainpipe**, ~ilo [cp "sewer"]

drake, viranaso

dram, (1/8 ounce apothecary), 3,89 gramoj [see § 20]; (1/16 ounce avoirdupois), 1,77 gramoj; (fluid), 3,70 mililitroj; (small drink), trinketo

drama, (theat work), dramo; (art of theat), teatro; **dramatic**, ~a, teatra; **dramatize**, ~igi; **dramatist**, ~verkisto [cp "dramaturgy"]; **psychodrama**, psiko~o

dramatis personae, roluloj

dramaturgy, dramaturgio; **dramaturge**, **dramaturgist**, ~oĵ; **dramaturgic**, ~ia

drape, drapiri [tr]; ~aĵo; **draper**, drapisto; **drapery**, (draped cloth, as curtains etc.), ~aĵo(j); (Br: fabric), drapo; **drapes**, (curtains), kurtenoj

drastic, drasta

Drau, Dravo

draught, [see "draft"]

Drava, Dravo

Dravidian, **Dravidic**, Dravido; ~a

draw, (picture, design), desegni [tr] [cp "sketch"]; (drag), treni [tr]; (pull), tiri

[tr]; tiriĝi; (float in depth, re ship), enakviĝi (je) (e.g.: *that ship draws ten meters*: tiu ŝipo enakviĝas dek metrojn [or] je dek metroj); (attract, entice), allogi [tr]; (elicit, bring out), estiĝi, eltiri [tr]; (bring to self, attract), altiri [tr]; (naut: pull sail to yardarm or mast), brajli [tr]; (take out, pull out), eltiri [tr], elpreni [tr]; (take liquid), ĉerpi [tr]; (get, receive), ricevi [tr]; (withdraw \$), depreni [tr], maldeponi [tr]; (\$: accrue interest), gajni [tr], lukri [tr]; (disembowel), sentripigi; (deduce), dedukti [tr]; (infer), indukti [tr]; (derive), derivi [tr]; (tie in game, contest, etc.), egalvenko; (stretch), streĉi [tr]; streĉiĝi; (distort, distend), distordi [tr]; distordiĝi; (constrict), stringi [tr]; stringiĝi; (become), ~iĝi [sfx] (e.g.: *the time is drawing near*: la tempo proksimiĝas); (move), moviĝi (e.g.: *she drew off a bit from us*: ŝi moviĝis iomete for de ni); (track game), spuri [tr]; (gully, ravine), ravino; (dry ravine, as wadi), uedo; **drawing**, (design, picture), ~aĵo; **drawing board**, (for drafter, artist, etc.), ~ostablo; **draw away**, formoviĝi; **draw back**, retiri [tr]; retiriĝi; **drawback**, (disadvantage), malavantaĝo; (rebate), rabato; **drawbar**, kuplostango; **drawbridge**, [see under "bridge"]; **draw off**, (liquid from container, pipe), deĉerpi [tr]; (move away), formoviĝi; **draw on**, (utilize), utiligi, uzi [tr]; **draw out**, (prolong), trodaŭrigi; (extract), eltiri [tr]; (get person to talk), parolemigi; **drawstring**, stringoŝnureto; **draw up**, (draw together, gather), kuntiri [tr]; kuntiriĝi; (halt), halti [int]; haltigi; (approach), proksimiĝi; (write), skribi [tr]; verki [tr] [see "write"]; (compile list), kompili [tr]; **draw oneself up**, rektiĝi, rektiĝi sin; **overdraw**, (\$), troretrati [tr]

drawer, (in desk, chest, etc.), tirkesto; **drawers**, (old-style underwear), kalsono [note sing]

drawl, trenparoli [tr]; ~o

dray, platĉaro

dread, timegi [tr]; ~o; **dreadful**, ~inda, tiri

terura
dreadnought, dreadnaught, (coat), drappalto; (ship), drednaŭto
dream, (in sleep), sonĝi [tr]; ~o; (aspire), revĵi [int]; revo; **daydream,** revĵi [int]; revo; **pipe dream,** pip~o
dreary, morna
dredge, dragi [tr]; (apparatus), ~ilo; (barge equipped w dredge), ~ŝipo; (sprinkle flour etc. on food), surŝuti [tr], farunizi [tr]
dregs, feĉo [note sing]
drench, saturi [tr]
Dresden, Dresdeno
dress, (clothe), vesti [tr]; ~i sin, ~iĝi; (clothing, gen), ~o; (woman's garment), robo; (usual clothing style), kostumo (e.g.: *Japanese dress:* Japana kostumo); (re formal attire), formala (e.g.: *dress uniform:* formala uniformo); (trim, adorn), ornami [tr], garni [tr]; (bandage wound), pansĵi [tr] [cp "bandage"]; (mil: line up), vicigi; vicigi (e.g. [mil command]: *dress right!*: vicigi dekstren!); (eviscerate), sentripigi; **dresser,** (chest of drawers), komodo; (Aus: dish, china cabinet), telerŝranko; **dressing,** (for wound), pansaĵo; **dressing gown,** tualeta robo; **dressing room,** vestoĉambro; **dressy,** formala, eleganta; **dress down,** riproĉi [tr]; **dressmaker,** rob-tajloro; **dress up,** (in formal attire), formale ~iĝi; (in disguise costume), masko~i [tr]; masko~i sin, masko~iĝi; (in costume or otherwise, for amusement), travestii (sin); **dressed up,** (formally), formale ~ita; **pant-dress,** pantalonrobo; **get dressed,** ~i sin, ~iĝi; **undress, get undressed,** mal~i [tr]; mal~i sin, mal~iĝi
dressage, (ĉeval)dresado
dribble, (drool), bavi [int]; ~o; (drip), guti [int]; guto; gutado; (sports), dribli [int]
drier, [see under "dry"]
drift, drivi [int]; ~o; (gist of meaning), senco; (tendency), tendenco; (of snow, sand, etc.), ~aĵo, ~amaso [cp "dune"]; (wander), vagi [int]; **drift ice,** ~glacio; **driftwood,** ~ligno; **get the drift of,** kapti la sencan de

drill, (bore), frezi [tr], bori [tr]; (machine), drilo; (large, w derrick, as for oil well), drilego; (train, rehearse), trejni [tr]; trejniĝi; trejn(ad)o; (exercise), ekzerci [tr]; ekzerciĝi; ekzerc(ad)o; (fabric), dreliko; **drill-bit,** ~ilo; **drill instructor,** trejninstruisto; **drill press,** ~maŝino

Drimys, drimiso

drink, (gen), trinki [tr]; (act), ~o; (beverage), ~aĵo; (alcoholic beverage), alkoholaĵo; (drink alcoholic beverages, esp to excess), drinki [int] [cp "drunk"]; **drink in,** (avidly consume, lit or fig), sorbi [tr]; **drink to,** (toast), tosti [tr]; **drink up,** el~i [tr]; **drinking fountain,** ~fontaneto; **drinking song,** drinkkanzono; **drinking water,** ~akvo

drip, guti [int]; ~igi (e.g.: *the faucet drips:* la krano ~as; *the car drips oil:* la aŭto ~igas oleon); ~o; ~ado; **drip-dry,** neĉifigema; ~sekigi; ~sekigi (e.g.: *drip-dry the drip-dry shirt:* ~sekigi la neĉifigan ĉemizon); **postnasal drip,** postnaza ~ado

drive, (make go, urge on, re animals, machinery, passions, etc.), peli [tr]; ~o (e.g.: *the motor drives the front wheels:* la motoro ~as la antaŭajn radojn; *driven by hate:* ~ata de malamo); (guide vehicle etc.), stiri [tr], konduki [tr]; (travel by car, as driver or passenger), veturi [int]; veturo; (take someone by car), veturigi (e.g.: *I'll drive you home:* mi veturigos vin hejmen); (cause to be), ~igi [sfx] (e.g.: *you drive me mad:* vi frenezigas min); (cmptr; sports), drajvi [tr]; drajvo; (force through, into), trabati [tr], enbati [tr] (e.g.: *she drove her point home:* ŝi enbatis sian punkton); (self-motivation), sin~ado; (psych urge), urĝo; (campaign), kampanjo; (power train, as of car, machinery), transmisiilo (e.g.: *chain drive:* ĉena transmisiilo); (propulsion system, as in rocket), ~sistemo (e.g.: *ion drive:* jona ~sistemo); (drift), drivi [int]; (driveway), alirvojo; **drive at,** (aim at), celi [tr]; (hint, allude to), aludi [tr]; **drive away,** for~i [tr]; **drive in,** (hit), enbati

[tr]; **drive-in**, (restaurant, bank, etc.), envetura; **drive shaft**, transmisia ŝafto; **driveway**, alirvojo; **driver's license**, stirlicenco, konduklicenco; **disk drive**, (cmprtr), diskodrajvo†; **mass driver**, (linia) mas-akcelatoro; **overdrive**, superrapidumo; **pile driver**, ramo

drivel, (drool), bavi [int]; ~o; (nonsense), galimatio; paroli galimatie

drizzle, nebulpluvo; ~i [int]

droll, drola

-drome, (sfx), -dromo

dromedary, dromedaro

Dromia, dromio

Dromiceus, dromiceo

drone, (bee), virabelo; (any nonworker), nelaboranto, parazito, nenifaranto; (plane, spaceship, etc.), telestirata avio (ŝipo, etc.); (hum, buzz), zumadi [int]; zumado; (bagpipe pipe), zumtubo

drool, bavi [int]; ~o

droop, velki [int]; ~igi; ~o

drop, (fall; let fall), fali [int]; ~igi, lasi ~i; ~o; (decrease), malpliigi, ~i; malpliigo, ~o; (lower), mallevi [tr]; mallevigi; (descend), descendi [int]; descendo; (steep slope), krutaĵo; (of liquid), gutto; (drip), guti [int]; gutigi; (chute, as mail drop), ŝutilo; (give birth), naski [tr]; (give out, as hint), eligi, ellasi [tr]; (leave; no longer deal w), lasi [tr]; lasigi (e.g.: *I'll drop you at the station*: mi lasos vin ĉe la stacidomo; *let's drop the matter*: ni lasu la aferon; *the matter dropped there*: la afero lasiĝis tie); **drop back**, posteniri [int], retroiri [int]; **dropcloth**, guttuko; **drop in** (to visit), hazarde viziti [tr]; **droplet**, guteto; **droplight**, levela lumo; **drop off**, (decrease), malpliigi, de~i [int]; (fall asleep), ekdormi [int]; **drop-off**, (decrease), malpliigo, de~o; (steep slope), krutaĵo; **drop out**, (quit), retiri sin, retirigi; (from school etc.), el~i [int]; **dropout**, (student etc.), el~into; **dropper**, guttigilo; **droppings**, (dung), fekaĵo, sterko

dropsy, hidropso

dropwort, felandrio

drosera, Drosera, drozero

droshky, droŝko

drosophila, Drosophila, drozofilo

dross, (on metal), skorio; (rubbish), rubo; (junk), fatraso

drought, **drouth**, senpluveco

drove, (of animals), brutaro, grego; ~r, (Aus), brutpelisto

drown, droni [int]; ~igi; **drown out**, (by noise), superbrui [tr]

drowsy, somnola

drub, bati [tr]

drudge, servutulo; **drudgery**, ~o; **do drudgery**, ~i [int]

drug, (medicinal), drogo; ~i [tr]; (narcotic), narkoti [tr]; toksiko†, narkotaĵo; **druggist**, ~isto; **drugstore**, ~ejo [cp "apothecary", "pharmacy"]

druid, **Druid**, Druido; ~a; **druidism**, ~ismo

drum, (mus, gen; or similar-shaped cylindrical object), tamburo; ~i [tr, int]; (for cable etc.), ~o, bobenego; **drummer**, ~isto; **drum major**, bandestro; **drumstick**, (for drum), ~bastono; (meat), suraĵo; **bass drum**, ~ego; **ear-drum**, timpana membrano [cp "ear: middle ear"]; **kettledrum**, timbalo; **snare drum**, drat~o

drunk, (intoxicated), ebria; ~ulo; **drunken**, ~a; **drunkard**, drink(em)ulo, ~emulo; **get drunk**, ~igi; ~igi [cp "drink"]

drupe, drupo

druse, druzo

Druse, **Druze**, Druzo; **Drusian**, ~a

druthers, prefero

dry, (gen), seka; ~igi; ~igi; **dryer**, (gen), ~igilo; **dry out**, (dry fully), el~igi; el~igi; **freeze dry**, liofilizi† [tr]; **hair dryer**, [or any dryer blowing hot air], feno, harsekigilo†

dryad, driado

dual, (gen), duala; ~o; **duality**, ~eco; **dualism**, ~ismo

dub, (movie or oth recorded sound etc.), dubli [tr]; (make a knight), kavalirigi; **overdub**, sur~i [tr]

dubious, (inclined to doubt), dub/ema; (improbable), ~inda

Dublin, Dublino

ducal, duka

ducat, dukato
duchess, dukino
duchy, duk/ejo, ~lando
duck, (zool), anaso; (bend down), ekkauri [int]; (avoid, gen), eviti [tr]; (push under water), mergi [tr]; (fabric), tiko; **duckmole**, ornitorinko; **duckweed**, lemno; **lame duck**, (pol), nereelektito; **old-squaw duck**, **old in-jun duck**, **oldwife duck**, **long-tailed duck**, klangulo, glaci~o; **spoon-bill duck**, kuler~o; **tufted duck**, fuligulo
duct, (tube, channel, gen), dukto; **bile duct**, koledukto; **milk duct**, lakto~o; **sperm duct**, spermato~o
ductile, duktila
ductus, (anat), dukto; **ductus deferens**, spermato~o
dud, (bomb, shell, etc.), mispafo; (worthless, gen), senvalora; senvalor-aĵo; (person), sentaŭgulo
dude, (any man), ulo; (dandy, fop), dandoo; (city fellow), urbano
duds, (colloq), vestoj
due, (payable), pagenda (e.g.: *the debt is due tomorrow*: la ŝuldo estos ~a morgaŭ); (owed, gen), ŝuldata; (to be submitted, presented), submetenda, prezentenda (e.g.: *the report is due in two weeks*: la raporto estos prezentenda post du semajnoj); (expected at given time), atendata (e.g.: *the train is due at 7:00*: la trajno estas atendata je la 7.00 [see "(be) past due" below]); (fitting, proper), deca, justa (e.g.: *give her her due credit*: doni al ŝi ŝian justan krediton; *with all due respect*: kun ĉia deca respekto); (thing merited), meritaĵo (e.g.: *give him his due*: doni al li lian meritaĵon); (exactly, as re compass direction), rekte, precize (e.g.: *we went due south*: ni iris rekte suden); **dues**, (\$), kotizo [note sing]; **pay one's dues**, kotizi [int]; **due to**, (caused by, because of), pro, kaŭze de [see "because: because of"]; (**be**) **past due**, **overdue**, (arriving late), malakurata, malfrua; malfrui [int] (e.g.: *the train is ten minutes past due*: la trajno estas malakurata [or] la trajno malfruas je dek minutoj); (not paid, not presented, etc.), postmatura, posttempa

(e.g.: *a pile of overdue bills*: amaso da postmaturaj fakturoj); **undue**, (excessive), ekscesa; (improper), nekonvena; **become due**, **fall due**, (re bill, loan, etc.), maturiĝi, ~iĝi; **in due time**, **in due course**, siatempe, ĝustatempe

duel, duelo; ~i [int]
duet, (any group of 2), duopo; (mus composition), dueto
duffel, **duffle**, kapotŝtofo; **duffel bag**, dreliksako; **duffel coat**, dufflo†
duffer, fuŝulo
dugong, Dugong, dugongo
dugout, (canoe), pirogo; (any shelter), ŝirmejo
duke, duko; **archduke**, arki~o
dulcet, dolĉa
dulcimer, (hammered), dulcimero, ŝartel~o; **mountain dulcimer**, **fretted dulcimer**, **lap dulcimer**, **Appalachian dulcimer**, freto~o
Dulcinea, Dulcinea
dull, (not sharp, re blade, senses, etc.), malakra; ~akriĝi; ~akriĝi; (not bright, re color etc.), ~hela; (unwitty, unclever), ~sprita; (unintelligent), ~inteligenta, stulta; (boring), teda, enuiga; (obtuse), obtuza; obtuzigi; **dullard**, ~spritulo; ~inteligentulo, stultulo
duly, taŭge, dece
dumb, (mute), muta; (stupid), stulta, malinteligenta; **dumbfound**, konsterni [tr]; **dumbstruck**, konsternita; **dumbwaiter**, (elevator), lifteto
dumbbell, haltero [cp "barbell"]
dumdum, dumduma (kuglo)
Dumetella carolinensis, katbirdo
dummy, (cards), fantomo; ~a; (any substitute), anstataŭaĵo; (puppet, lit or fig), pupo; (man of straw), pajlohomoo; (mannikin), manekeno; (effigy etc.), figuraĵo
dump, (spill), renversi [tr]; ~iĝi; ~(aĵ)o; (chute, as coal etc.), ŝuti [tr]; ŝutiĝi; (throw away), forĵeti [tr]; (bsns, \$), dumpingi [tr]; **dumping**, (bsns, \$), dumpingo; **dummy**, (inelegant), plumpa; **garbage dump**, rubejo; **supply dump**, provizejo; **down in the dumps**, deprimita, melankolia

dumpling, pastbuleto; (Chinese: wonton), huntuno
dun, (gray-brown), grizbruna; (\$), pagpostuli [tr]
dunce, stultulo
dune, duno; **dune buggy**, ~aŭto
dung, (manure), sterko; (any feces), fekaĵo; **dunghill**, **dungheap**, ~amaso
dungarees, drelík/pantalono; ~aĵo [note sing]
dungeon, karcero [cp "prison", "jail"]
dunk, trempi [tr]
Dunkirk, Dunkirko
duo, duo
duodecimal, dekduaria†
duodecimo, dozavo†
duodenum, duodeno; **duodenal**, ~a; **duodenitis**, ~ito
dupe, dupo; ~igi
dupe, duopa
duplex, (twofold, double), duobla; (elec), dupeksa; (house), ~a (domo)
duplicate, (reproduce, copy), kopii [tr], multoblíg, duoblíg; ~o [cp "photocopy"]; (facsimile of document etc.), duplikato; (double), duobla; (corresponding exactly), precize responda; **reduplicate**, (re)duoblíg, ripeti [tr] [see also "double: redouble"]
duplicity, ruzemo
dura (**mater**), duramatro
durable, daŭr/ema, ~iva, fortika
duralumin, duralumino
duramen, kernligno
duration, daŭro
durative, durativo
duress, premdevigo, perforto; **under duress**, sub ~o
durian, (tree), durio; (fruit), ~a frukto
during, dum
Durio, durio
durion, [see "durian"]
duro, duro
dusk, krepusko, vesper~o; **dusky**, ~a
dust, polvo; sen~igi; (powder lightly), ŝuteti [tr]; **dusty**, ~a; **dustbin**, (Br), rubujo; **dust bowl**, ~oregiono; **dust jacket**, librojaketó; **dustpan**, ~oŝovelilo; **dust particle**, ~ero; **dust storm**, ~oŝtormo; **feather-duster**, plumviŝilo; **bite the dust**, morti [int]
Dutch, Nederlanda; ~ano; **Dutchman**,

~ano; **Pennsylvania Dutch**, Pensilvan-Germana; Pensilvan-Germano;
go Dutch, iri mempage; **in Dutch**, en embaraso; **get one(self) in Dutch**, embarasi [tr] (sin)
dutiful, obeema
duty, (obligation), devo; (period of official service), deĵoro; (tax), dogano; **duty-free**, doganlibera; **dutiable**, doganata; **on duty**, deĵoranta; **off duty**, ne deĵoranta; **be on (off) duty**, (ne) deĵori [int] [cp "watch"]
Dvina, Dvino
dwarf, nano; ~a; ~igi; ~iĝi; **dwarfism**, ~eco, ~ismo
dwel, (reside), loĝi [int]; **dwelling**, ~ejo; **dwel on**, emfazi [tr], insisti pri;
indwell, en~i [int]
dwindle, ŝrumpi [int]
dyad, duopo; **dyadic**, ~a
dye, tinkturi [tr]; ~o; **dyed-in-the-wool**, ĝisosta
dyke, [see "dike"]
dynamic, dinamika; **dynamics**, ~o;
aerodynamic, aero~a; **astrodynamic**, astro~a; **electrodynamic**, elektro~a; **isodynamic**, izodinama; **thermodynamic**, termo~a
dynamism, dinamismo
dynamite, dinamito; ~i [tr]
dynamo, dinamó
dynamometer, dinamometro; **electrodynamometer**, elektro~o
dynamotor, dinamotoro
dynasty, dinastio; **dynastic**, ~a
dynatron, dinatrono
dyne, dino
dys-, (med pfx) dis-, mis-
dysentery, disenterio; **dysenteric**, ~a
dysfunction, misfunkcio
dyslexia, disleksio; **dyslectic**, ~a; ~ulo
dysmenorrhea, dismenoreo
dyspepsia, dispepsio; **dyspeptic**, ~a
dyspnea, dispneo
dysprosium, disprozio
dystrophy, distrofio*
dysuria, disurio
dytiscid, ditisko
Dytiscus, ditisko

E

each, (every), ĉiu (e.g.: *read each book*: legi ĉiun libron); (at rate of, “@”, for each one), po [followed by “-o” or “-on” same as if “po” were not used] (e.g.: *we ate two apples each*: ni manĝis po du pomojn; *they cost \$2 each*: ili kostas po \$2 [du dolarojn]; *mix one spoonful per [in each liter of water]*: miksu po unu kulerplendon en ĉiu litro da akvo; *two books were in the chairs [in each chair]*: po du libroj estis en la seĝoj) [note that “po” goes in front of numerical expression]; **each one**, ĉiu (e.g.: *each one of them*: ĉiu el ili); **each and every (one)**, ĉiu ajn; **each other**, (one another), si(n) reciproke, unu la alian (e.g.: *they kissed each other*: ili kisis unu la alian [or] sin reciproke)

eager, avida

eagle, aglo; **bald eagle**, **sea eagle**, **harpy eagle**, harpio; **white-tailed (sea) eagle**, haliaeto

ear, (anat), orelo; (of cap etc., to cover ears), ~umo; (grain spike, as corn), spiko; **earache**, ~doloro; **eardrum**, timpana membrano; **earflap**, ~umo; **earmark**, (set aside, reserve), rezervi [tr], asigni [tr], destini [tr]; (sign, indicator), indiko (e.g.: *this shows earmarks of wrongdoing*: ĉi tio montras indikojn de misfarado); **earphone**, kapaŭdilo; **earplug**, ~ŝtopilo; **earring**, ~ringo; **earshot**, aŭdatingo; **inner ear**, interna ~o; **middle ear**, timpano, meza ~o; **outer ear**, ekstera ~o; **be all ears**, atente aŭskulti [tr]; **be up to one's ears in**, troviĝi ĝis la ~oj en, droni en; **bend someone's ear**, aŭskultigi iun; **turn a deaf ear to**, rifuzi atenti [tr]; **fall on deaf ears**, resti neatentita; **give (lend) an ear (to)**, atenti [tr], klini ~on (al); **keep an ear to the ground**, resti atenta; **it went in one ear and out the other**, tra unu ~o ĝi eniris, tra la dua eliris; resti aŭdita sed ne atentita; **(play) by ear**, (mus; fig), (ludi) laŭ ~o; **play it**

by ear, (mus: improvise; fig), improvizi [tr]; **prick up one's ears**, streĉi la ~ojn

earl, grafo

early, frua; ~e

earn, (\$, gen), lukri [tr], gajni [tr] (e.g.: *deposits earn interest*: deponoj ~as [or] gajnas interezon); (wages, salary), ~i, perlabori [tr]; (gain, win, gen), gajni (e.g.: *earn respect*: gajni respekton); **earnings**, ~aĵo(j), gajnaĵo(j); **earn a living**, vivi [int], vivgajni [int], gajni (la) vivon

earnest, (serious, deliberate), serioza; **in earnest**, ~e; **earnest (money)**, ĝarantiaĵo

earth, (ground, gen), tero; ~a; (soil), grundo; (elec), ~konekto; ~konekti [tr]; ~konektiĝi; **earthbound**, (confined to ground, gen), ~ligita; **earthen**, (of clay), argila; **earthenware**, argilaĵo(j), argilaĵaro [cp “crock”]; **earthlight**, **earthshine**, ~lumo; **earthly**, (re material plane, not spiritual), materia, sur~a, nespirita, fizika; **earthmover**, (digging machine), elkavatoro; **earthquake**, sismo, ~tremo; **earthstar**, (bot), geastro; **earthwork**, (fortification), remparo; (re embankments, gen), ~aĵo [cp “bank”]; **earthworm**, lumbriko, ~vermo; **unearth**, el~igi, elfosi [tr]; **unearthly**, ne~(ec)a; **down-to-earth**, praktika; **come down to earth**, elreviĝi; reveni el aero al ~o; **what on earth?**, kio diable?

Earth, (planet), Tero

earwig, forfikulo

ease, (easy-ness), facil/eco; ~igi; ~iĝi; (repose), ripozo; (relax, loosen), malstreĉi [tr]; malstreĉiĝi; (make milder, as pain etc.), mildigi; mildiĝi; **at ease!**, (mil command), ripozu!, ripoz'!; **ill-at-ease**, maltrankvila; **put at ease**, (re)trankviligi

easel, stablo

easement, (easing), [see “ease”]; (legal right of way), pasrajto

east, oriento; ~a; ~e(n); (esp re compass point), easto; **eastern**, ~a; **easterner**, ~ano; **eastward**, ~e(n); ~en(ir)a; **east-terly**, (eastern), ~a; (toward east), ~e(n); ~en(ir)a; (from east), de~a; de~e; **eastbound**, ~en(ir)a; **Near East**, Proksim-O~o; **Middle East**, Mez-O~o; **Far East**, Malproksim-O~o

Easter, Pasko; ~a; **Easter Island**, ~in-sulo

easy, (not difficult, gen), facila; (unhurried), malhasta; **easy-going**, komplezema; **uneasy**, maltrankvila; **easy come, easy go**, ~a akiro, ~a perdo; **easy does it!**, zorgu!, ne hastu!

eat, (re food), manĝi [tr]; (corrode, as re acid), mordi [tr] [cp "corrode"]; **man-eater**, hom~ulo; **eat one's fill (of)**, ĝissate ~i, sat~i [tr]; **what's eating you?**, kio vin ĝenas?; **eat one's words**, maldiri [tr]; repreni siajn dir-ojn

eave, alero; **eavesdrop**, subaŭskulti [tr]

ebb, malflusi [int]; ~o; **ebb-tide**, ~o

ebonite, ebonito

ebony, ebono; ~a; **ebony tree**, ~arbo

Ebro, Ebro

ebullient, entuziasma, verva

ebullioscope, ebulioskopo

Ecballium, ekbalio; **Ecballium elaterium**, elaterio

eccentric, (mech: off-center), ekscentrika; ~o; (odd, strange), originala, stranga; originalulo, strangulo

ecchymosis, ekimozo

Ecclesiastes, (Bib), Predikanto

ecclesiastic, eklezi/ulo; **ecclesiastical**,

~a; **ecclesiasticism**, ~ismo

echelon, eskalono; ~igi; ~iĝi

echevin, skabeno

echidna, Echidna, eĥidno

echinococcus, ekinokoko

echinoderm, eĥinodermo

Echinoderm(at)a, eĥinodermoj

echinoid, eĥinoideo

Echinops, kardo

echinorhynchus, Echinorhynchus, eĥinorinko

echinus, Echinus, eĥino

Echium, ekio

echo, eĥo; ~i [tr]; ~iĝi

Echo, (myth), Eĥoa

echolalia, eĥolalio

éclair, krembulko

eclampsia, eklampsio

eclectic, eklektika

eclipse, eklipso; ~i [tr]; **total eclipse**,

plena ~o; **partial eclipse**, parta ~o;

annular eclipse, ringa ~o

ecliptic, ekliptiko

eclogue, eklogo

ecology, ekologio; **ecological**, ~ia;

ecologist, (scientist specializing in ecology), ~o [cp "environment"]

econometrics, ekonometrio†

economy, (gen), ekonomio; **economic**,

(re sci of economics), ekonomika; (re economy), ~a; **economical**, (re econ-

omics), ekonomika; (thrifty, sparing), ~a; **economics**, ekonomiko;

economist, ekonomikisto; **econo-**

mize, ŝpari [tr]

ecosystem, ekosistemo*

ecstasy, ekstazo; **ecstatic**, ~a

ectasia, ektazio; **ectatic**, ~a

ectoderm, ektodermo

-ectomy, (med sfx), ~ektomio

ectopia, ektopio; **ectopic** ~a

ectoplasm, ektoplasmo

ectropion, ektropio

Ecuador, Ekvadoro

ecumenical, ekumena; **ecumenism**, ~ismo

eczema, ekzemo

Edam, Edamo; ~a

Edda, Eddo

eddy, (in water), kirl/akvo; (in any fluid), ~fluo; (gen), ~iĝi [cp "whirlpool"]

edelweiss, edelvejso, neĝfloro

edema, edemo; **edematous**, ~a

Eden, Edeno

Edentata, edentatoj

edentate, (toothless), sendenta; (zool), edentato

edentulous, sendenta

Edgar, Edgardo

edge, (rim, brink, etc.; limit of any surface, lit or fig, as re table, knife, desert, fear, etc.), rando; (border around edge, as on hat, curtain, etc.), ~aĵo; (narrow surface around edge, as on coin), ~umo; (sharp, as on blade;

math), eĝo; (of river), bordo; (put an edge on), ~izi [tr]; ~umizi [tr]; (trim edge, as lawn etc.), ~ostuci [tr]; (move slowly), movetiĝi, rampi [int]; **edgeways**, **edgewise**, (edge foremost), flanko; flanke(n); (on edge), sur~a; sur~e; **double-edged**, (sword etc., lit or fig), dutranĉa; **straight-edge**, liniilo; **on edge**, **edgy**, (nervous), nervoza, agaciĝema; **put on edge**, agaci [tr]; **have an edge on (over)**, havi avantaĝon super; **take the edge off**, (gen), obtuzigi, malakrigi; **get a word in edgewise**, interkoj~ni vorton

edible, manĝebla; **inedible**, ne~a

edict, dekreto, edikto

edifice, konstruaĵo

edify, edifi [tr]; **edification**, ~ado

edile, edilo

Edinburgh, Edinburgo

edit, manage magazine etc.; polish anything written, redakti [tr]; **editor**, redaktoro, ~isto; **editorial staff**, **editorial office**, redakcio

Edith, Edita

edition, eldono

Edmond, **Edmund**, Edmondo

Edom, (gen), Edomo

EDP, (abb of "electronic data processing"), komputoro/ado; ~a

educate, eduki [tr], klerigi; **education**, (teaching, gen), ~(ad)o; (of children), ~(ad)o, pedagogio; (learned state), klereco, ~iteco; **educator**, ~isto; pedagogo; **educated**, (learned), klera; **educable**, ~ebla; **coeducation**, ge~ado; **coeducational**, ge~ada, gea; **self-educated**, memlerninta, aŭtodiakta

Edward, Eduardo

-ee, (sfx: person, object of action indicated by root), ~ito; ~ato; ~oto (e.g.: *appointee*: asignito); (person to whom or for whom action done), al...ito; al...ato; al...oto (e.g.: *payee*: alpagoto)

eel, angilo; (as food), ~aĵo; **eelgrass**, zostero; **eelpout**, zoarco; **conger eel**, kongro; **electric eel**, gimnoto; **mud eel**, sireno

eerie, **eery**, mistera

efface, (rub out, erase), forviŝi [tr], ne-

niigi; (make inconspicuous, withdraw), retiri (sin); **self-effacing**, sinretirema, malegoisma

effect, (thing brought about, caused), efiko; (efficacy), ~eco; (impression, as on spirit, senses), efekto; (sci phenomenon), ~o, fenomeno (e.g.: *the Hall effect*: la ~o [or] fenomeno de Hall); (bring about), estigi, efektiviĝi, kaŭzi [tr]; **effects**, (possessions), havaĵoj, posedaĵoj; **effective**, (having effect, operative, active), ~a; (real, actual), efektiva; **effectiveness**, ~eco; **effectual**, ~a; **effectuate**, efektiviĝi; **aftereffect**, post~o; **sound effects**, sonefektoj; **have an effect (on)**, ~i [int] (sur ~on, ĉe ~o); **in effect**, efektiva, valida; efektive; **go into effect**, **take effect**, ek~i [int], efektiviĝi; validiĝi; **put into effect**, **give effect to**, efektiviĝi, realigi, validigi; **to the effect (that)**, (w the meaning, sense), kun la senco (ke) (e.g.: *an indication to the effect that the plan is approved*: indiko kun la senco ke la plano estas aprobata; *words to that effect*: vortoj kun tiu senco)

effeminate, ineca; **effeminacy**, ~o

effervesce, eferveski [int]; **effervescent**, ~a; **effervescence**, ~o

effete, (decadent, unvigorous), dekadencia; (sterile), sterila

efficacious, efika; **efficacy**, ~eco

efficient, (producing effect w little effort or waste), efika; (mech: high ratio of work done to energy consumed), alt~a, altrendimenta; **efficiency**, (gen), ~eco; (mech), rendimento

effigy, figuraĵo; **hang (someone) in effigy**, pendigi ~on de (iu)

effloresce, (bloom), ekflori [int]; (chem), efloroski [int]; **efflorescence**, ~ado; eflorosk(ad)o; **efflorescent**, ~ada; efloroska

effluence, elflu/(ad)o; ~aĵo; **effluent**, ~aĵo

effluvium, elfluvo

efflux, elflu/(ad)o; ~aĵo

effort, pen/(ad)o, fortostreĉ(ad)o; **effortless**, sen~a; **make an (the) effort**, klopodi [int]; **make every effort**, klopodi laŭbele

effrontery, aŭdaco, impertinenteco
effusive, sinverŝa, emociverŝa
efreet, **efrit**, **efrite**, **efrito**
eft, trituro
egalitarian, egal/isma; ~isto; **egalitarianism**, ~ismo
Egeria, Egeria
egg, (gen), ovo; **egg(s)**, (as food), ~aĵo [note sing]; **egg-cup**, ~ingo; **eggnog**, ~laktajo; **eggplant**, melongeno; **egg roll**, ~rulaĵo; **egg-white**, ~blanko, albumino; **egg-yolk**, ~oflavo; **nest egg**, ŝparaĵo; **scrambled eggs**, ~kirlaĵo, kirlitaj ~oj; **lay egg(s)**, ~umi [int]; **lay an egg**, (flop), fiaski [int]; **egg on**, (incite), instigi [tr]; (goad), inciti [tr]
egis, [see "aegis"]
eglantine, eglanterio
ego, egoo; **egocentric**, ~centra; **egomania**, ~manio; **egomaniac**, ~mania; ~maniulo; **ego(t)ism**, ~ismo; **ego(t)ist**, ~isto; **egotistic(al)**, ~isma; **superego**, super~o
egress, (act), eliro; (right), ~rajto; (place), ~ejo
egret, egretbirdo [cp "aigrette"]
Egypt, Egipt/io; **Egyptian**, ~o; ~a; ~ia
eh, (interj), ej
Eichornia crassipes, akvohiacinto
eicosane, ejkosano
eider, somaterio, solanaso; **eider-down**, ~a lanugo
Eiffel, Ejfelo; **Eiffel Tower**, ~turo
eight, ok; **eighth**, (8th), ~a; (1/8), ~ono [see § 19]
eightvo, oktavo
eikosane, ejkosano
Einstein, Ejnstejn
einsteinium, ejnstejnjo
Eire, Ejro
either, (one or the oth of 2), iu (ajn) (e.g.: *use either hand*: uzu iun [or] iun ajn manon); (each), ĉiu (e.g.: *she had a tool in either hand*: ŝi havis ilon en ĉiu mano); **either ... or**, aŭ ... aŭ (e.g.: *take either the cookies or the cake*: prenu aŭ la keksojn aŭ la kukon; *either he'll do it or he won't*: aŭ li faros ĝin aŭ li ne faros; *either go or stay*: aŭ iru aŭ restu); **not either**, (also not), nek, ankaŭ ne (e.g.: *if you don't go, I*

won't either: se vi ne iros, nek mi iros [or] ankaŭ mi ne iros; *he has no friends, and no family either*: li havas neniujn amikojn, nek familion [or] li havas nek amikojn nek familion); (colloq: indeed not), ja ne (e.g.: *It's mine. It isn't either!*: Ĝi estas mia. Ĝi ja ne estas!); **either-or**, (consisting of 2 alternatives), duera (e.g.: *a black-and-white, either-or situation*: nigra-blanka, duera situacio)
ejaculate, (sperm), ejakuli [int]; ~aĵo; (cry out), ekkrii [tr]
eject, elĵeti [tr], elpeli [tr]; **ejection seat**, ~ilo
ejective, (phon), ejektivo
eke, pliigi; **eke out**, (living), pene gajni (vivon), pene vivadi [int]; (use frugally), ŝpare uzi [tr]
el, (elevated urban train), (supertera) metroo
elaborate, ellabori [tr], kompliki [tr]; ~ita, komplika
Elaeagnus, eleagno; *Elaeagnus angustifolia*, oleastro
elaidate, elaidato; **elaidatic**, ~a
Elaine, Helena
Elam, Elamo
élan, vervo [not "elano"]; **élan vital**, vitala elano
Elaphrus, elafro
elapid, elapo
Elaps, elapo; *Elaps corallinus*, koralserpento; *Elapinae*, ~enoj
elapse, pasi [int]; **elapsed time**, ~inta tempo
elasmobranch, elasmobranko
Elasmobranchii, elasmobrankoj
elastic, elasta; ~aĵo; **elasticity**, ~eco; **elasticize**, ~igi
elastin, elastino
elastomer, elastomero
elate, ekzalti [tr]
elater, elatero
Elater, elatero; *Elateridae*, ~edoj
elaterium, elaterio
Elatine, elatino
Elba, (Insulo) Elbo
Elbe, (Rivero) Elbo
elbow, (gen), kubuto; ~umi [tr]; (pipe), genutubo
Elbrus, Elbruso

- elder**, (older), pli aĝa; pliaĝulo; (rel), presbitero; (bot: *Sambucus*), sambuko; **elderly**, maljuna; maljunuloj; **eldest**, plej aĝa; **dwarf elder**, (*S. ebulus*), ebulo
- elderberry**, (plant), sambuko; (berry), sambuka bero
- El Dorado**, Eldorado
- Eleagnus, [see "*Elaeagnus*"]
- Eleanor**, Eleonora
- elecampane**, inulo
- elect**, (choose, approve by vote, gen), elekti [tr]; (to parliament etc.; depute), deputi [tr]; **election**, ~o; **byelection**, **primary election**, krom~o; **elective**, (re office to which one is elected), ~a; (optional, gen), ~ebla; ~eblaĵo; (esp re school subject), fakultativo; fakultativa; **elector**, ~anto; **Electors**, (of emperor), princo~isto; **electorate**, ~antaro; **electoral**, ~a; **electoral college**, kolegio de ~antoj
- electret**, elektreto
- electric**, **electrical**, elektra; **electricity**, ~o; **electrician**, ~isto; **electrify**, (give electric charge, as to a fence), ~i [tr] [cp "charge"]; (provide electricity, as to a city), ~izi [tr]; **isoelectric**, izo~a; **photoelectric**, lum~a; **piezoelectric**, piezo~a; **static electricity**, statika ~o; **thermoelectric**, termo~a; **thermoelectric couple**, **thermoelectric pile**, termo~a pilo; **triboelectric**, tribo~a
- electro-**, (pfx: elec), elektro-
- electrocute**, (gen), elektrokuti [tr]
- electrode**, elektrodo
- electrolysis**, elektrolizo; **electrolytic**, ~a; **electrolyze**, ~i [tr]
- electrolyte**, elektrolito
- electrometer**, elektrometro; **electrometric**, ~a
- electromotive**, elektromova
- electron**, elektrono; **electron-volt**, ~volto
- electronic**, elektronika; **electronics**, ~o; **electronic data processing**, (abb: EDP), komputorado
- electrophoresis**, kataforezo
- electrophorus**, elektroforo, plat~kon-densilo
- Electrophorus, (zool), gimnoto
- electroplate**, galvanizi [tr]
- electroscope**, elektroskopo
- electrotropism**, elektrotropismo
- electrotype**, elektrotipo; ~igi; **electrotypic**, ~a; **electrotypy**, ~io
- electrum**, elektrumo†
- electuary**, elektuario
- elemosynary**, (charitable), karitata; (supported by charity), ~apogata
- elegant**, eleganta; **elegance**, ~eco; **inelegant**, mal~a, kruda
- elegy**, elegio
- element**, (gen), elemento; **elemental**, **elementary**, ~a; **elements**, (weather), vetero; (basics), aboco, rudimentoj; **thermoelement**, termo~o; **trace element**, (in organism), oligo~o, spur~o; **be out of one's element**, esti ekster sia medio
- eleo-**, (chem pfx), eleo-
- elephant**, elefanto; **elephantiasis**, elefantiazo; **sea elephant**, mar~o; **white elephant**, senutilaĵo, multekosta balasto
- Elephantine**, Elefantino
- Elephas, elefanto; Elephas primigenius, mamuto; Elephantidae, ~edoj
- Eletteria cardamomum, kardamomo
- Eleusis**, Eleŭziso; **Eleusinian**, ~a
- elevate**, (lift, raise, gen), levi [tr]; **elevation**, (lifting), ~(ad)o; (height, as above sea level, ground level, etc.), alteco; **elevated**, ~ita; (dignified), digna; **elevator**, (for people etc.), lifto; (hoist), elevatorio; (of plane), empen-erono; (for grain storage), grenpro-vicejo
- elf**, elfo
- Eli**, Elio
- Eliana**, Eliana
- Elias**, (modern name), Eliĝo; (Bib), Elija
- elicit**, elvoki [tr], eltiri [tr]
- elide**, elizii [tr]
- Eliezer**, Eliezero
- eligible**, (fit to be chosen), elektebla; (having right), rajtanta; **eligible person**, ~ulo; rajtanta
- Elijah**, (modern name), Eliĝo; (Bib), Elija
- eliminate**, elimini [tr]
- Elinor**, Eleonora

Elisabeth, Elizabeta
Elisha, Eliša
elision, elizio
elite, elito; ~a
elixir, eliksiro
Eliza, Eliza
Elizabeth, Elizabeto
elk, (Eŭropea) alko
ell, (L-shaped pipe joint etc.), genu(tubo); (unit of measure), ulno [length varies]
Ellen, Helena
ellipse, elipso; **elliptical**, ~a
ellipsoid, elipsoido
Ellis, Eliša
elm, ulmo
elocution, elokucio
Elohim, Elohim; **Elohist**, ~isto; **Elohistic**, ~a
Eloise, Heloiza
elongate, (pli)longiĝi; ~iĝi
elope, (kun)forkuri [int]; **elopement**, ~o
eloquent, elokventa; **eloquence**, ~eco
Elsa, Ilza
El Salvador, Salvadoro
else, (different, other; otherwise), alia; ~e (e.g.: *someone else*: iu ~a; *where else could it be?*: kie ~e ĝi povus esti?; *eat, or else you'll be hungry*: manĝu, aŭ ~e vi malsatos); (still more), ~a, ankoraŭ (e.g.: *do you want anything else?*: ĉu vi volas ion ~an [or] ankoraŭ ion?); **else's**, (possessive), [rephrase w "de" (e.g.: *that is someone else's umbrella*: tiu ombrelo estas de iu ~a)]; **elsewhere**, ~loke(n); **or else!**, (threat), aŭ ve! (e.g.: *clean your room or else!*: purigu vian ĉambron aŭ ve!)

Elsinore, Elsinoro
elucidate, klarigi, prilumi [tr]
elude, eviti [tr], eskapi [tr, int] (-on, de -o); **elusive**, eskapema, nekaptebla
elutriate, elui [tr]
elver, angilido
Elvira, Elvira
Elymus, elimo
Elysium, Elizeo; **Elysian**, ~a
elytron, elitro
Elzevir, elzevira; **Elzevir type**, **Elzevir book**, ~o

em, (unit of font or type size), kadrato; (pica, 1/6 inch), sesoncolo
emaciate, marasm/iĝi; **emaciated**, ~a; **emaciation**, ~o
emanate, emani [int]; ~iĝi
emancipate, emancipi [tr]
emancipist, (Aus), ekspunlaborulo
Emanuel, Emanuelo
emasculate, (castrate), kastro [tr]; (weaken), debiligi
embalm, balzami [tr], en~iĝi
embankment, (dike), digo; (slope of road fill, trench, etc.), taluso
embargo, embargo; ~i [tr]
embark, (get on ship), enŝipiĝi; (on plane), enaviĝi; (start out, as on journey, gen), ekiri [int]; **disembark**, elŝipiĝi; elaviĝi; **embark upon**, (undertake, begin), entrepreni [tr], komenci [tr]
embarrass, (gen), embarasi [tr]; **embarrassment**, ~o; **embarrassing**, ~a
embassy, ambasado
embattle, fortikiĝi
embayment, kreko
embed, (set in, gen), enfiksi [tr]; (ornament, as jewel etc.), inkrusti [tr]
embellish, ornami [tr]
ember, braĝ/ero; **embers**, ~o [note sing]
Emberiza, emberizo; **Emberiza hortulana**, hortulano
embezzle, malversacii [tr]; **embezzlement**, ~o; **embezzler**, ~into
embitter, amarigi
emblazon, blazoni [tr]
emblem, emblemo
embody, enkorpiĝi; **disembody**, elkorpiĝi [cp "discarnate"]
embolism, embolio
embolus, embolo
emboss, reliefiĝi; (by chiseling), bosi [tr]
embouchure, (mus: mouthpiece), buŝ/aĵo; (method of applying mouth to mus instrument), ~tekniko
embrace, (clasp in arms, hug), brakumi [tr]; ~o; (enclose, gen), ĉirkaŭpreni [tr]; (w some pressure), ĉirkaŭpreni [tr]; (include, extend to), ampleksi [tr]; amplekso
embrasure, embrazuro [cp "crenel"]

embrocate, embrokacii [tr]; **embrocation**, ~o
embroider, brodi [tr]; **embroidery**, ~ado; ~aĵo; **embroidery hoop**, (~aĵa) tamburino
embroil, impliki [tr]
embryo, embrio; **embryogeny**, **embryogenesis**, ~ogenezo; **embryogenetic**, **embryogenic**, ~ogeneza; **embryology**, ~ologio; **embryological**, ~ologia; **embryologist**, ~ologo; **embryonic**, ~a; ~eca
emcee, programestro; ~i [tr]
emeer, emiro
emend, revizii [tr]; **emendation**, ~o; ~aĵo
emerald, smeraldo; ~a
emerge, (come out of, gen), eliĝi (de); (from specific medium or state), eliĝi (e.g.: [from water], elakviĝi; [from chaos], elĥaosiĝi); (from any liquid; opp "submerge"), emerĝi† [int], malmerĝiĝi; (re light, as from transparent medium), emerĝi [int]; (appear, lit or fig), aperi [int]; **emergence**, ~o; emerĝo†; apero
emergency, kriz(okazo); ~a; **state of emergency**, ~ostato
emeritus, emerito; ~a
emersed, malmerĝiĝinta; **emersion**, ~o [see "emerge"]
emery, (mineral), smirgo; **emery paper**, ~a papero; **emery wheel**, ~a rado
Emery, (man's name), Emeriko
emesis, vom/ado; **emesis basin**, ~ujo
emetic, emetiko, vomigenzo; ~a
emetine, emetino
emeu, emuo
-emia, (med sfx), ~emio; **-emic**, ~a
emigrate, (gen), elmigri [int]; (for pol reason), emigri [int]; **emigration**, ~(ad)o; (pol), emigracio, emigr(ad)o; **emigrant**, ~into; emigrinto
émigré (gen), elmigrinto; (for pol reason), emigrinto
Emil, **Émile**, Emilo
Emilia, Emila, ~ino
eminent, (outstanding, noteworthy), eminenta; (rising above), elstara; **eminence**, ~eco; elstarajo; elstareco; (title of cardinal), eminenco; **preemi-**

ment, supera, super~a, (super)elstara; **be eminent**, ~i† [int]
emir, emiro; **emirate**, ~lando; **United Arab Emirates**, Unuiĝintaj Arabaj E~landoj
emissary, reprezentanto, sendito
emit, (give off, gen), eligi, ellasi [tr], elsendi [tr]; (§: issue), emisii [tr]; **emission**, ~(aĵ)o, ellas(aĵ)o, elsend(aĵ)o; emisiaĵo; **emitter**, (tech), elsendilo; **nocturnal emission**, dumdorma ejakulo
Emma, Emma
Emmanuel, Emanuelo
Emmaus, Emauso
Emmery, Emeriko
emmetropia, eĉmetrop/eco; **emmetropic**, ~a
Emmy, Eminjo
emollient, moliga; ~enzo
emolument, lukraĵo
Emory, Emeriko
emotion, emocio; **emotional**, ~a, ~iĝema; **emotionalism**, ~emo; ~eco; **emote**, ~umi [int]; **emotive**, ~a
empale, [see "impale"]
empanel, [see "impanel"]
empath, klarsent/ulo; **empathy**, (having feeling for), kunsentado; kunsentemo; (psychic), ~ado; **empathize**, kunsenti [int]; **empathic**, ~a; kunsentema; **empathetic**, kunsentema
Empedocles, Empedoklo
empennage, empeno
emperor, imperiestro [cp "imperator"]
Empetrum, empetro
emphasis, emfazo; **emphatic**, ~a; **emphasize**, ~i [tr]
emphysema, emfizemo; **emphysematous**, ~a
empire, (pol), imperio; (furniture), empiro; empira
empiric, empiri/ulo; **empirical**, ~a; **empirical experi ence**, ~o; **empiricism**, ~ismo; **empiricist**, ~isto
emplacement, (mil), (kanona) nesto, sidejo
employ, (hire person), dungi [tr]; (use), uzi [tr], utiligi, apliki [tr]; **employe(e)**, ~ito; **employer**, ~into; ~anto; **employment**, (hiring), ~ado; ~eco; (a job), ofico; (profession), pro-

fesio; (number, %age of employed persons), ~iteco (e.g.: *a period of high employment*: periodo de alta ~iteco); **employment agent**, ~agenteo; **employment agency**, ~agentejo; **self-employed**, mem~ita; **unemployed**, senofica, senlabora; **unemployed person**, senlaborulo, senoficulo; **unemployment**, senlaboreco; **unemployment compensation**, mal~a kompenso, mal~a mono; **be employed (in, as)**, ofici [int] (en, kiel) [see "do"]

emporium, (bsns center), emporio; (large store, department store), magazeno

empower, (give right, authorize), rajtigi; (commission), komisii [tr]

empress, imperiestrino

empty, (not full), malplena; ~igi; ~iĝi; (vacant), vaka

empyema, empiemo

empyrean, empireo; ~a; **empyrean**, ~a empyreuma, empireŭmo

emu, emuo

emulate, (imitate), imiti [tr]; (rival), rivali [int] (kun)

fall, (drop, go down, gen), fali [int]; ~igi; ~(ig)o; (autumn), aŭtuno; aŭtuna; (occur), okazi [int] (e.g.: *Christmas fell on Wednesday*: Kristnasko okazis je merkredo); (be divided), dividiĝi (e.g.: *fall into 3 types*: dividiĝi en 3 specojn); (become), (far)igi, ~igi [sfx] (e.g.: *fall behind*: malantaŭiĝi; *fall due*: pagendiĝi) [see also "become"]; (waterfall), akvo~o; **fall back**, (withdraw), sin retiri, retiriĝi; **fall back on**, sin turni al; **fall for**, (fall in love w), enamiĝi (je, por); (be fooled by), trompiĝi (de, far); esti trompita de; **fall afoul of**, implikiĝi en; **fall in**, (collapse), en~i [int]; (mil etc.: into formation), enviciĝi; **fall in with**, kuniĝi kun; **fall off**, (decrease), malpliĝi; **fall (up)on**, (attack), ataki [tr]; (come upon), (al)veni al; **fall out**, (quarrel), kvereli [int]; (pass out), senkonsciĝi; (mil), elviciĝi; **fallout**, (e.g., radioactive), el~aĵo; **fall short**, (be not enough), nesufiĉi [int]; malsuperi [tr], maltrafi [tr] [see also "fail"]; **fall through**, (fail), malsukcesi [int]; **freefall**, liber~o; **shortfall**, nesufiĉo

fallacious, (erroneous), erara; (deceptive), ~iga, trompa; **fallacy**, ~o

fallible, erariva; **infallible**, ne~a

fallow, novala; **fallow ground**, ~o; **lie fallow**, ~i [int]

false, falsa; **falsify**, ~i [tr]; **falsehood**, (lie), mensogo; **falsies**, ~mamoj

falsetto, falseto; ~a; ~e

falter, (stumble, lit or fig), stumbli [int]; (waver), ŝanceliĝi; ŝanceliĝo; (hesitate), heziti [int]; hezito

Faluns, faluno

fame, renomo, famo

familiar, (well-known), kon/ata; (informal), neformala, hejm(ec)a; (common, often), ofta; **familiar with**, ~anta; **be familiar with**, ~i [tr]

family, familio; ~a; **familial**, ~a

famine, malsatego

famish, malsategi [int]; ~igi; **be famished**, ~i

famous, fama, renoma; **infamous**, ~aĉa, mis~a, fi~a; **infamy**, ~aĉo, mis~o, fi~o; (poet), infamio

fan, (move air, gen), ventumi [tr]; (ventilate), ventoli [tr]; (simple device or machine), ~ilo; (ventilator), ventolatoro; (devotee), amanto, adepto, fervorulo; **fanjet**, turbinojeto; **fantail**, (fan-shaped tail or similar object), ~vosto

fanatic, fanatika; ~ulo; **fanatical**, ~a [cp "zealot"]

fancy, (image; imagine), imago, fantazio; ~i [tr], fantazii [tr]; (caprice, whim), kaprico; (fondness), ŝato; (extravagant), ekstravaganca; (decorated), ornamita; (elaborate), ellaborita; (skillful), lerta; **strike one's fancy**, plaĉi ies kapricon

fandango, fandango

fanfare, fanfaro

fang, dent(eg)o

fantasia, fantazio

fantastic, (amazing), miriga; (re fantasy), fantazia; (incredible), nekredobla; (re lit style), fantasta

fantasy, (imagination, fancy; creation of same; mus), fantazio; (psych: esp to escape reality), fantasmof; (lit style), fantasto

far, (distant), malproksima, fora, (poet), lontana; ~e(n); ~e(n), for(en), lontane(n); (adj: more distant), pli ~a (e.g.: *the far side of the room*: la pli ~a flanko de la ĉambro); (beyond), pretera (e.g.: *the far side of Luna*: la pretera flanko de Luno); (much), multe (e.g.: *far better*: multe pli bona); **faraway**, tre ~a; **farfetched**, malprobabla, nekredinda; **far-off**, tre ~a; **far-sighted**, (of good judgment), sagaca; (re eyes), hipermetropa; **farther**, (more distant), pli ~a; pli ~e(n); (beyond), transa, pretera; (in addition, further), plu; **farthest**, plej ~a; plej ~e(n); **as far as**, [see under "as"]; **by far**, je multo; **far and wide**, vaste kaj dise; **how far (away) is ...?**, kiom longe for estas ...?; **so far**, (to now), ĝis nun; (to then), ĝis tiam; **that far**, tiom; tien; **this far**, ĉi tiom; ĉi tien; **far be it from me to**, mi eĉ ne pensus

pri, mi eĉ ne konsiderus

farad, farado; **faradize**, faradizi [tr]; **abfarad**, ab~o; **microfarad**, mikro~o

farandole, farandolo

farce, farso; **farical**, ~(ec)a

fare, (travel cost), veturprezo; (do, get along), farti [int] (e.g.: *how did you fare on your trip?*: kiel vi fartis dum via vojaĝo?); (passenger), pasaĝero, (vetur)kliento; (food), nutraĵo; **farewell**, adiaŭo; adiaŭa; (interj), adiaŭ!; fartu bone! [see also "good: goodbye"]

farina, (as cereal etc.), farun/aĵo; **farinaceous**, ~a

farm, (land and buildings, gen), bieno; (rented), farm~o; (small, one-family), et~o; (large), grand~o [cp "plantation"]; (cultivate, gen), kultivi [tr]; (on land rented from oth person), farmi [tr]; **farmer**, (ter)kultivisto; (renter), farmisto; **farming**, (ter)kultivado; farm(ad)o; **farm out**, (lit), farmigi; (fig: delegate), delegi [tr]

far, farao [cp "pharaoh"]

Faroe, [see "Faeroes"]

farouche, sovaĝa, senkultura

farrago, miksamaso

farrier, hufferisto

farrow, (pig litter), porkidaro

Farsi, (la) Persa (lingvo) [cp "Parsee"]

fart, furzi [int]; el~i [tr]; ~o

farthing, kvaronpenco

fasc, fasko

fascia, (strip, band), strio; (anat), fascio

fascicle, (of book), fasko; (bot), ~eto

fascicule, fasciculus, kajero

fascinate, fascini [tr]; **fascination**, ~ado; **fascinating**, ~a

fascine, fasĉino

Fasciola, fasciolo

fascism, faŝismo; **fascist**, ~a; faŝisto

fashion, (make, form, gen), formi [tr]; (shape a garment), fasoni [tr]; (shape garment or oth object by cutting etc.), tajli [tr]; (manner), maniero; (style), modo; **fashionable**, in fashion, laŭmoda; **out of fashion**, old-fashioned, eksmoda, malmoderna; **after a fashion**, (somewhat), iom; ioma

fast, (rapid), rapida; ~e; (firm, stuck), firma, fiksita; (resistant, ~proof), imu-

- na, eltena (e.g.: *fast color*: paliĝimuna koloro; *acid-fast bacilli*: acidimunaj baciloj); (loyal), lojala; (re clock), frua (e.g.: *the clock is 5 minutes fast*: la horloĝo estas 5 minutojn frua [or] la horloĝo fruas 5 minutojn); (promiscuous), malĉasta, diboĉema; (deep), profunda (e.g.: *fast asleep*: profunde dormanta; *ocean fastnesses*: oceanaj profundoj); (not eat), fasti [int]; fasto; **fastness**, (stronghold), fortikaĵo; (depth), profund(aĵ)o; **make fast**, (fasten), fiksi [tr]
- fasten**, (attach, gen), fiksi [tr]; (tie), ligi [tr] [cp "lock", "buckle", "glue", etc.]; **fastener**, **fastening**, ~ilo
- fastidious**, precioza, elektema, neplaĉiĝema
- fat**, (grease, fatty tissue), graso; ~a; (thick, corpulent, obese), dika, korpulenta; (fertile), fekunda; fekundeco (e.g.: *the fat of the land*: la fekundeco de la tero); (lucrative), lukra; **fatback**, dors-o
- fatal**, (of or causing death), morta, perega; (of fate), fatala; **fatalism**, fatalismo; **fatalist**, fatalisma; fatalisto; **fatality**, (death), ~o; (causing death), ~igivo; (fate), fatalo [see also "fate"]
- fata morgana**, fatamorgano
- fate**, (power determining events), fatalo (e.g.: *fate seemed to thwart her efforts*: la ~o ŝajnis obstrukci ŝiajn penojn); (individual outcome, lot, luck), sorto (e.g.: *he met a terrible fate*: li trafis teruran sorton); (destine), destini [tr] (e.g.: *she was fated to inherit the house*: ŝi estis destinata heredi la domon); **Fate**, (myth), F~o; **fateful**, ~a
- father**, patro; (beget, become father of), generi [tr], naskigi; (act like father toward), ~umi [tr], ~i [int] al; **forefather**, pra~o, praulo; **stepfather**, duon~o; **father-in-law**, bo~o; **fatherland**, ~io, ~olando; **godfather**, bapto~o
- fathom**, (unit), klafto [1,83 metroj; see § 20]; (measure depth), sondi [tr]
- fatigue**, (tire), lac/igi; ~igi; ~eco; **fatigued**, ~a; **fatigues**, (mil clothing), batalvestoj
- fatuous**, malsaĝa, stulta, idiota, ventkapa
- faucet**, krano
- fault**, (blame), kulpo; ~igi; (flaw), difekto, misaĵo; (geol), faŭlto; **faulty**, misa, difektita, neperfekta; **faultless**, perfekta, sendifekta; **at fault**, ~a; **find fault (with)**, ~igi; **to a fault**, ekscese, tro
- faun**, faŭno
- fauna**, faŭno
- Faunus**, Faŭno
- Faust(us)**, Faŭsto
- fauvism**, faŭvismo
- faux pas**, misfaro, mispaŝo, sentaktaĵo
- favo(u)r**, favoro; ~i [tr]; **favorable**, ~a; **unfavorable**, mal~a; **avored**, ~ata; **disfavor**, mal~o; **in favor of**, ~e al; **out of favor**, ne~ata, ne plu ~ata
- favo(u)rite**, (preferred), prefer/ata; ~aĵo; ~ato; (favored person, thing), favorato; **favoritism**, favoratismo
- favus**, favo
- fawn**, (young deer), cervido; (yellowish brown), flavbruneta; (act servilely), lakei [int], flataĉi [tr]
- fax**, faksi* [tr]; (faxed copy), ~aĵo; **fax machine**, ~atoro [cp "facsimile"]
- fear**, timi [tr]; ~o; **fearful**, ~anta; ~iga; **fearsome**, ~iga, terura
- feasible**, (practicable), praktikebla, efektivegebla, farebla; (suitable), taŭga
- feast**, (banquet), festeno; ~i [int]; (festival, celebration), festo [cp "festival"]
- feat**, atingo, bravaĵo, heroaĵo
- feather**, (of bird), plumo; ~izi [tr]; (turn blade of oar, propeller), platiĝi; **featherbedding**, laborremburado
- feature**, (appearance), aspekto; (outstanding, salient aspect), trajto; elstarajo; (main event, item, etc.), ĉef-[pfx] (e.g.: *feature event*: ĉefevento; *feature film*: ĉeffilmo); (display), reliefigi, emfazi [tr], elstarigi; (present as a feature), prezenti [tr]; (section of newspaper, magazine, etc., on certain subject), rubriko, felieton(aĵ)o; **feature-length**, plenlonga
- febrifuge**, kontraŭfebra; ~aĵo
- febrile**, febra; **be febrile**, ~i [int]
- February**, februaro

feces, feko; **fecal**, ~a
feckless, (ineffective), senefika, malforta; (irresponsible), malzorgema
fecund, fekunda
federal, federacia, (esp re U.S.), federala; [cp "federate"]; **federalism**, ~ismo; **federalist**, ~isma; ~isto
federate, federi [tr]; ~iĝi; **federation**, (act), ~(iĝ)o; (pol unit), federacio [cp "federal"]
fee, (honorarium), honorario (e.g.: *we offer a fee of \$100 for your talk*: ni proponas ~on de \$100 por via prelego); (toll; fee for service), takso (e.g.: *the park requires an entrance fee*: la parko postulas enirtakson) **fee simple**, absoluta posedrajto; **fee tail**, limigita posedrajto
feeble, febla, malforta
feed, (give food, or provide in manner of food), nutri [tr]; ~(ad)o (e.g.: *feed the cat*: ~i la katon; *the event fed his anger*: la evento ~is lian koleron; *feed the engine more gas*: ~i al la motoro pli da benzino; *feed data to the computer*: ~i datenon† al la komputoro; *paper feed*: paper ~o); (eat), sin ~i, manĝi [tr]; (food, or analogous act, substance), ~ado; ~aĵo; (provide, gen), provizi [tr]; **feeder**, (tube, elec cable etc.), fidro; (that feedss, e.g., tributary stream), ~a; **feedback**, (elec or fig), retro~o, retrokupi(ad)o; **bio-feedback**, bioretrokuplo; **feed bag**, ~osako; **force-feed**, ŝtop~i [tr]; **fed up**, trosatigita, senpacienca
feel, (have sensation or emotion), senti [tr]; ~o (e.g.: *I feel sand in my shoes*: mi ~as sablon en miaj ŝuoj; *how do you feel about that idea?*: kiel vi ~as pri tiu ideo?; *I feel sick*: mi ~as (min) malsana); (give impression), impresi [tr] (-e) (e.g.: *the air feels cold*: la aero impresas malvarme) [see also "feel like" below]; (grope, palpate), palpi [tr]; palp(ad)o (e.g.: *feel one's way through the dark*: palpi sian vojon tra la mallumo; *do it by feel*: fari ĝin per palpado); **feeler**, (as on insect), palpilo; (to sound out opinion, reaction, etc.), sondilo; **feeling**, (a sensation), ~o; (basic sense), ~ivo;

(emotion), ~emo, emocio; **feel like**, (give impression of), impresi kiel (e.g.: *that feels like rubber*: tio impresas kiel kaŭĉuko); (be inclined to), emi [tr], inklini [int] (al) (e.g.: *Do you feel like taking a walk?*: Ĉu vi emas [or] inklinas fari promenon?; *No, I don't feel like it*: Ne, mi ne emas tion [or] ne inklinas al tio; *I feel like [eating] a sandwich*: mi inklinas al sandviĉo); **feel out**, (sound out opinion etc.), sondi [tr], opinisondi [tr]; **feel up to**, ~i sin kapabla; **hurt one's feelings**, dolorigi ies ~ojn

feign, ŝajnigi

feint, (fake attack), finti [int]; ~o; (sham), ŝajnigo

feldspar, feldspato

Felicia, Feliksa

felicitate, gratuli [tr]

felicitous, taŭga

felicity, (happiness, good fortune), felicio

feline, (any animal of *Felidae*), feliso; ~a; (informal: re cats, gen), kato; kata
 Felis, feliso; *Felidae*, ~edoĵo

Felix, Felikso

fell, (knock, cut down), faligi; (terrible), terura, kruela; (hide), felo; (hill), monteto, altaĵo

fellah, felaho

fellatio, penislekado

fellow, (man or person, gen, colloq), ulo; (comrade), kunulo, kamarado; (one of several similar), kun-, sam-[pfx] (e.g.: *fellow artists*: kunartistoj; *our fellow countrymen*: niaj samlandanoj); (member of learned society etc.), asociito, ano; **fellowship**, (companionship), kamaradeco, kunuleco; (group), societo, (ge)frataro; **bedfellow**, litkunulo

felon, (ĉef)krimulo; **felony**, ~o; **felonious**, ~a

felspar, feldspato

felt, (fabric), felto; ~a; (make into felt), ~i [tr]; (cover w felt), ~izi [tr]

felucca, feluko

female, (gen), ina; ~ulo; (bot, zool), femala; femalo

feminine, (womanly), virin(ec)a; (gram gen der; of female sex gen), in(seks)a,

femala; **feminism**, feminismo; **feminist**, feminisma; feministo
femur, femurosto, femuralo [not "femuro"]

fen, marĉo

fence, (barrier), bari [tr]; ĉirkaŭ~i [tr]; ~ilo; (sport), skermi [int]; (deal in stolen goods), riceli [tr]; ricelisto; ricelejo; **fencing**, ~ilaĵo; skermado; ricela

fend, **fend off**, rezisti [tr], forturni [tr]; **fend for (oneself)**, provizi por (si mem)

fender, (over vehicle wheel), kotŝirmilo; (on ship, wharf, front of streetcar, etc.; any buffer), bufro; (firescreen), fendro

fennel, fenkolo

fennelflower, nigelo

fenugreek, fenugreko

feral, sovaĝa

Ferdinand, Ferdinando

fermata, fermato

ferment, (lit or fig), fermenti [int]; ~igi; (substance), ~o; (process), ~(ig)ado

fermi, mikronanometro [not "fermio"]

fermion, fermiono

fermium, fermio

fern, filiko

Fernando, Fernando

ferocious, kruel(eg)a, (poet), feroca; **ferocity**, ~eco, feroceco

Ferrara, Feraro

ferrate, ferato

ferret, (zool), mustelo; (search out), elserĉi [tr]

ferric, (of iron, gen), fera; (valence 3), ~ika

ferricyanide, fericianido [cp "ferrocyanide"]; **ferricyanic acid**, ~ida acido

ferriferous, ferhava

ferrite, (chem, gen), ferito

ferro-, (chem pfx), fer(o)-

ferrocyanide, ferocianido [cp "ferricyanide"]; **ferrocyanic acid**, ~a acido

ferrous, (re iron, gen), fera; (valence 2), ~oza

ferrule, metalpinto

ferry, (boat or analogous spacecraft), pramo; (large), ~ŝipo; (carry in or as in a ferry), ~i [tr]

fertile, fekunda; **fertility**, ~eco; **fertilize**, (gen), ~igi; (treat soil w fertiliz-

er), grasumi [tr]; (w manure), sterki [tr]; **fertilizer**, grasumo; (manure), sterko; **infertile**, mal~a

Ferula, ferolo

fervent, **fervid**, fervora, arda; **fervor**, ~o, ardo

fescue, festuko

fester, (form pus), pusi [int]; ~igi; (fig: embitter), amariĝi; amariĝi

festival, festivalo; ~a; (festive), festa [cp "fair", "party"]

festive, festa; **festivity**, ~o

festoon, festono; ~i [tr]

Festuca, festuko

fetch, (bring object), (al)porti [tr]; (bring person), venigi [see "bring"]; **fetching**, (attractive), ĉarma, alloga, pimpa

fête, festo; ~i [tr]

fetid, fetora; **fetid odor**, ~o

fetish, fetiĉo; **fetishism**, ~ismo; **fetishist**, ~isma; ~isto

fetlock, superhufaĵo

fetor, fetoro

fetter, (pied)kateno; ~i [tr]

fetus, feto; **fetal**, ~a

feud, kverel/(ad)ji [int] ~ado [not "feŭd-"]; (blood feud), vendetto

feudal, feŭda; **feudalism**, ~ismo

fever, febro; **feverish**, (having fever), ~a; (frenetic), freneza; **be feverish**, ~i [int]; **aphthous fever**, afta ~o; **boutonneuse fever**, butona ~o; **hay fever**, fojnkatara, fojn~o; **parrot fever**, psitakozo; **puerperal fever**, puerpera ~o; **quartan fever**, kvartana ~o; **rheumatic fever**, reŭmata ~o; **scarlet fever**, skarлата ~o; **tertian fever**, terciana ~o; **typhoid fever**, tifoida ~o; **undulent fever**, brucelozo; **yellow fever**, flava ~o

few, malmultaj; **a few**, kelkaj; **few and far between**, ~aj kaj maloftaj

fez, fezo

fiancé(e), fianĉ(in)o

fiasco, fiasko; **be a fiasco**, ~i [int]

fiat, dekreto

fib, mensog(et)o; ~i [int]

fiber, fibro; **fibrous**, ~eca; **fiberboard**, ~otabulo; **fiberglass**, vitro~o; **muscle fiber**, miono

Fiber, (zool), fibero, ondatro

fibre, [see "fiber"]
fibril, fibreto
fibrillate, fibrilacii [int]; **fibrillation**, ~o
fibrin, fibrino; **fibrinogen**, ~ogeno;
plant fibrin, **vegetable fibrin**, vegetaĵa ~o
fibroid, fibra
fibroin, fibroino
fibroma, fibromo
fibroscope, fibroskopo⁺; **fibroscopy**, ~io
fibrosis, fibrozio
fibrositis, fibrito
fibula, (bone), fibulo; (clasp), fibolo
Ficaria, fikario
fickle, facilanima
fiction, fikcio; **fictional**, **fictitious**, ~a, fiktiva; **science fiction**, scienc~o
Ficus, figarbo; **Ficus indica**, banjano; **Ficus sycamorus**, sikamoro
fiddle, (mus), violono; ~i [int]; (dawdle), lanti [int]; **fiddle with**, (mess w inexpertly), (fuŝ) fingrumi [tr]; **play second fiddle**, (fig), ludi la duan rolon
fideicommissum, fideikomiso
fidelity, fidel/eco; **high fidelity**, alt~a; alt~eco
fidget, barakteti [int]
fiduciary, komisia; ~ito
fi, (interj), fi; **fi on you!**, ~ al vi!
fieff, feŭdo
field, (gen), kampo; (of study etc.), fakoo; (tillable), agro; (those competing), konkurantaro; konkurencantaro; konkursantaro [see "compete"]; (catch), kapti [tr]; **field day**, festotago; **fieldfare**, (zool), litorno; **field of vision**, vid~o; **depth of field**, (phot, optics), ~a profundo; **electromagnetic field**, elektromagneta ~o; **gravitational field**, gravita ~o; **infield**, (sports), internakorta; interna korto; **outfield**, eksterakorta; ekstera korto
fiend, diablo, demono; **fiendish**, ~(ec)a
fierce, (savag), feroča, sovaĝa, kruel(eg)a; (violent, furious), furioza; (ardent), arda
fiery, fajra; (ardent), arda
fiesta, festo
fife, fifro; ~i [int]

fifth, (5th), kvina; (1/5), ~ono [see § 19]; (mus), kvinto
fig, (fruit), figo; (tree), ~arbo; **figwort**, skrofulario
Figaro, Figaro
fight, (gen), batali [int] (kontraŭ); kontraŭ~i [tr]; ~o; (w/o weapons; struggle), lukti [int]; lukto; **fighter**, ~isto; (plane), ĉasaviadilo, ĉasavio; **bullfight**, toreĵi [int]; tore(ad)o; **bullfighter**, toreisto; **prizefighter**, boksisito
figment, imag/(aĵ)o; **figment of one's imagination**, kreaĵo de ies ~o
figure, (shape; picture; etc.), figuro, formo [cp "form"]; (numeral), cifero; (sum of \$), (mon)sumo; (calculate), kalkuli [tr]; (estimate, reason), taksi [tr], rezoni [tr] (e.g.: *I figure it's about another hour's drive home*: mi taksas ke estos ĉirkaŭ unu pluan horon hejmen) [also see "figure out" below]; (to be expected), esti atendenda (~e) (e.g.: *since it's snowing, it figures that they'll be late*: ĉar neĝas, estas atendende ke ili malfruos); **figurative**, ~a; **figurhead**, (gen), antaŭ ~o; ("straw man", having little authority), pajlo-homo; **figurine**, ~eto; **figure in(to)**, (include), inkludi [tr], enkalkuli [tr]; (play a part), inkludiĝi, ~i en, roli [int] en, havi rolon en; **figure on**, (trust, depend on), fidi [tr], dependi [int] je; (plan), plani [tr], intenci [tr]; **figure out**, (deduce), dedukti [tr]; (conclude), konkludi [tr], ekkompreni [tr]; (guess), diveni [tr]; (solve), solvi [tr]; (calculate), kalkuli [tr]; **figure up**, (add), sumi [tr]; **figure of speech**, dirmaniero; **disfigure**, mutili [tr], difekti [tr]; **prefigure**, antaŭ~i [tr]; **transfigure**, transformi [tr], aliformi [tr]; **fine figure of a**, bonstatura
Fiji (Islands), Fiĝioj
filament, (gen), filamento
filaria, Filaria, filario [see "Dracunculos", "Wuchereria"]; **filariasis**, ~ozo
filbert, (nut), avelo; (tree), ~arbo
filch, marodi [tr] [cp "maraud"]
file, (dossier; cmpr; folder w information on person, subject), dosiero, teko; (collection of items), teko (e.g.: *address file*: adresoteko); (file away in

dossier, cabinet, etc.), enarkivigi; (column, row), vico; (march etc. in rows), defili [int]; (to distinguish from rank, as in mil formation), laŭvico [cp "rank"]; (scrapping tool), fajli [tr]; fajlilo; (register, record), registri [tr]; **file (filing) cabinet**, ~ŝranko [not "~ujo"; see "folder"]; **files**, (archives), arkivo(j); **filings**, fajlaĵo(j); **card file**, (collection of cards, as index etc.), sliparo; (cabinet for these), slipujo

filet, [see "fillet"]; **filet mignon**, fileeto
filial, fil(in)a

filiation, (relationship), fil(in)eco; gefileco; (descent), deveno; (formation of branch of association), filiigo

filibuster, filibustro*; ~i [int]

Filic(al)es, filikoj

filigree, filigrano; ~i [tr]

Filipendula ulmaria, ulmario

Filipine, [see "Philippine"]

Filix, cistoptero

fill, (gen), plen/igi; ~iĝi; ~igo; ~iĝo; (eating, drinking), satiĝi; satiĝi; sato; (tooth), plombi [tr]; (earthfill for road over valley etc.), talusi [tr, int]; taluso; **filler**, ~igaĵo; ~igenzo; **filling**, (gen), ~igaĵo; (dental: substance used), plombo; (act of), plombado; (result), plombaĵo; **fill in**, ~igi; ~iĝi; (complete), kompletigi; kompletigi; (plug up), ŝtopi [tr]; ŝtopiĝi; **fill out**, ~igi; ~iĝi; kompletigi; kompletigi; (take shape), (~)formi [tr]; (~)formiĝi; dikiĝi; dikiĝi; ŝveligi; ŝveli [int]; (mature), elkreskigi; elkreski [int]; maturigi; maturiĝi; **fill up**, ~igi, ~iĝi; (~)~iĝi; **fill with**, ~igi je; ~iĝi je; **refill**, (any ~ing), re~igi; re~igo; re~aĵo; (reloading, as in ball-point pen), reŝargi [tr]; reŝargo; **fill one in on**, informi iun pri; **eat (drink) one's fill**, ĝisŝate manĝi [tr] (trinki [tr])

fillet, (headband), diademo; (stripe), strio; (meat; arch), fileo; (listel), listelo; (piece to fill groove in tongue-and-groove, rabbet, etc.), foldolistelo

filip, frapeti [tr]

filly, ĉevalidino

film, (phot; a movie), filmo; ~a; ~i [tr]; (any layer), tavolo; (coating), tegaĵo;

filmy, (hazy), neklara, nebuleca; **film-strip**, ~strio; **microfilm**, mikro~o; mikro~i [tr]

filter, filtri [tr]; ~iĝi; ~ilo; **filtrate**, ~aĵo; **filter (tip)**, (cigarette), ~a (cigaredo)

filth, (dirt etc.), malpuraĵo; (fig: words, actions, etc.), fiaĵo, aĉaĵo; **filthy**, malpura(eg); fia, aĉa

filum, filamento

fimbria, fimbrio

fin, (of fish), naĝilo; (object of similar shape, as on plane, radiator, turbine), alo; **finback (whale)**, balenoptero

finagle, ruzaranĝi [tr]

final, (last), fina; (exam), ~ekzameno, ~testo; **final(s)**, (contest etc.), finalo(j); finala; **finalist**, finalulo; **final (draft)**, (as of written material), neto; **semifinal(s)**, antaŭfinalo(j); antaŭfinala; **semifinalist**, antaŭfinalulo

finale, (mus), finalo [cp "fine", "coda"]

finance, financo; ~i [tr]; **financial**, ~a; **financier**, ~isto

finch, (*Fringilla*), fringo; (any of *Fringillidae*), ~edo; **bramble finch**, monto~o; **bullfinch**, pirolo; **pine bullfinch**, pinikolo

find, (locate, discover), trovi [tr]; ~o; ~aĵo; (notice to be true), konstati [tr] (e.g.: *we found it was raining*: ni konstatis ke pluvas); (determine, adjudge), juĝi [tr], decidi [tr], determini [tr] (e.g.: *the judge found him guilty*: la juĝisto juĝis lin kulpa); **finding(s)**, ~aĵo(j); **find out**, (discover, learn), sciiĝi (pri), el~i [tr], malkovri [tr]

fine, (pure, high-quality; close, as fine tuning), fajna; (in very small particles, re dust etc.), subtila; (of good character), brava; (refined, delicate), delikata; (\$ punishment), monpuni [tr]; monpuno; (mus: end), fino [cp "finale"]; (good, excellent), bon(eg)a; **finery**, galanterio

finesse, (skill), lerteco; (cards), fineso

finger, (anat), fingro; (of glove etc.), ~umo; (similar-shaped object), ~aĵo; (touch w fingers), ~umi [tr]; (mus), ~i [tr]; **fingering**, (mus), ~ado; **finger-flower**, **fingerroot**, (bot), digitalo; **finger nail**, [see under "nail"]; **finger-**

print, ~opremi [tr]; ~opremaĵo; **forefinger**, **index finger**, montro~o; **little finger**, orel~o; **middle finger**, mez~o; mez~i [tr]; **ring finger**, ringo~o; **have a finger in**, implikiĝi en, sin miksi en; **light-fingered**, **sticky-fingered**, ŝtelema

finial, finialo†

finicky, (tro)elektema

finish, (end), fini [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (final preparation), ~pretigi; ~pretigo; (final effort in race or oth sporting event), finiŝo†; finiŝi [int]; (polish paper, leather, etc.), apreti [tr]; (substance used to polish paper etc.), apreturo; (coating on any oth material, as wood etc.), tegi [tr]; tegaĵo [cp "polish", "glaze", "lacquer", etc.]; **photofinishing**, fotorivelado; **photo-finisher**, fotorivelisto

Finisterre, Finistero

finite, (math), finia, fajnajta†; ~o, fajnajto†; (gen), limigita, nesenfina; (gram, re verb), finitiva; **infinite**, (gen), nefinia, nefajnajta†; (non-tech), senlima; **infinity**, infinito

finitive, finitivo

Finland, Finn/lando, Suomio; **Finn**, ~o; **Finnish**, ~a; ~landa; **Finno-Ugric**, ~o-Ugra

Finnmark, Finmarko

fiord, fjordo

fir, abio; **cluster fir**, pinastro; **ground fir**, likopodio

fire, (flames), fajro; (set fire to), ~igi; (large), incendio; (ardor), ardo; (opp "hire"), maldungi [tr]; (shoot gun etc.), pafi [tr]; pafiĝi; (re rocket, jet engine), bruligi; ekbruli [int]; (bake, as bricks, pottery, etc.), baki [tr]; bakiĝi; (excite), eksciti [tr]; ardigi; (explode), eksplodi [int]; eksplodigi; **fire alarm**, ~alarm(il)o; brulalarm(il)o; **firearm**, pafarmilo; **fire away** (at), ekpafadi [tr]; **fireball**, (meteor), bolido; **firebox**, ~ujo; **firebrand**, (wood), brulŝtupo; (agitator), agitator; **firebreak**, ~oizolejo; **firebug**, piromaniulo; **firecracker**, petardo; **fire-damp**, grizuo [cp "methane"]; **fire department**, ~obligado; **fire-dog**, morelo, ~ohundo; **fire engine**,

fire truck, ~okamiono; **fire escape**, saveskapejo; **fire extinguisher**, ~estingilo; **firefighter**, **fireman**, ~obligadisto; **firefly**, lampiro; **fire irons**, (fireplace tools), ~opreniloj; **fire-place**, kamento; **fireplug**, ~okranego; **firepower**, pafkapablo; **fireside**, (hearth), ~ejo; (by the fire), apudkamento, apud~a; **firestorm**, incendi-ego; **firetail**, (*Phoenicurus*), fenikuro; **fireweed**, epilobio; **firewood**, brulligno; **fireworks**, ~aĵo(j), piroteknikaĵo(j); **misfire**, (engine), misbruli [int]; misbrulo; (gun), mispafiĝi; mispafado; (malfunction, gen), misfunkcii [int]; misfunkcio; **bonfire**, fest~o, ĝoj~o; **campfire**, kampado~o; **be on fire**, bruli [int]; **catch fire**, ekbruli [int]; **cease-fire**, batalhalto, militpaŭzo; **cross-fire**, enfil(ad)o; **put under cross-fire**, enfil(i) [tr]; **line of fire**, paflinio; **set on fire**, ekbruligi; **sure-fire**, nemaltrafebla; **wildfire**, incendio, ~ego; **spread like wildfire**, disfulmiĝi

firkin, tineto

firm, (steady, fixed, unyielding, gen), firma; (bsns), ~o; **firm up**, ~igi; ~iĝi

firmament, firmamento

firmware, (cmprtr), firmvaro†

firn, firmo

first, unua; ~e [see § 19]; **first aid**, [see under "aid"]; **at first**, komence, ~e; **first of all**, antaŭ ĉio; **first come first served**, ~a venas, ~a prenas; **on a first-come-first-served basis**, laŭ tio ke ~a venas, ~a prenas; **first things first**, ~aĵojn ~e

firth, fjordo, estuaro

fiscal, fiska

fish, (zool, gen), fiŝo; (as food), ~aĵo; (catch), ~i [tr]; (young, for restocking river etc.), alvuso; **fisher**, (person), ~isto; (zool), marteso; **fisherman**, ~isto; **fishery**, ~ado; ~ejo; **fishy**, (colloq: dubious), dubinda; **fish ball**, **fish cake**, ~bulo; **fishhook**, ~hoko; **fish-plate**, relkunigilo; **fishing line**, ~fadeno; **fishing pole**, ~kano; **fish story**, nekredindaĵo, blagaĵo; **fishtail**, (car skid etc.), jori [int]; joro; **bandfish**, cepolo; **catfish**, (gen), barb~o; (Euro-

pean catfish: *Silurus*), siluro; **crayfish**, astako, kankro; **cuttlefish**, sepio; **cuttlefish bone**, sepiosto; **flatfish**, ekzoceto, flug-o; **goldfish**, or-o; **lungfish**, pulmo-o; **monkfish**, skvateno; **needlefish**, belono; **pilotfish**, pilot-o; **porcupine fish**, diodonto; **ribbonfish**, (*Cepola*), cepolo; **rockfish**, (gen, imprecise term), ŝton-o; (*Scorpaenidae*), skorpeno; (*Sebastes*), sebasto; **sawfish**, pristo, seg-o; **scorpion fish**, skorpeno; **sheatfish**, siluro; **shellfish**, konkulo; **starfish**, asterio, marstelo; **swordfish**, spad-o, ksifio; **tunafish**, tinuso; **whitefish**, koregono; **like a fish out of water**, ekster sia medio

fissile, (splittable, gen), fendebila; (phys: fissionable), fisiebla

fission, (split, gen), fend(iĝ)o; (phys: nuclear), fisio

fissure, fend(iĝ)o

fist, pugno; **make a fist**, ~igi la manon;

fist-fight, **fisticuffs**, ~ado

fistula, fistulo

fit, (have right size; go into, onto), (bone) sidi [int] (al, en); sidigi; sidigo (e.g.: *this shirt fits me (well)*: ĉi tiu ĉemizo ~as al mi (bone); *that blouse doesn't fit her well*: tiu bluzo malbone ~as al ŝi; *the screw fits in that hole*: la ŝraŭbo ~as en tiu truon); be appropriate; etc.), taŭgi [int] (al), akordi [int] (kun); taŭgigi; taŭg(ig)o; taŭgeco (e.g.: *his answer did not fit the question*: lia respondo ne taŭgis al [or] ne akordis kun la demando); (decent), deca; (capable), kapabla; (healthy), sana; (med: seizure), ikto; (equip), ekipi [tr]; **fitful**, maltrankvila; **fitting**, (proper), konvena; (decent), deca; (suitable, appropriate), taŭga; (measurement for fit of clothing), taŭgigo; (mech, as for pipe), fittingo; **be fitting**, konveni [int]; deci [int]; taŭgi; **misfit**, sentaŭgulo; **fit in**, akordiĝi; **fit out**, (equip), ekipi [tr]; (garnish), garni [tr]; **outfit**, (kit, set of tools, things, clothing, equipment), kompleto; (organization), organizo, societo; **not fit for man nor beast**, taŭga nek por homo nek besto; **in fits and spurts**, panee-

me

five, kvin [see § 19]

fix, (fasten; make fast; phot), fiksi [tr]; (repair), ripari [tr]; (determine), determini [tr]; (arrange), aranĝi [tr]; (prepare), prepari [tr]; (dilemma), dilemo, embaraso; (direction bearing), biro; (drug), (drog)dozo; **fixed**, (unmoving, unchanging), ~a; **fixer**, (phot), ~enzo; **fixings**, (accessories, as for food), garnaĵo(j); **fix (up)on**, (choose), elekti [tr]; **fix up**, ripari [tr], (re)bonigi; aranĝi [tr]; organizi [tr]; **get a fix on**, (bearing), biri [tr]

fixate, fiksi [tr]; ~iĝi; **fixation**, ~iĝo;

fixative, ~enzo

fixture, fiksaĵo

fizz, (hiss), sibli [int], fuzi [int]; (foam), ŝaŭmi [int]; (bubble), eferveski [int]; eferveskaĵo

fizzle, (hiss), sibli [int], fuzi [int]; (fiasco), fiasko; fiaski [int]

fjord, fjordo

flab, grasaĉo; **flabby**, ~a, molaĉa

flabbergast, konfuzegi [tr], konsterni [tr]

flaccid, molaĉa, malfirma

flacon, flakono

Flacourtia, flakurtio

flag, (as of nation), flago; (standard, banner), standardo; (iris), irido; (tire), laciĝi, malvigligi; **flag down**, signali [tr]; **flagship**, ~ŝipo; **flagstone**, pavimŝtono; **sweet flag**, (bot), kalamo

Flagellatae, flageluloj

flagellate, (whip), vipi [tr], skurĝi [tr]; (bot), flagelforma; flagelhava; **flagellant**, flagelanto

flagellum, flagelo

flagolet, flagoletto

flagon, flakono

flagrant, senhonta, fifama, skandala

flail, draŝi [tr]; ~ilo

flak, (gen), kontraŭpafado

flake, (as of snow etc.), floko; ~igi; ~iĝi; (Aus: shark meat), ŝarkaĵo

flambé flamanta; ~e; ~aĵo

flamborough, (swand), flambergo; (dance), ~a danco

flamboyant, (showy, extravagant), (grand)efekta, ekstravaganca, puca, pava, vanta; (bright), brila, hela

flame, flamo; ~i [int]; **flame up**, ek~i [int], ~iĝi; **inflamm**, (excite), ek~igi, inciti [tr]; (med), inflamigi; (set on fire), ~igi, ekbruligi; (arouse passion etc.), ardig; **inflamed**, inflama; arda; **inflammation**, (med), inflamo; **inflammatory**, inflamiga; ardig, incita

flamen, flamino

flamenco, flamenko*; ~a

flamingo, flamengo, fenikoptero

Flaminius, Flaminio; **Flaminian**, ~a

flammable, brulema; **nonflammable**, ne~a

flan, (Br: tart), torteto [not "flano"]

Flanders, Flandrio

flange, flangō

flank, (side, gen), flanko; (of army), alo; (mil etc.: cover, protect, occupy side), ~i [tr]; (side part), ~aĵo; (go alongside), ~pasi [tr], al~iĝi

flannel, flanelo; ~a

flap, (covering), klapo; (of plane), post~o; (sound), klaki [int]; klako

flapjack, krespo, patkuko

flare, (blaze up), ekflamegi [int]; (burn irregularly), flagri [int]; (curve out), elkurbigi; elkurbigi; (phot), lummakulo; (torch, gen), torĉo; (torch for road emergencies), rizotorĉo; **signal flare**, **distress flare**, (rocket, for boat etc.), lumraketo, alarmraketo

flash, (shine), ekbrili [int]; ~o; (sparkle; blink on and off), flagri [int]; flagro; (move through like lightning), fulmi [int]; fulmigi; (intuit), intui [tr]; (show), montri [tr]; (moment), momento; (phot light), fulmlumo; **flasher**, (exhibitionist), ekshibiciulo; **flasher (light)**, (as on vehicle), flagrolumo; **flashing**, (arch), gutlado; **flashy**, brilaĉa, puca; **flashback**, retroscenot; **flashcard**, ekzerckarto; **flash gun**, fulmlumilo; **flashlight**, poŝlampo; **flash point**, ekflama punkto, ekflama temperaturo

flask, (gen), flakono [not "flasko"]; **Erlenmeyer flask**, konusa ~o; **Flourence flask**, platfunda ~o

flat, (smooth), plata; (level), ebena; (re color, style, etc.), malbrila; (monotonous), monotona, senreliefa; (categorical), kategoria; (decarbonated),

senŝaŭma; (constant), konstanta; (deflated, re tire etc.), malpufa, krevinta; (mus), bemolo; bemola (e.g.: *my guitar is flat*: mia gitaro estas bemola; *Symphony in B-flat Major*: Simfonio en B~bemolo Maĵora); (apartment), apartamento; **flatbed**, (truck), ~kamiono; (rr car), ~vagono; **flatboat**, ~boto; **flatfish**, pleŭronekto, ~fiŝo; **flatfoot**, ~piedo; **flatfooted**, ~piede; **flatware**, manĝilaro; **double-flat**, (mus), dubemolo; **granny flat**, (Br, Aus), avinejo

flatter, flati [tr]; **flattery**, ~(ad)o

flatulate, furzi [int]; **flatulent**, ~a; ~ema; ~iga; **flatulence**, ~emo; ~igo; **flatus**, ~ogaso, ventrogaso

flaunt, paradi [int] (en, per, kun), pavi [int]

flautist, flutisto

Flavian, Flaviano

Flavius, Flavio

flavone, flavono

flavo(u)r, sapor, gusto; ~igi [cp "taste", "spice"]; **flavorful**, ~plena, bongusta; **flavoring**, ~igenzo

flaw, difekto; ~i [tr]; **flawless**, sen~a, perfekta

flax, lino; **flaxen**, ~kolora, ~hara; **New Zealand flax**, formio

flay, (strip skin), senhaŭtigi; (hide), senfeligi; (whip, gen), vipi [tr], skurgŝi [tr]

flea, pulo; **beach flea**, talitro; **water flea**, akvo~o, dafnio

fleabane, daisy **fleabane**, erigerono

fleck, (spot), punkto; ~i [tr]

fledge, plumizi [tr]; ~iĝi; **fledgling**, (bird), birdido; (fig, gen: new), novmatura, freŝmatura; **full-fledged**, (lit or fig), plenforma, plensuka

flee, fuĝi [int] (de, el)

fleece, (wool), lano; sen~igi; (swindle), fraŭdi [tr], prifriponi [tr]; **fleecy**, ~eca

fleet, (of ships, or gen), floto; (planes), aer~o; (space), kosmo~o; (cars etc.), aŭto~o (kamion~o etc.); (fast), rapida;

fleeting, efemera, maldaŭra

Flemish, Flandra; **Fleming**, ~o

flesh, karno [cp "tissue", "meat"]; **fleshy**, ~odika, ~ohava, ~oriĉa [cp "corpulent", "fat"]

fleur-de-lis, lilifloro

flex, (bend), fleksi [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (Br: elec cord), ŝnur(konduktilo) [see "cord"]; **flexible**, ~ebla, supla; **flexion**, ~(ad)o; **flexor**, (anat: any flexor muscle), ~anto; (in specific name of muscle), fleksoro; **flexure**, ~(iĝ)o

flick, (flip), frapeti [tr]; ~o; (sound), kraketi [int]; kraketo; **flick (on)**, (switch, elec device), ŝalti [tr]; **flick off**, malŝalti [tr]

flicker, flagreti [int], tremeti [int]; ~(ad)o, tremet(ad)o

flier, (aviator), aviadisto; (express), ekspresa (trajno, buso, etc.); (step), ŝtupo; (handbill), flugfolio

flight, (flying), flug(ad)o; (group of planes or spaceships), eskadro; (of stairs), ŝtuparo; (fleeing), fuĝo; **flighty**, facilanima; **flight deck**, ek-a ferdeko; **flight-path**, ~itinerio; **put to flight**, fuĝigi

flimflam, fripon/ad; pri~i [tr]

flimsy, malfortika, rompiĝema

flinch, ekretiri/iĝi, sin ~i; **flinching**, tuŝotima; **unflinching**, nekonsternebla, resoluta, neŝancelebla

fling, (throw), ĵeti [tr]; ~iĝi; ~o; (swing), svingi [tr]; svingiĝi; svingo; (debauchery), diboĉaĵo; **have a fling**, diboĉi [int]; **have a fling at**, (try), provi [tr]

flint, siliko; **flint glass**, flinto

flip, (knock, flick), frapeti [tr]; ~o; (jump), salti [int]; salto; (turn over, rotate), renversi [tr]; renversiĝi; renversi(iĝ)o [cp "flop"]; (turn, as pages), turn(ad)i [tr]; turn(ad)o; (flip pant), frivola, impertinenta; **flipper**, (as of whale, or similar object), palmopiedo; **flip-flop**, (footwear), (senkalkanuma) sandalo; (human swimming aid, artificial flipper), naĝilo; (be indecisive), ŝanceliĝaĉi [int]

flippant, frivola, impertinenta

flirt, koketi [int], flirti [int]; ~ul(in)o, flirtul(in)o; **flirty**, flirtatious, ~ema, flirtema

flit, flirti [int]; ~o

float, (on top of, as raft), flosi [int]; ~igi; (through, as balloon, fish, idea), ŝvebi [int]; ŝvebigi; (raft etc.), ~o; (floating support, as cork, barrel, etc.),

~ilo

floc, floko; **flocose**, ~eca

flocule, floko; **floculate**, ~iĝi; **floculence**, ~eco; **flocculent**, ~eca

flock, (of animals), grego, ~aro [sfx] (e.g.: [re sheep]: ŝaf~o [or] ŝafaro); (gather), amasigi; amasiĝi; (fluff), floko

floe, bankizero [cp "cap: icecap"]

flog, skurĝi [tr], vergi [tr], bategi [tr]

flood, (inundate), inundi [tr]; ~iĝi; ~o; (tide), flusi [int]; fluso; (gasoline motor etc.), supernutri [tr]; supernutriĝi; **the Flood**, (Bib), (la) diluvo; **flood-gate**, kluzpordo; **floodlight**, verŝlumilo; verŝlumigi; [cp "light: spotlight"]; **flood-tide**, fluso

floor, (of room etc.; platform), planko; (bottom surface or limit, gen, as of ocean, wages, etc.), fundo; (level of building), etaĝo; (right to speak at meeting), parolo (e.g.: *I yield the floor to Mr. Jones*: mi cedas la parolon al s-ro Jones); (put floor in building), ~i [tr]; (stun, surprise), konsterni [tr]; (press to floor), sur~igi (e.g.: *floor the accelerator*: sur~igi la akcelilon); **flooring**, ~aĵo

flop, (flip over), renversi [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (writhe), barakti [int]; barakto; (flap noisily), klaki [int]; klako; (fail), fiaski [int]; fiasko; **floppy**, (flexible), fleksebla; (loose, unfirm), loza, malfirma; **flophouse**, hoteloĉa, pensionaĉo; **flopy disk**, (cmptr), moldisko

flora, (bot), flaŭro

Flora, (woman's name), Flora

floral, flora

Floréal, Florealo

Florence, (city), Florenco; (woman's name), ~a; **Florentine**, ~a; ~ano

florescence, florado

floret, floreto

Florian, Florianio

florid, (ruddy), ruĝ(vang)a; (gaudy), puca

Florida, Florido

florin, florenio

florist, floristo

floss, (fluff), floko; (of cocoon), kokonlanugo; (clean teeth w dental floss), fadenpurigi (la dentojn); **flossflower**,

agerato; **dental floss**, dent-fadeno
flotation, flos/ado; ~igo; ~il(ar)o
flotilla, floteto
flotsam, flosantaĵo(j)
flounce, (jump), sin ĵeti; (clothing trim), falbalo
floUNDER, (struggle), barakti [int]; (opp "prosper"), malprosperi [int]; (fish), fleso
flour, faruno; ~izi [tr]
flourish, (prosper), prosperi [int], flori [int]; (wave), svingi [tr]; (fanfare), fanfaro
flout, moki [tr], ridindigi
flow, (gen), flui [int]; ~o; (tide in, opp "ebb"), fluso; flusi [int]; **overflow**, (of water), superakvi [tr]; superakviĝi, superbordigi; superakv(iĝ)o, superbordigo (any flow; people; etc.), super~i [int]; super~o (e.g.: *the crowd overflowed into the garden*: la homamaso super~is en la ĝardenon)
flower, floro; ~i [int]; **flowery**, (lit), ~riĉa; (speech), ~a, deklama; **use flowery speech**, deklami [tr]; **bellflower**, kampanulo; **butterflower**, ranunkolo; **canarybird flower**, tropeolo; **cardinal flower**, lobelio kardinala; **carrion flower**, (gen), kadavro~o; (*Smilax*), smilako; (*Stapelia*), stapelio; **fennel-flower**, nigelo; **flamingo flower**, flamengo~o; **mayflower**, (nonspecific), maj~o; **mistflower**, eŭpatorio; **monkey flower**, mimulo; **pasque flower**, (*Anemone pulsatilla*), pulsatilo; **passion flower**, pasi~o; **shadflower**, drabo; **spiderflower**, (*Cleome*), kleomo; **spoonflower**, ksantosomo; **strawflower**, helikrizo; **sunflower**, sun~o, helianto; **trumpet flower**, (*Bibnonia*), bignonio; **wallflower**, (*Cheiranthus*), keiranto; (*Erysimum*), erizimo; (colloq: nonparticipant at dance etc.), murstaranto; **wildflower**, sovaĝa ~o; **windflower**, anemono
flu, gripo
flub, fuŝi [tr]; ~o
fluctuate, fluktui [int], ondi [int]
flue, fumtubo
fluegelhorn, flugilkorno
fluent, flua; **fluency**, ~eco; **be fluent**

in, ~e paroli [tr] (e.g.: *he is fluent in French and Russian*: li ~e parolas la Francan kaj Rusan lingvojn)
fluff, (down), lanugo; (err), fuŝi [tr]; fuŝo; (loosen, as pillow), moligi; **fluffy**, ~a
flügelhorn, flugilkorno
fluid, fluida; ~o; (accumulating in tissues in dropsy, edema, etc.), seraĵo; **amniotic fluid**, amnia ~o; (**cerebro**)**spinal fluid**, (cerbo)spina ~o
fluke, (flatworm) *Distoma*, distomo; (*Fasciola*), fasciolo; (flatfish), pleŭronekto, flatfiŝo; (anchor point), ŝpato; (chance happening), hazardo
flume, klintrogo
flunk, malsukcesi [int] (en), fiaski [int] (en) [see "fail"]
flunky, lakeo
fluoresce, fluoreski [int]; **fluorescence**, ~eco; **fluorescent**, ~a
fluorescein(e), fluoresceino
fluoride, fluorido; **fluoridate**, ~izi [tr]
fluorine, fluoro; **fluorinate**, ~izi [tr]
fluoroscope, fluoresko-ekrano; **fluoroscopic**, ~ado
fluorspar, fluorito
flurry, (snow), neĝeto; ~i [int]; (agitate), agiti [tr]; agitiĝi; agitiĝo; (gust), ventpuŝo
flush, (wash out w water, as toilet or wound), akvumi [tr]; ~iĝi; ~o; (wash away), forlavi [tr] (e.g.: *flush the pills down the toilet*: forlavi la pilolojn malsupren la fekseĝon); (rinse), gargari [tr]; (blush), ruĝiĝi; ruĝ(vang)a; (put to flight), ekflugigi; (make flee), fuĝigi; (excite), eksciti [tr]; (full), plena; (to brim), plenplena; (level, even), ebena; ebene; (having \$), monhava; (abundant), abunda; (cards), samemblemaro
fluster, konfuzi [tr]; ~o
Flustra, flustro
flute, (mus), fluto; ~i [int]; (groove), kanelo; kaneli [tr]; **fluting**, kanelaĵo
flutter, (as flag), flirti [int]; ~o; (as butterfly), papiliumi [tr, int]; (as eyes), palpebrum(ad)i [int]; (quiver, tremble), tremi [int]; (radio), flagra fado; (flagre fadi [int]; (heart), fluteri; fluteri [int]; (Br: bet), veteto

- flux**, (flow, gen), fluo; (math, sci), flukso; (for soldering etc.), fandigenzo; (med: loose bowels), lakso
- fly**, (as bird, aircraft, spacecraft), flugi [int]; ~igi; (in aircraft), aviadi [int]; [see also "flier", "flight"]; (hasten), rapidegi [int], hast(eg)i [int]; (as flag), flirti [int]; flirtigi; (insect, gen), muŝo; (of pants), pantalonfendeto; (of man's pants, slang), kacujo [see "penis"]; **flyer**, [see "flier"]; **fly at**, furioze ataki [tr]; **fly-by**, preter~o; **fly-by-night**, nefidinda; **flycatcher**, (bird), muŝkaptulo; **flyleaf**, ŝirmopaĝo; **fly open**, krevi [int]; **flywheel**, incircirado; **fly in the ointment**, io misa, tubero en la afro; **let fly**, eljeti [tr]; **botfly**, (horse botfly: *Gasterophilidae*), gastrofilo; (sheep botfly: *Oestridae*), ojs-tro; **butterfly**, (gen), papilio; **cabbage butterfly**, pieriso; **swallowtail butterfly**, papiliono; **caddis fly**, frigano; **catch fly**, (bot), sileno; **crane fly**, tipulo; **fruit fly**, **banana fly**, drozofilo, bananmuŝo; **gadfly**, tabano; **golden-eyed fly**, krizopo; **harvest fly**, cikado; **horsefly**, tabano; **lantern fly**, fulgoro; **May fly**, efemero; **sand fly**, (*Phlebotoma*), flebotomo; (*Simulium*), simulio; **Spanish fly**, (insect), kantarido; (powder), kantaridaĵo; **tsetse fly**, ceceo; (sci), glosino
- foal**, (of horse), ĉevalido; naski (~on); (of donkey etc.), azenido (etc.)
- foam**, ŝaŭmo; ~i [int]; ~igi
- fob**, (watch pocket), (horloĝa) poŝeto; (swindle), prifripoti [tr], trompi [tr]
- F.O.B. fri** [prep] (e.g.: *F.O.B. Chicago*: fri Ĉikago) [see "free"]
- focal**, fokusa; **focal distance**, inter~a distanco; **bifocal**, du~a; **bifocals**, du~aj okulvitroj; **trifocal**, tri~a; **trifocals**, tri~aj okulvitroj
- focus**, fokuso; en~igi
- fodder**, furaĝo
- foe**, malamiko, adversulo†, kontraŭulo
- foehn**, feno
- Foeniculum, fenkolo
- foetus**, [see "fetus"]
- fog**, (in air, or analogous unclarity), nebulo; (condensation on cold surface, as window, glass of ice water, etc.), rosumo; **foggy**, ~a; rosuma; **fog up**, ~igi; ~iĝi; rosumigi; rosumiĝi; **defogger**, (e.g., for car window), senrosumilo; **pea-soup fog**, ~supo†
- fogy**, kadukulaĉo, eksmodulo
- foible**, malfortajeto
- foil**, (thwart), malsukcesigi, vanigi; (metal leaf), folio; (rapier), rapiro; **aluminum foil**, alumina folio; **tin foil**, staniolo
- foist**, (tromp)trudi [tr]
- fold**, (crease, bend over), faldi [tr]; ~(aj)o; (put together), as wings, tent, etc.), kunmeti [tr]; (fail), malsukcesi [int]; (herd of sheep etc.), grego; (sheep pen), gregejo, ŝafejo; **folding**, (foldable), ~ebla
- fold**, (sfx: multiplied by), ~obla; ~~e (e.g.: *a tenfold increase*: dek~a pliiĝo); (number of parts), ~opa; ~ope (e.g.: *our task is threefold*: nia tasko estas triopa); **multiply (increase) ...fold**, ~~igi; ~iĝi (e.g.: *increase fivefold*: kvin~igi; kvin~iĝi)
- folder**, (of heavy paper for file), dosierujo; (pamphlet), broŝuro; (cmprtr), baĉo†
- foliaceous**, (like leaf), foli/eca; (having leaves), ~hava
- foliage**, foliaro
- foliar**, folieca
- foliate**, (gen), foli/igi; ~iĝi; **defoliate**, sen~igi
- folio**, (sheet folded once), folio; (folded twice, for 4 pages; book of this format), folianto
- folk**, (a people, ethnic group), popolo, gento; (persons, gen), homoj; (re folklore), folkloro, ~a (e.g.: *folk dance*: ~danco [or] folkloro ~o); **folks**, homoj; **folksy**, neformala, familiara; **folklore**, folkloro; folkloro
- follicle**, foliklo
- folliculin**, oestrono, folikulino
- follow**, (go after, gen), sekvi [tr]; (go along, as coast, road, etc.), ~i, laŭiri [tr]; (result as consequence), ~i, rezulti [int]; (obey), obei [tr]; **follower**, (of an idea, doctrine, etc.), ano, adepto, ~anto, disĉiplo; **following**, (group of followers), ~antaro, anaro, adeptaro; (prep: after), post; **the following**, (in-

roducing an item or list), la jena(j); **as follows, in the following manner**, jene, jenmaniere, laŭ la jena maniero, kiel ~e; **it follows that**, ~as ke; ~e; tial; **follow through (on)**, kompletigi; **follow up**, (check, proceed, try further), plu~i [tr]

folly, malsaĝaĵo; ~eco

Fomalhaut, Fomalhoto

foment, (incite), inciti [tr]; (med), fomenta [tr]

Fomes fomentarius, tindrofungo, fajrofungo

fond, (loving), ama, ~ema; (gentle, tender), tenera; **be fond of**, ŝati [tr], ~i [tr]

fondle, karesi [tr]; ~o

fondue, fonduo*

font, (type), karaktraro; (basin), kuvo;

baptismal font, baptujo

Fontainebleau, Fontanbelo

fontanel(le), fontanelo

food, manĝaĵo, nutraĵo; **fast food**, krak~o; krakmanĝa; **junk food**, sub~o; **food for thought**, pripensindaĵo

fool, (deceive), trompi [tr]; (cause to err), erarigi; (unwise person), malsaĝulo; (stupid person), stultulo; (jester), arlekeno; (joke), ŝerci [int]; priŝerci [tr]; **foolhardy**, malprudenta, troriskema; **foolish**, (unwise), malsaĝa; (silly), fola; (stupid), stulta; (imprudent), malprudenta; **foolproof**, nefuŝebla; **fool around**, (loaf), lanti [int]; **fool around with**, (mess with carelessly or inexpertly), fuŝfingrumi [tr]; **make a fool of**, ridindigi; **tomfool**, stulta, malsaĝa; stultulo, malsaĝulo; **tomfoolery**, stulteco, malsaĝo

foot, (anat; similar object; unit of verse meter), piedo; (lowest point, as of mountain etc.), bazo, malsupro; (unit of length), futo [0,3048 metro (see § 20)]; **footer**, (at bottom of document), ~strio **footing**, (firm place to stand), starejo; (building foundation), ~aĵo; **football**, (soccer: game), futbalo; (ball), futbalpilko; (Am), Usona futbalo; Usona futbalpilko; **foothill**, antaŭmont(et)o; **footlocker**, kofro; **footman**, lakeo; **footnote**, ~noto;

footpath, pado; **footprint**, ~signo; **footstep**, paŝo; **footstool**, skabelo; **footwear**, ~vestoj [note plur]; **footwork**, ~umado; **barefoot(ed)**, nud(a)~a; **Blackfoot**, (Native American), Nigra~ulo; Nigra~ula; **clubfoot**, bul~o; **flat-footed**, plat~a; **fleet-footed**, facil~a; **sure-footed**, firm~a; **tenderfoot**, novbakito; **web-footed**, palmo~a; **on foot**, ~ira; ~ire; sur~a; sur~e; **go on foot**, ~iri [int]; **get off on the right (wrong) foot**, (mal)bone komenci [tr]; (mal)bone komenciĝi; **get cold foot**, (lose courage), malkuraĝiĝi; **put one's foot down**, (ek)kontraŭi [tr]; **put one's best foot forward**, prezenti sian plej favoran flankon; **put one's foot in one's mouth**, fuŝparoli [int]; **set foot on**, enpaŝi [tr]; **set foot on**, surpaŝi [tr]

fop, dando; **foppish**, ~a

for, (re purpose, goal; person or thing to whom given, done; future duration), por (e.g.: *for what purpose*: ~ kiu celo; *prepare for the trip*: prepari ~ la vojaĝo; *that glass is for water*: tiu glaso estas ~ akvo; *that gift is for you*: tiu donaco estas ~ vi; *I paid \$15 for that book*: mi pagis \$15 ~ tiu libro; *pay for one's mistakes*: pagi ~ siaj eraroj; *I took you for [to be] someone else*: mi prenis vin ~ iu alia; *enough food for a week*: sufiĉa nutraĵo ~ semajno); (against, in exchange for, re price), kontraŭ (e.g.: *I sold it for \$200*: mi vendis ĝin kontraŭ \$200; *a medicine for fever*: medikamento kontraŭ febro); (because), ĉar (e.g.: *I can't come, for I am sick*: mi ne povas veni, ĉar mi estas malsana); (because of), pro (e.g.: *I couldn't come for lack of money*: mi ne povis veni pro manko de mono; *thank you for your letter*: dankon pro via letero; *an eye for an eye*: okulo pro okulo); (instead of), anstataŭ (e.g.: *use coats for blankets*: uzi paltojn anstataŭ litkovriloj); (as, to be), kiel (e.g.: *I know that for a fact*: mi scias tion kiel fakton); (during), dum (e.g.: *we were there for a month*: ni estis tie dum monato; *for a long time*: dum longa tempo); (one by

octagon, okangulo
octahedron, oktaedro, okedro
octal, okuma
octane, oktano; **octane rating**, **octane number**, ~a indico, ~a nombro
octant, (gen), oktanto
octave, oktavo
Octavio, **Octavius**, Oktavio; **Octavia**, ~a
octavo, oktavo
Octavo, **Octavus**, Octavo
octet, (any 8), okopo; (mus), okteto
octillion, (Am: 10²⁷), kvartilardo; (Br: 10⁴⁸), okiliono [see § 19(b)]
October, oktobro
Octocorallia, okkoraluloj
octopus, (animal), polpo; (as food), ~aĵo
octuple, okobla; ~igi; ~iĝi; okopa; okopigi; okopiĝi [see § 19]
octyl, oktilo
ocular, (re eye), okula; (lens), okulario
oculist, oftalmologo, okulisto
Ocynum, [see "Ocimum"]

odalisk, odalisque, odalisko

odd, (strange, peculiar), stranga, kurioza; (w/o mate, as sock etc.), malpara; (math: not divisible by 2), nepara; (various, diverse), diversa(j); (extra, additional), aldona (e.g.: *a dollar and some odd change*: dolaro kaj aldonaj moneroj); (small amount over round figure), -kelkaj, -kelke (da) (e.g.: *thirty-odd years ago*: antaŭ tridekelkaj jaroj [or] tridek-kelke da jaroj; *two hundred odd people came*: ducent-kelkaj homoj venis); **odds**, (probability), probable, ŝanco; (advantage), avantaĝo; **oddball**, ~a; ~aĵo; ~ulo; **odddity**, ~aĵo; ~eco; ~ulo; **odd man out**, malparulo, ekstrulo; **odds and ends**, diversajoj; **at odds with**, en malakordo kun; **lay odds**, veti [int]; **I'll lay long odds (that)**, mi vetos je via granda avantaĝo (ke)

ode, odo

Oder, Odro

Odessa, Odoso

Odetta, Odeta

Odin, Odino [cp "Wotan"]

odious, malam/inda, abomena; **odium**, ~o, abomeno

odometer, distancometro [not "odometro" or "hodometro"]

Odonata, odonatoj

odor,odoro; **have (exude) the odor of**, ~i [int] je (e.g.: *it has the odor of asparagus*: ĝi ~as je asparago); **odoriferous**, ~anta; **odorless**, sen~a; **odorous**, (bon)~a, aroma; **deodorize**, des~igi, sen~igi; **malodorous**, fetora, fi~a, stinka

Odyl(e), (woman's name), Odila

Odysseus, Odiseo

odyssey, odiseado

oe-, [if specific word not listed below, see under "e-"]

Oedipus, Edipo; **Oedipus complex**, ~komplekso

Oenanthe, (zool; bot), enanto; Oenanthe aquatica, felandrio

Oenothera, enotero

oersted, orstedo

Oestrus, oĵstro; Oestridae, ~edoj

Oeta, Oĵto

of, (re possession; relationship; author-

ship; nationality; nature, description, purpose; from; relieved, deprived of), de (e.g.: *assets of the company*: aktivoj de la kompanio; *pages of the book*: paĝoj de la libro; *the square root of 3*: la kvadrata radiko de 3; *the plays of Shakespeare*: la dramoj de Ŝekspiro; *the people of Canada*: la homoj de Kanado; *a piece of wood*: peco de ligno; *a day of rest*: tago de ripozo; *east of the city*: oriente de la urbo; *cured of cancer*: resanigita de kancero; *robbed of one's money*: prirabita de sia mono); (re quantity, contents), da (e.g.: *a glass of water*: glaso da akvo; *a liter of milk*: litro da lakto; *a pile of bricks*: amaso da brikoj); (made from; one item or several out of total), el (e.g.: *a ring of gold*: ringo el oro; *made of plastic*: farita el plasto; *one of us*: unu el ni; *some of the trees*: iuj el la arboj); (because of), pro (e.g.: *die of tuberculosis*: morti pro tuberkulozo); (about, concerning), pri (e.g.: *a poem of love*: poemo pri amo; *think of me*: pensu pri mi); (as a kind of), -a (e.g.: *a jewel of a city*: juvela urbo); (specific designation, name, amount), [omit] (e.g.: *the city of Baltimore*: la urbo Baltimoro; *the sum of five dollars*: la sumo kvin dolaroj); (before, in expressions of time), antaŭ (e.g.: *at 10 of 5 [4:50]*: je 10 antaŭ la 5-a); **of late**, lastatempe; **of mine (yours, his, hers, etc.)**, mia (via, etc.) [after n; omit prep] (e.g.: *a friend of mine*: amiko mia; *a habit of hers*: kutimo ŝia); **full of**, plena je; **made of**, farita el

off, (away), for, for- [pfx] (e.g.: *off in the distance*: ~ malproksime; *move off*: ~moviĝi); (away from), ~ de (e.g.: *off campus*: ~ de la universitata tereno); (disconnected, re elec circuit, device), malŝaltita (e.g.: *the light [circuit, machine] is off*: la lumo [cirkvito, maŝino] estas malŝaltita); (re closed valve, fluid not flowing, etc.), fermita (e.g.: *the faucet [water, gas] is off*: la krano [akvo, gaso] estas fermita); (away from surface, opp "on-to"), de sur (e.g.: *the cat jumped off*

the table: la kato saltis de sur la tablo); (nearby, adjacent), apud (e.g.: *a storm off the coast*: stormo apud la marbordo; *a parking orbit off Mars*: parkorbato apud Marso); (not being worn), demetita (e.g.: *his hat is off*: lia ĉapelo estas demetita); (not attached), malligita, malfiksita (e.g.: *the cover is off the book*: la kovrilo estas malfiksita de la libro); (not in operation), nefunkcianta; (en route), survoja; survoje (e.g.: *we're off for Toronto*: ni estas survoje al Toronto); (less), malpli (e.g.: *sales are off*: vendoj estas malpli); (below normal), subnormala (e.g.: *my singing is off tonight*: mia kantado estas subnormala ĉi-nokte; *an off day*: subnormala tago); (incorrect), malĝusta (e.g.: *their estimate was off*: ilia takso estis malĝusta); (not on target), maltrafa; (outside), ekster (e.g.: *off limits*: eksterlima, ekster limoj); (in future), estontece, en la estonteco (e.g.: *the convention is two months off*: la kongreso estas du monatojn en la estonteco); (\$: as rebate), rabate (e.g.: *5% off for cash payment*: 5% rabate por kontanta pago); (away from work, duty, etc.), libera (e.g.: *I'm off on Saturday*: mi estas libera je sabato); (w verb: to measure or divide), dis- [pfx] (e.g.: *mark off*: dislimi); (w verb: to remove, come away), de- [pfx] (e.g.: *the paint rubbed off*: la farbo defrotiĝis); (w verb: by means of), per, pere de (e.g.: *live off an inheritance*: vivi per heredaĵo); **be off**, (free, not on duty), esti libera; havi liberan tempon, tagon; (abstain), abstini [int] (de) (e.g.: *I'm off caffeine*: mi abstinas de kafeino); **we're off!**, ni ekis!; **let's be off!**, ek al!; **(be) off!**, (go away!), for!

offal, (entrails etc.), triplo, visceraĵo

offence, [see "offense"]

offend, ofendi [tr]; **offender**, (guilty person), kulpulo

offense, (act of offending), ofendo; ~ado; (crime), krimo; (attack, sport or mil), ofensivo; **offensive**, ~a; ofensivo; ofensiva; **inoffensive**, ne~a, sen~a; **capital offense**, mortkrimo;

take offense, ~iĝi

offer, (propose, put forth, gen), proponi [tr], elmeti [tr]; ~o; (bsns), oferti [tr]; oferto; (sacrifice), oferi [tr]; of-er(don)o; (present, show), prezenti [tr]; **offering**, (rel donation), monofero

offertory, **offertorium**, ofertorio

office, (job, position), ofico; (high post), posteno; (place), ~ejo; (of bsns, industry, etc.), kontoro; **officer**, (officeholder, government official, etc.), funkciulo, ~isto; (mil, police, etc.), oficio; **office boy** (girl), kurknab(in)o; **office-worker**, ~isto; kon-
toristo; **box office**, biletejo; **put into office**, en~igi; **come to office**, en~igi; **remove from office**, el~igi; **good offices**, komplez(ado)

official, (authoritative), oficiala; (officeholder), funkciulo; (w judicial or authoritative powers), instanco

officiate, deĵori [int], funkcii [int]; **officiate at**, (do ceremony), celebri [tr]

officinal, oficina; ~aĵo

officious, sintruda

offing, malproksimo; **in the offing**, (at some future date), estonta; (iam) estontece

often, ofte

ogee, ogivo; **ogee arch**, ~a kruciĝo

ogive, ogivo

ogle, okulumi [tr]; ~o

Ogmorhinus, marleopardo

ogre, ogro

oh! (gen interj), ho!; (alas!, woe!), oj!, ho ve! [cp "oy!"]

Ohio, (state), Ohio; (river), Rivero ~o

ohm, omo; **megohm**, mega~o, mego-
mo; **ohmmeter**, ~metro

oho! (interj), oho!

-oid, (sfx), ~oido; ~a

Oidium albicans, ojdio

oil, (gen), oleo; ~i [tr]; (petroleum), petrolo; (crude petroleum), nafto; (as furnace or diesel fuel etc.), mazuto [cp "diesel"]; (paint), ~ofarbo; (a painting), ~opentraĵo; **oily**, ~(ec)a; **castor oil**, ricin~o; **coal oil**, keroseno; **palm oil**, (chem), palm--o; (bribe), ŝmir-
mono

oink, grunti [int]; ~o; (onom), grunt!

ointment, unguento
 Oise, (river), Uazo
 OK, [see "okay"]
 oka, oksalido
 okapi, okapio
 Okapia johnstoni, okapio
 okay, (all right, good, correct), en ordo, bone (e.g.: *okay, I'll do it*: en ordo, mi faros ĝin; *everything is okay*: ĉio estas en ordo); (approve), aprobi [tr], jesi [tr] (e.g.: *she okayed the proposal*: ŝi aprobis la proponon)
 Okhotsk: Sea of Okhotsk, Maro Ofok-ka
 Okinawa, Okinavo
 Oklahoma, Oklahomo; Oklahoma City, ~-urbo
 okra, legomhibisko
 -ol, (chem sfx), -olo
 old, (not young), maljuna; ~ulo(j); (poet: not young), olda; (not new), malnova; malnovaĵo; (former), antaŭa, eksa; (experienced), sperta; (ancient), antikva; **how old are you?**, kiom aĝa vi estas?, kiom vi aĝas?; **(be) 50 years old**, (esti) 50-jar(aĝ)a, aĝi 50 jarojn; **a 50-year-old**, 50-jarulo; **old age**, ~eco, ~aĝo; **age-old**, antikva, epokojn aĝa; **old-injun**, **old-squaw**, **oldwife**, (zool), klangulo, ĝlaci-ana-so; **old-man's-beard**, (bot), klematido
 Olea, oleo; Olea europaea, olivarbo
 oleander, oleandro
 oleaster, oleastro
 oleate, oleato
 olecranon, olekrano
 olefin, olefino, alkeno
 oleic, (re oil), olea; **oleic acid**, oleata acido
 olein, oleino
 oleomargarine, margarino
 oleum, oleumo
 olfactory, olfakta, flara, flar- [pfx]; **olfaction**, ~o
 Olga, Olga
 olibanum, olibano
 oligarch, oligarko; **oligarchy**, ~io; **oligarchic(al)**, ~ia
 Oligocene, oligoceno; ~a
 Oligochaeta, oligofetoj
 oligochaetous, oligofeta

oligoclase, oligoklazo
 oligopoly, oligopolo†
 olive, (fruit), olivo; (tree), ~arbo; (olive-colored), ~kolora, ~(ec)a; **olive oil**, ~oleo; **Mount of Olives**, Monto O~arba; **Russian olive**, oleastro
 Oliver, Olivero
 Olivet, Monto Olivarba
 olivine, oliveno
 olm, proteo
 -ologer, -ologist, (sfx), -ologo; -ology, ~io
 Olympia, Olimpio; **Olympian**, (of Olympia), ~ano; ~a; (of Olympus), Olimpano; Olimpa
 Olympiad, (ancient), olimpiado; (modern), olimpikoj
 Olympic, (re games), Olimpia; (re Olympus, Olympia), [see "Olympia"]; **Olympics**, **Olympic games**, ~oj
 Olympus, Olimpo
 -oma, (med sfx), -omo
 Oman, Omano; **Gulf of Oman**, Golfo ~a; **Trucial Oman**, ~bordo
 Omar, Omaro
 omasum, omaso
 -omatosis, (med sfx), -omozo
 Omayyad, Omajado
 ombudsman, rajtoprotektisto
 omega, omega [see § 16]
 omelet(te), omleto
 omen, aŭguro; ~i [tr]
 omentum, epiploo, omento
 omer, omero
 omicron, omikra [see § 16]
 ominous, misaŭgura, minaca
 omit, ellasi [tr], preterlasi [tr]; **omission**, ~o, preterlaso
 Ommiad, Omajado
 omni-, (pfx: all), ĉio-, ĉiu- (e.g.: *omni-directional*: ĉiudirekta; *omnivorous*: ĉiomanĝa)
 omnibus, (gen), omnibuso; ~a
 omnipotent, ĉiopova; **omnipotence**, ~o
 omnipresent, ĉiea; **omnipresence**, ĉieco
 omniscient, ĉioscia; **omniscience**, ~o
 omnivorous, ĉiomanĝa; **omnivore**, ~ulo
 Omphale, Omfala
 on, (upon), sur (e.g.: *the book is on the*

table: la libro estas ~ la tablo; *the cat jumped on [onto] the sofa*: la kato saltis ~ la sofono; *the fly is on the wall, the ceiling*: la muŝo estas ~ la muro, la plafono); (at, re place), ~, ĉe (e.g.: *on the right side*: ~ [or] ĉe la dekstra flanko); (at same time, re event), ĉe (e.g.: *we succeeded on the third try*: ni sukcesis ĉe la tria provo; *I awoke on her entering*: mi vekigis ĉe ŝia eniro [or: kiam ŝi eniris]); (re day of week), -e, je -o (e.g.: *on Thursday*: ĵaŭde [or] je ĵaŭdo); (about, concerning), pri (e.g.: *work on a problem*: labori pri problemo; *a book on trees*: libro pri arboj); (as result of), pro (e.g.: *a profit on the sale*: profito pro la vendo); (by means of), per (e.g.: *live on berries*: vivi per beroj; *I heard on the radio*: mi aŭdis per la radiofono; *she spoke on television*: ŝi parolis per televido); (repetition), post (e.g.: *wave on wave rolled over us*: ondo post ondo ruliĝis super ni); (after verb: onto), sur- [pfx] (e.g.: *smear the paint on*: surŝmiri la farbon); (after verb: lastingly), daŭre, ade, -ad- [sfx] (e.g.: *they babbled on*: ili daŭre babilis [or] ili babiladis); (connected, re elec light, circuit, device), ŝaltita (e.g.: *the light is on*: la lumo estas ŝaltita); (open, re valve), malfermita (e.g.: *the water, the faucet is on*: la akvo, la krano estas malfermita); (functioning, re any device), funkcia (e.g.: *I saw two motors on*: mi vidis du funkciajn motorojn); (planned, going to happen), okazonta (e.g.: *tomorrow's meeting is still on*: la morgaŭa kunveno ankoraŭ estas okazonta); (theat, radio, TV, etc.: presented), prezentata; prezentota (e.g.: *what's on?*: kio estas prezentata?; *the news is on next*: la novaĵoj estas prezentotaj venonte); (at expense of), regale de (e.g.: *drinks are on the house*: trinkaĵoj estas regale de la domo); **onward(s)**, antaŭen; **it's on me**, (I will pay), mi regalos; **on and on**, senĉese, senfine, senlime; **on and off**, (intermittent), intermita; intermite; **go (blink, etc.) on and off**, intermiti [int] [cp "blink", "flicker"]

onager, onagro†

Onagraceae, onagracoj

onanism, onanismo

once, (occurring one time), unufoje, unu fojon (e.g.: *eat once a day*: manĝi unufoje [or: unu fojon] tage); (at any time, ever), iam (e.g.: *I'll explain it to him if I once get him to listen*: mi klarigos ĝin al li se mi iam aŭskultigos lin); (at past time), iam, antaŭe (e.g.: *I once lived there*: mi iam [or: antaŭe] loĝis tie); (as soon as), kiam, tuj kiam, kiam jam (e.g.: *we will leave once the rain stops*: ni foriros (tuj) kiam la pluvo (jam) ĉesos); **at once**, (immediately), tuj; **all at once**, (suddenly), subite; (at same time), samtempe; **for once**, (now), ĉi-foje; (then), tiufoje; **once and for all**, unu fojon por ĉiam, definitiva; por nun [or: tiam] kaj por ĉiam; **once every three days (etc.)**, [see under "every"]; **once in a while**, kelkfoje, fojfoje, de tempo al tempo; **once-over**, rapida ekzamen(et)o; **once upon a time**, iam antaŭ longa tempo

Onchocerca volvulus, onkocerko

onchocerciasis, **onchocercosis**, onkocerkozo

onc-, (med pfx: cancer), onk-†

oncogenic, onkogeno†

oncology, onkologio†; **oncological**, ~ia; **oncologist**, ~o

Ondatra, fibero; Ondatra zibethica, ondatro

one, (number), unu [see § 19]; (indefinite personal pron), oni (e.g.: *what must one do?*: kion oni devas fari?); (a certain unspecified), iu (e.g.: *I saw her one day last week*: mi vidis ŝin iun tagon la pasintan semajnon); (one and only), sola, nura (e.g.: *the one thing that bothers me*: la nura [or: sola] afero kiu ĝenas min); (after adj, indicating specified one(s) or one(s) of that sort), [not translated] (e.g.: *I finished this one, and I want another one*: mi finis ĉi tiun, kaj mi volas alian; *the green ones are pretty*: la verdaj estas belaj); **one's**, ies; ĉies; sia [note: "on-ia" is correct but rarely applicable] (e.g.: *one has one's [own] duty*: oni

havas sian devon; *it is (everyone's) duty to come*: estas ĉies devo veni; *the Board protected one's (others') right to read their minutes*: la Estraro protektis ies rajton legi iliajn protokolojn; **oneself**, [see "self"]; **oneness**, unueco; **anyone, everyone, someone**, [see "anyone" etc.]; **no one**, neniu [for examples, see "any" and subsequent entries]; **no one at all**, neniu ajn; **no one's (at all)**, nenies (ajn); **at one (with)**, unueca (kun); **one and the same**, unu sama; **the one ... the other**, unu ... la alia; **one and all**, ĉiu(j) ajn; **one another**, unu la alian; sin reciproke (e.g.: *they hugged one another*: ili brakumis unu la alian [or] brakumis sin reciproke); **one by one**, unuope; **one of those things**, neeviteblaĵo; **one-to-one, one-on-one**, parigita; parigite; **(be) one up on (someone)**, (esti) super (iu), (esti) supera al (iu); **one-upmanship**, superemo; **one-way**, (gen), unudirekta

-one, (chem sfx), -ono

Onega, (river), Onego; **Lake Onega**, Lago ~a

onerous, peniga, peza

Onesimus, Onezimo

onion, cepo; **onionskin**, (paper), ~opapero

Oniscus, onisko

only, (adv), nur [must immediately precede word or phrase modified] (e.g.: *I only have five dollars*: mi havas ~ kvin dolarojn); (adj), ~a (e.g.: *the only thing*: la ~a afero); (sole, alone), sola (e.g.: *the only tree in the area*: la sola arbo en la regiono; *only child*: solinfano); (but), sed (e.g.: *I'd come, only I'm too busy*: mi venus, sed mi estas tro okupata); **one and only**, unu~a, unusola, solsola

Onobrychis, onobriko

onomastic, onomastika; ~isto; **onomasticon**, nomaro

onomatology, onomastiko

onomatopoeia, onomatopeo; **onomatopoeic**, ~a

Onopordon, onopordo; Onopordon acanthum, azenkardo

onslaught, atak(eg)o

Ontario, (province), Ontario; **Lake Ontario**, Lago ~o

onto, sur -on (e.g.: *the cat jumped onto the sofa*: la kato saltis sur la sofon); **be onto**, (aware), konsci [int] pri

ontogeny, ontogenesis, ontogenio†; **ontogenetic**, ~a

ontology, ontologio; **ontological**, ~a

onus, (burden), ŝarĝo; (blame), kulpo, respondeco

Onychophora, pratraĥeuloj

onyx, onikso

oocyte, oocito*

oodles (of), abunda(j), multeĝa(j), multege da

oof! (interj), uŭ!

oogenesis, ovogenezo

oolite, oolito

oomycetes, oomicetoj

oophorectomy, ovariektomio

oops! (interj), uŭ!, hup!

oospore, oosporo

ooze, eksudi [int]; ~aĵo; (slime), ŝlimo; (muck), fango

opal, opalo; **opalesce**, ~eski [int]; **opal-escence**, ~esko; **opalescent**, ~eska

opaque, opaka; **opacity**, ~eco

open, (opp "close", gen), malfermi [tr]; ~iĝi; ~ita, (neol), aperta [note: "aperta" is useful esp in combined forms (e.g.: *open-heart surgery*: apertakora kirurgio)]; (begin), komenci [tr]; komenciĝi; (inaugurate), inaŭguri [tr]; (make available), disponigi; disponiĝi; (reveal), malkaŝi [tr], riveli [tr]; (spread out, unfold), sterni [tr]; sterniĝi; (outdoors), ekstere(n); eksteraĵo; (public), publika; (free, unrestricted), libera; (broad, clear, unobstructed), vasta, senobstrukca; (not yet decided), decidota, nedecidita; (not prejudiced), senantaŭjuĝa; (not discriminatory), nediskriminacia; (active, in force), aktiva, valida; (not occupied, e.g., seat, job), vaka; (re vowel), vasta; (accessible), alirebla; (known, not secret), konata; (candid, honest), honesta; **opening**, ~(iĝ)o; komenco; inaŭguro; stern(iĝ)o; publikigo; (hole), truo, aperturo; (breach), breĉo; (opportunity),

ŝanco, oportuno; (mouth, lit or fig, gen), buŝo; **open-air**, subĉiela; **open-and-shut**, memklara, simpla; **open-ended**, nelimigita; (**out**) **in the open**, (outdoors), subĉiele, en la eksteraĵo; (not hidden), malkaŝita; malkaŝite; **open-minded**, senantaŭjuĝa; **open-work**, aĵura; aĵuraĵo

opera, opero; **operatic**, ~a; **operetta**, ~eto; **opera house**, ~ejo, ~domo; **soap opera**, populara (televida) dramo

operate, (function), funkcii [int]; ~igi; (med; math), operacii [tr]; (direct, manage), direkti [tr], administri [tr]; **operable**, (feasible), farebla, praktika; (med), operaciebla; **operation**, ~(ig)(ad)o; operacio; direkt(ad)o; (activity, enterprise), agado, aktivaĵo, entrepreno; (mil), operaco; (single step in multiple process), manipulo (e.g.: *the first operation is to engage the machine*: la unua manipulo estas kupli la maŝinon); **go into operation**, (become effective, in force), efektiviĝi; **put into operation**, efektivigi; **operational**, (working), ~anta; (workable), ~iva; (in effect), efektiva; **operative**, ~anta; ~iva; efektiva; (med), operacia; (agent), agento; **inoperative**, ne~anta; ne~iva; (w/o result; invalid), senefika, neefektiva, malvalida; **postoperative**, postoperacia; **preoperative**, antaŭoperacia; **operator**, ~iganto; ~igisto; operacianto; (math; console operator of cmpr; etc.), operatoro; (phone), telefonist(in)o

operculum, (gen), operkulo

Ophelia, Ofelia

ophicleide, ofiklejdo

Ophiura, ofiuro; Ophiuroidea, ~oidoj

ophthalmia, oftalmio

ophthalmic, oftalma

ophthalmitis, oftalmito

ophthalm(o)-, (med pfx), oftalm(o)-

ophthalmology, oftalmologio; **ophthalmologist**, ~o

ophthalmometer, oftalmometro

ophthalmoscope, oftalmoskopo; **ophthalmoscopy**, ~io

opiate, opiaĵo

opine, opinii [int]

opinion, opinio; **opinionated**, obstina; **public opinion**, popol~o, publik~o; **have an opinion**, ~i [int]; **in my opinion**, laŭ mia ~o, mia~e, laŭ mi

opium, opio; **opium den**, ~ejo

Oporto, Porto, Oporto

opossum, (zool), didelfo; (pelt, fur), oposumo; **murine opossum**, marmozo

opotherapy, opoterapio

opponent, oponanto; kontraŭulo [see "oppose"]

opportune, oportuna; **opportunism**, ~ismo; **opportunist**, ~isto; **opportunistic**, ~isma; **opportunity**, ~o; **inopportune**, mal~a

oppose, (be against, gen), kontraŭi [tr], ~stari [tr], oponi [int] (al, ke) (e.g.: *he opposed the plan*: li ~is la planon [or] li oponis al la plano); (pol etc.), opozicii [int] (al); (place opposite), ~meti [tr] (e.g.: *opposed thumb*: ~metita polekso); **opposition**, ~(star)o, opon(ad)o; (pol; ast), opozicio; **be opposed to**, ~i, oponi al

opposite, (opposite ideas, antonym), malo; ~a; ~e (e.g.: "*under*" is the *opposite of "over"*: "sub" estas la ~o de "super"; *go in the opposite direction*: iri en la ~a direkto [or] iri ~adirekten; *just the opposite*: tute ~e); (contrary; facing, set against), kontraŭ, kontraŭa (al) (e.g.: *flight opposite to the wind*: flugo kontraŭa al la vento; *their house is opposite ours*: ilia domo estas kontraŭ la nia); (re leaves on stem), kontraŭesidanta; **the opposite gender**, la alia sekso

oppress, (weigh heavily, trouble, gen), premi [tr]; (pol etc.), opresi [tr], tirani [tr]; **oppression**, ~(ad)o; opres(ad)o; **oppressive**, ~a; opresa

opprobrium, (contempt), mallaŭdo; (shame), honto; (infamy), fifamo; **opprobrious**, ~a

opt, **opt for**, elekti [tr] [cp "option"]; **opt out** (of), sin retiri (de, el)

optative, optativo; ~a

optic, (re eye), opta

optical, optika

optician, optikisto

optics, optiko [note sing]
optimism, optimismo; **optimist**, optimisto; **optimistic**, ~a
optimize, optimumo; **optimize**, ~igi; **optimal**, ~a
option, (choice, gen), elekto; (bsns, law, etc.), opcio; (alternative), alternativo; **optional**, ~(ebl)a; opcia; (not mandatory), nedevida, laŭvola, laŭplaĉa, fakultativa
opt(o)-, (pfx), opto-
optometer, optometro
optometry, optometrio; **optometrist**, ~isto
opulent, luksa, riĉa; **opulence**, ~o, riĉeco
Opuntia, opuntio, nopalo; Opuntia ficus-indica, figokakto
opus, verko; **opus number**, (mus), ~numero; **magnum opus**, granda ~o
or, aŭ
-or, (sfx), [see “-er”]
orach(e), atriplo; **garden orache**, ĝarden-~o
oracle, (gen), orakolo; **speak as an oracle**, ~i [int]; **oracular**, ~(ec)a
oral, buŝa
Oran, Orano
orange, (fruit), oranĝo; (tree), ~arbo; (color), ~a; ~o; **bergamot orange**, (fruit), bergamoto; (tree), bergamotarbo; **mock orange**, filadelfo; **sour orange**, **bitter orange**, **Seville orange**, bigarado
Orange, (city; river), Oranĝo; **Orange Free State**, ~io
orangery, oranĝerio
orangutan, orangutano
orate, oratori [int]; **orator**, ~o; **oratory**, ~a; ~aĵo; ~ado; **oration**, ~aĵo [not “oracio”]
oratorio, oratorio
orb, (globe), globo; (sphere), sfero; (body in space), astro; (area inside orbit), orbo
orbicular, (spherical), sfera; (anat), orbikula; **orbicular muscle**, orbikulus, orbikulo
orbit, (gen), orbito; ~i [int]; ~igi; **orbital**, ~a; **deorbit**, el~igi; el~iĝi; **suborbital**, sub~a; **(geo)stationary orbit**, **(geo)synchronous orbit**, (geo)sink-

rona ~o; **parking orbit**, park~o; **orbital injection**, en~igo; **orbital transfer**, trans~igo; **put into orbit**, en~igi; **go into orbit**, en~iĝi
orchard, fruktarbaro, horto
orchestra, orkestro; **orchestral**, ~a; **orchestrate**, ~i [tr]
orchestron, orkestriono
orchid, orkideo; **bird’s-nest orchid**, neotio
Orchidaceae, orkideoj
orchid(o)-, (med pfx), orkid(o)-
orchidotherapy, orkidoterapio
orchiectomy, orkidektomio
orchil, [see “archil”]
orchi(o)-, (med pfx), orkid(o)-
orchis, orkido
Orchis, (bot), orkido
orchitis, orkidito
Orcinus, orcino
Orcus, Orko
ordain, (destine), destini [tr]; (rel), ordini [tr]; **foreordain**, **preordain**, antaŭ~i [tr], antaŭdekrete [tr]
ordeal, (any severe experience), aflikto, penigo; (ancient legal trial), juĝa ~o
order, (orderliness, opp “chaos”; sequence, rank; bot; zool; math), ordo; ~i [tr]; ~iĝi; (command), ordoni [tr]; ordono; (request sale etc., to pay later), mendi [tr]; mendo (e.g.: *I ordered two books from the book service*: mi mendis du librojn de la libroservo); (rel or honorary society etc.), ordeno; (rel rank, as major or minor order), ordino; (state, condition), stato (e.g.: *in working order*: en funkcia stato); (sort, type), speco; (food portion, as in restaurant), porcio; (payment order, gen), asigno, mandato; **orderly**, (neat), neta, bon~a, ~(em)a; (well-behaved), bonkondata; (regular, methodical), regula, laŭmetoda; (mil: servant soldier), servosoldato; (attendant, as in hospital), (hospital)servisito; **disorder**, (chaos), ĥaoso, mal~o, konfuzo; ĥaosigi, mal~i [tr], konfuzi [tr]; (med, tech), perturbo; **disorderly**, sen~a; (chaotic), ĥaosa; (unruly, riotous), malpaca, tumulta; **order form**, **order blank**, mendilo; **order book**, mendolibro; **back-order**, ret-

romendi [tr]; **money order**, mandato; **postal money order**, poŝtmandato; **tall order**, malfacila tasko; **out of order**, (not in sequence), ekster~a; ekster~e; (disordered), sen~a; (not working), nefunkcianta; (against rules), kontraŭregula; **call to order**, (meeting etc.), kunvoki [tr]; **in order to**, por ~i (e.g.: *she climbed the tree in order to see better*: ŝi grimpis la arbon por vidi pli bone); **in order that**, por ke ~u (e.g.: *I wrote in order that you might know*: mi skribis por ke vi sciu); **on order**, mendita; **on the order of**, (about, approximately), ĉirkaŭ, proksimume, pli-malpli; (similar), (iom) simila al; **to order**, (as ordered), laŭmende (e.g.: *made to order*: laŭmende farita)

ordinal, (re order), orda; (re ordination), ordina; ordinlibro

ordinance, (command), komando, ordono; (statute), statuto; (rite), rito

ordinary, (usual, customary), ordinara; (rel: mass book), meslibro; **out of the ordinary**, **extraordinary**, ekster~a

ordinate, ordinato

ordination, ordinado, ordinacio

ordnance, artilerio

Ordovician, ordovicio; ~a

ordure, ekskremento

ore, erco

øre, øre, (\$), oero

oread, oreado

oregano, origano

Oregon, Oregono [note: PIV erroneously applies the name "Oregono" to the Columbia River, hence using "~io" for the state; "~o" can and should be used for the state w/o confusion or misunderstanding]

Orestes, Oresto

Öresund, Øresund, Sundo

organ, (anat, mech part; organ of communication; etc.), organo; (mus instrument), orgeno; **barrel organ**, gurdo; **organ grinder**, gurdisto

organdy, organdie, organdio

organic, (med: re organs, e.g., organic pathology), organa; (chem, bio, ecological, etc.), organika; **inorganic**, ne~a; neorganika

organism, organismo; **microorganism**, mikro~o

organize, organizi [tr]; ~iĝi; **organization**, (group), ~o; (act), ~ado; **disorganize**, konfuzi [tr], malordi [tr], mal~i, des~i [tr]; **disorganized**, (w/o order), senorda, ĥaosa; **reorganize**, re~i [tr]

orgasm, orgasmo; **orgasmic**, ~a

orgy, orgio; **orgiastic**, ~(ec)a

oriel, orielo

orient, (set in direction; determine direction), orienti [tr]; **orientate**, **orient oneself**, **get oriented**, ~iĝi, ~i sin; **orientation**, ~ado; ~iĝo

Orient, (East), Oriento; **Oriental**, ~a; ~ano; **Orientalism**, orientalismo;

Orientalist, orientalisma; orientalista

orifice, orificio

oriflamme, oriflamo

Origanum, origano; **Origanum majorana**, majorano

Origen, Origeno

origin, origino; **original**, (first version; not copy; new in idea), originala; originalo; (re origin), ~a; **originality**, originaleco; **originate**, ~i [int]; ~iĝi, iniciati [tr]

Orinoco, Orinoko

oriole, (Eurasian: *Oriolus*), oriolo; (Am: *Icterus*), ikteruso*; **Baltimore oriole**, Baltimora ikteruso*; **golden oriole**, ~o

Oriolus, oriolo

Orion, (myth; ast), Oriono

Orkney (Islands), Orkadoj

Orleans, (city), Orleano; (region), ~io; **New Orleans**, Nov~o

orlon, orlono

orlop, orlopo

Ormazd, Ormuzd, Ormuzdo [cp "Ahura-Mazda"]

ornament, ornami [tr]; ~aĵo; **ornamental**, ~a; **ornamentation**, ~ado; ~aĵo

ornate, (mult)ornamita

ornery, malafabla, malĝentila, obstina, kalcitrema

Ornithogalum, ornitogalo

ornithology, ornitologio; **ornithologist**, ~o

Ornithopus, ornitopo

Ornithorhynchus, ornitorko

Orobanche, ornobanko
orography, orografio; **orographical**, ~a
 Orontium, orontio
orphan, ofro; ~ino; ~igi; **orphaned**, ~a; **orphanage**, ~ejo
Orpheus, Orfeo; **Orphic**, ~(ism)a; **Orphism**, ~ismo
orpine, sedo
orsted, orstedo
orth(o)-, (pfx), ort(o)-
orthochromatic, ortokromata; **orthochromatism**, ~eco, ~ismo
orthoclase, ortoklazo
orthodontic, ortodenta, ~ika; **orthodontics**, ~iko; **orthodontist**, ~isto
orthodox, ortodoksa; ~ulo(j); **orthodoxy**, ~eco; ~ismo; **unorthodox**, mal~a
orthognathous, ortognata
orthogonal, ortangula
orthography, ortografio; **orthographic**, ~a
orthopedic, ortopedia; **orthopedics**, ~o; **orthopedist**, ~isto
 Orthoptera, ortopteroj
ortolan, hortulano
 Oryctolagus cuniculus, kuniklo
 Oryza sativa, rizo
Osaka, Osako
osazone, ozazono
Oscar, (man's name; movie award), Os-karo
oscillate, oscili [int]; **oscillation**, ~ado; **oscillator**, ~ilo
oscilloscope, oscilografo, osciloskopo
oscillograph, oscilografo
osculate, (kiss), kisi [tr]; (math), oskuli [tr]
 ~ose, (chem sfx), ~ozo
osier, vimeno
Osiris, Oziriso
 ~osis, (sfx), ~ozo
Oslo, Oslo
 Osmerus eperlanus, eperlano
osmium, osmio; **osmic acid**, ~ata acido; **osmate**, ~ato
osmosis, osmozo; **osmotic**, ~a
 Osmunda, osmundo, reĝofiliko
osprey, pandiono, fiŝaglo
Ossa, Osso
osseous, ost(ec)a

Ossian, Osiano
ossicle, osteto
ossify, (lit), ost/igi; ~iĝi; (fig), ŝtonigi; ŝtoniĝi
osteal, ost(ec)a
ostealgia, ostalgio
osteitis, ostito
ostensible, (seeming), ŝajna; (claimed), pretendata
ostentatious, pompa; **ostentatiousness**, ~o
oste(o)-, (anat pfx), ost(o)-
osteogenesis, ost/ogenezzo; **osteogenetic**, ~ogena
osteology, ostologio
osteoma, ostomo
osteomyelitis, ostomedolito, osteomjelito
osteopath, ostopati/isto; **osteopathy**, ~o; **osteopathic**, ~a
osteotomy, ostotomio
ostracism, ostracismo; **ostracize**, ~i [tr]
 Ostrea, ostro
ostrich, struto
Ostrogoth, Ostrogoto
Oswald, Osvaldo
otalgia, otalgio
 Otaria, otario, marleono; Otariidae, ~edoj, orelfokoj
Othello, Otelo
other, (different, not same), alia; ~e (e.g.: *John and two others came*: Johano kaj du ~aj venis; *I want the other shirt, not that one*: mi volas la ~an ĉemizon, ne tiun; *other than that, I don't know*: ~e ol tio, mi ne scias; (remaining), cetera (e.g.: *40 members approved, 30 disagreed, and the others abstained*: 40 membroj aprobis, 30 malkonsentis, kaj la ceteraj sin detenis); **otherwise**, (in other circumstances), ~e, ~okaze; (in other manner), ~maniere; **each other**, unu la ~an, unu al la alia, si(n) reciproke (e.g.: *they insulted each other*: ili insultis unu la alian [or] insultis sin reciproke; *they gave each gifts*: ili donis donacojn al si reciproke [or] al si unu al la alia); **every other**, (alternating), ĉiu dua (e.g.: *I cook every other week*: mi kuiras ĉiun duan semajnon); **in other words**, ~vorte; **among other**

things, inter~e [abb: i.a.]; **the other day** (**week**, etc.), (a few days etc. ago), antaŭ kelkaj tagoj (semajnoj etc.)

Othin, Odino [cp "Wotan"]

-otic, (med sfx), -oza

Otis, (zool), otido

otitis, otito; **otitis media**, meza ~o, timpanito

ot(o)-, (med pfx: ear), ot(o)-

otology, otologio

otoscope, otoskopo; **otoscopy**, ~io

Ottawa, Otavo

otter, lutro

Ottoman, Otomano; ~a

oubliette, ublieto

ouch! (interj), aj!, aŭ!, huj!

ought, devus (e.g.: *I ought to go*: mi devus iri)

ounce, (weight, volume, gen), unco [avoirdupois: 28,35 gramoj; troy: 31,10 gramoj; fluid: 29,58 mililitroj (see § 20)]; (zool: snow leopard), unco

our, ours, nia; **ourselves**, [see "self"]; **of our -ing**, [see "her"]

-ous, (chem sfx: lower valence), -oza; (sfx to indicate presence of something, gen), -(hav)a (e.g.: *porous*: porhava [or] pora); ("full of"), -plena **oust**, elpeli [tr], elŝovi [tr]; **oyster**, ~o, elŝovo

out, (away), for (e.g.: *we live 60 km out from Washington*: ni loĝas 60 km-ojn ~ de Vaŝingtono; *she is out to lunch*: ŝi estas ~ por lunĉo); (forth from inside or behind; eruption; appearance), el, el- [pfx], ekstere(n) (e.g.: *he fell out*: li elfalis; *the smoke drifted out [outside]*: la fumo dravis eksteren; *the children came out to play*: la infanoj elvenis [or: venis eksteren] por ludi; *the dirt washed out*: la malpuraĵo ellavigis); (around, in all directions), dis- [pfx] (e.g.: *give out fliers*: disdoni flugfoliojn; *knock out a wall*: disbati muron); (along), laŭ (e.g.: *drive out Highway 99*: veturi laŭ Ŝoseo 99); (adj: going, leading out etc.), elira (e.g.: *the out door*: la elira pordo); (elec: turned off), malŝaltita; (extinguished, as fire etc.), estingita; (im-

possible, not to be considered), neebila (e.g.: *because of that, our first plan is out*: pro tio, nia unua plano estas neebila); (sports: out of bounds), ekstert-aĉa; (out of fashion, passé), eksmoda; (out of the closet, re gay or lesbian), elkameriginta; (force gay or lesbian out of closet), elkamerigi; [see also "out-"]; **outer**, ekstera; **outing**, (excursion), ekskurso; (forcing gay or lesbian out of closet), elkamerigo; **be out**, (lose \$ etc.), perdi [tr] (e.g.: *I'm out \$4*: mi perdis \$4); **outback**, (hinterland), landinterno; **outbound**, elira; **outlying**, malproksima; **outspoken**, malkaŝema, kandida [not "elparol-"]; **outward**, ekstera, surfaca; ekstere(n); **out in the open**, (outdoors), subĉiela, en la eksteraĵo; subĉiele; (not hidden), malkaŝita; malkaŝite; **out of**, (beyond), preter; (outside), ekster; (made of), el (e.g.: *made out of wood*: farita el ligno); (because of), pro (e.g.: *out of malice*: pro malico); (from), el (e.g.: *the wind is out of the north*: la vento estas el la nordo) **be out of**, (not have), manki al iu, elĉerpiĝi de (e.g.: *we're out of milk*: mankas al ni lakto [or] ni elĉerpiĝis de lakto; *the store is out of that book*: la butiklo elĉerpiĝis de tiu libro); **run out of**, elĉerpiĝi de; **out of it**, **wiped out**, (colloq: stuporous), stupora, spiritomanka, ellaciĝinta; (unconscious), senkonscia; (out of fashion), eksmoda; **out-and-out**, absoluta, ĝisosta; **out of town**, eksterurba; **all out**, tut(kor)e; **be out for**, **be out to**, (have as goal), celi [tr] (e.g.: *he's out for blood*: li celas sangon); **out one's way**, (near one), proksima al iu

out-, (pfx: better, to greater degree), super- [pfx] (e.g.: *outfox*: ~ruzi); (external), ekstera, ekster- [pfx] (e.g.: *outboard*: eksterboata); (going outward), el- [pfx] (e.g.: *outbound traffic*: elira trafiko)

ouzel, (any of *Cinclidæ*), cinklo

oval, ovalo; ~a

ovary, ovario; **ovariectomy**, ~ektomio; **ovaritis**, ~ito

ovation, ovacio; **give an ovation to**, ~i

[tr]

oven, (gen), forno; (cooking), ~o, bakujo; **Dutch oven**, (cooking pot), bakpoto; (preheated brick oven), (antaŭhejta) briko~o; **microwave oven**, mikroonda ~o

over, (above), super (e.g.: *fly over the house*: flugi ~ la domo); (upon), sur (e.g.: *snow spread over the plains*: neĝo sterniĝis sur la prerion); (across), trans (e.g.: *walk over the line*: marŝi trans la linion; (at end of 2-way radio transmission), trans (e.g.: *Do you read me? Over!*: ĉu vi aŭdas min? Trans!); (beyond), preter (e.g.: *go over the limit*: iri preter la limon); (through, throughout), (tute) tra (e.g.: *crime increased over the whole city*: krimo pliiĝis tute tra la urbo); (during), dum (e.g.: *they visited me over the holidays*: ili vizitis min dum la libertagoj); (in preference), prefere al (e.g.: *choose blue over red*: elekti bluan prefere al ruĝo); (concerning), pri (e.g.: *argue over money*: disputi pri mono); (by means), per (e.g.: *talk over the telephone, radio, TV*: paroli per la telefono, radiofonio, televido); (more), pli (ol) (e.g.: *over 200 people came*: pli ol 200 homoj venis; *you must be age 21 or over*: vi devas aĝi 21 jarojn aŭ pli); (finished), finita (e.g.: *the game is over*: la ludo estas finita); (further), plu (e.g.: *stay over for another day*: resti plu dum alia tago); (again), denove, ree, re- [pfx] (e.g.: *write it over*: denove [or] ree verki ĝin [or] reverki ĝin); (here, there), [generally omitted] (e.g.: *it's over there on the shelf*: ĝi estas tie sur la breto; *come over here*: venu ĉi tien); (interj on page, directing reader to turn page), dorsen; [see also "over-"]; **over again**, denove, ree, re- [pfx]; **overall**, tuta, (tut)inkluziva; **overly**, tro, ekscese; **over and above**, aldone al, krom; **over and done with**, nerevokeble finita; **over and out!**, (2-way radio), trans kaj el!; **over and over**, (repeated action), -adi; (more emphatic), -i kaj re...(adi) (e.g.: *explosions sounded over and over*

through the night: eksplodoj bruas kaj rebruas tra la nokto; **overlander**, (Aus), brutpelisto; **left over**, restinta; restanta; **be left over**, resti [int]; **get it over with**, tuj [or] senprokraste fini ĝin

over-, (pfx: above, more), super- (e.g.: *overrun*: ~kuri); (too much), tro- (e.g.: *overwork*: trolaborigi); (beyond), preter- (e.g.: *overstep the bounds*: preterpaŝi la limojn)

overalls, supertuto, kombineo [note sing]

overt, nekaŝita, evidenta, malfermita, aperta

overture, (mus), uverturo; (proposal etc.), propono

overweening, (arrogant), aroganta, orgojla; (excessive), troa

overwhelm, (overpower, overcome), dron/igi, subigi, superverŝi [tr]; (stun), stuporigi; **overwhelming**, ~iga, subiga, superverŝa, neeltenebla; **be overwhelmed**, ~i [int], subiĝi; ne (povi) elteni [tr, int] (kontraŭ); stuporiĝi

overwrought, (nervous), nervoz(eg)a, trostreĉita

ovi-, (pfx: egg), ovo-

Ovibus moschatus, ovibovo

Ovid, (Roman poet), Ovidio; (modern man's name), Ovido

oviduct, ovoidukto

oviform, ovoidea, ovoforma

ovipara, ovonask/uloj; **oviparous**, ~a

Ovis, ovio

ovogenesis, ovogenezo

ovoid, ovoidea; ~o

ovolo, kvaroncirkla plinto [not "ovolo"]

ovulate, ovoli [int]; **ovulation**, ~ado, ~ofalo

ovule, ovolo

ovum, ovo

ow! (ouch!), aŭ!, aj!, huj!

owe, (gen), ŝuldi [tr]; **owing**, ~ata; **owing to**, (because of), pro, ~e al

owl, (gen), strigo; (*Athene noctua*), noktuo; (*Asio otus*), otuso, orel~o; **eagle owl**, (*Bubo*), gufo [not "bubo"]

own, (possess), posedi [tr], proprieti [tr]; (re self), propra (e.g.: *my own opinion*: mia propra opinio); (admit), konfesi [tr]; (acknowledge), agnoski

[tr]; **owner**, ~anto, proprietulo; **co-owner**, kun~anto; **ownership**, ~rajto, ~anteco, proprieto; **disown**, mal-konfesi [tr], malagnoski [tr]; (disinherit), senheredigi; (wife by husband), repudii [tr]; **own up to**, konfesi [tr]; **on one's own**, (by own initiative), propravole; (by own effort), proprapene

ox, (any bovine), bov(in)o; (castrated bull), okso; **oxeye**, (bot: *Buphthalmum*), buftalmo; **oxpecker**, bufago; **musk-ox**, ovibovo; **water ox**, bubalo

oxalate, okzal/ato; **oxalic acid**, ~a acido, etandiacido

Oxalis, oksalido

oxalyl, oksalilo

oxford, (shoe), Oksforda ŝuo

Oxford, (city; university), Oksfordo; ~a

oxidase, oksidazo

oxide, oksido; **oxidize**, ~igi; ~iĝi; **oxidation**, ~igo; ~iĝo

oxim(e), oksimo

Oxonian, Oksforda

oxonium, oksonio

ox(y)-, (chem pfx), oksi-

oxyacetylene, oksacetilena

oxycephaly, akrocefal/eco; **oxycephalic**, **oxycephalous**, ~a

Oxycoccus, oksikoko

oxydase, oksidazo

oxygen, oksigeno; **oxygenate**, (water), ~i [tr]; ~iĝi; (chem), ~izi [tr]

oxymoron, oksimoro

oxytocin, oksitocino

oxytone, oksitona; ~o

oxyuria(sis), oksiuiriozo

oxyuricide, oksiuiricido

Oxyuris vermicularis, oksiuuro

oy! (interj), oj!; **oy vey!**, ho ve!, oj ve!

oyster, ostro; **oyster bed**, ~ejo; **pearl oyster**, meleagreno, perlokonko

ozena, ozeno

ozokerite, **ozocerite**, ozokerito

ozone, ozono; **ozone**, (make ozone), ~igi; (give ozone), ~izi [tr]; **ozonometer**, ~ometro; **ozonosphere**, ~osfero; **ozonotherapy**, ~oterapio

Ozotoceros bezoarticus, venado

P

pa, (dad), paĉjo

pabulum, (lit or fig), bebkaĉo

pabulum, (any food), nutraĵo; (pabulum), bebkaĉo

pace, (step), paŝi [int]; ~o; (walk on), sur~i [tr], trei [tr]; (speed, rate), rapido; (rhythm, beat), takto; (lead), gvidi [tr]; **pacemaker**, (in race etc.; pacesetter), rapidogvidanto; (for heart, anat or mech), korritmigilo; **set the pace**, difini la rapidon (takton); **change of pace**, rapidoŝanĝo; **go (put one) through one's pace**, elprovi siajn (ies) kapablojn; **keep pace with**, ~oteni kun; **pace off**, (measure w paces), ~mezuri [tr]

pasha, paŝao

pachouli, [see "patchouli"]

pachy-, (pfx), paki- [but see "pachyderm"]

pachyderm, paŝidermo

pachydermatous, pakidermia

pacific, (peaceful), paca

Pacific, (ocean), Pacifiko; ~a; **trans-Pacific**, trans~a

pacifism, pacifismo; **pacifist**, ~a; pacifisto

pacify, pacigi; **pacifier**, (for baby), ~ilo

pacinian, (corpuscle), paĉinia

pack, (put compactly into), paki [tr];

~iĝi; (things packed, package), ~o; (backpack), tornistro [cp "pannier"]; (oth packing container), ~ujo (e.g.: *parachute pack*: paraŝuta ~ujo; *film pack*: film~ujo); (of cigarettes, cards, etc.; packet), ~eto; (group of animals etc.), bando, ~aro [sfx] (e.g.: *pack of wolves*: luparo); (compress), kunpremi [tr]; (med, cosmetic), kompreso; (stuff, lit or fig), farĉi [tr] (e.g.: *pack a nose*, *the jury*: farĉi nazon, la ĵurion); [see also "-pack"]

packer, ~isto; **packing (material)**, ~umo; **backpack**, **packsack**, tornistro; **packer**, ~isto; **daypack**, tornistreto; **backpacking**, tranokta marŝado; **go backpacking**, take a backpacking trip, fari tranoktan marŝadon; **pack**

animal (horse etc.), ŝarĝbesto (ŝarĝoĉevalo etc.); **packing case (box)**, ~kesto; **ice-pack**, **pack-ice**, (over water, as in Arctic), bankizo; **send someone packing**, malceremonie forsendi iun

-pack, (sfx: carton), ~pako (e.g.: *a six-pack of beer*: ses~o da biero)

package, pako; ~i [tr]; **packaging**,

~ado; ~aĵo; **prepackage**, antaŭ~i [tr];

package store, alkoholaĵa butiko

packet, (package), paketo; (boat), poŝtŝipo

pact, pakto

Pactolus, Paktolo

pad, (cushion; stamp pad, ink pad), kusen/eto; ~i [tr]; (gauze, cotton ball, etc.), vato; vati [tr]; (med compress), kompreso; (of paper), (paper)bloko; (stuff, as furniture), remburi [tr]; (walk lightly), paŝeti [int]; (launch pad), lanĉejo; (add wrongfully), farĉi [tr] (e.g.: *they padded the expense account*, *the results of the poll*: ili farĉis la elspezokonton, la rezultojn de la opinisondo); **padding**, remburajo; vato

paddle, (for canoe, kayak, table tennis, etc.), pagajo; (propel canoe etc.), ~i [int] (en); ~igi [cp "oar"]; (blade, as of paddlewheel, turbine, oar, etc.), padelo; (splash in water, as w paddle blade; dabble), padeli [int]

paddock, ĉevalkampoj

paddy, (rice field), rizejo

Padova, Padovo

padre, (priest), pastro

Padua, Padovo

paean, peano

paed-, [see "ped-"]

Paeonia, peonio

pagan, pagano; ~a; **paganism**, ~ismo

page, (of book etc.), paĝo; (attendant), paĝio; (call), voki [tr]; **paginate**, ~onumeri [tr], numeri la ~ojn de; **pagination**, ~onumerado; **pageboy**, (haircut), paĝia hararanĝo; **page layout**, (cmprtr preparation of document

for publication), eldon-preparado; eldon-prepara
pageant, spektaklo; **pageantry**, (pageants), ~oj; (pomp), pompo
 Pagellus, pagelo
pagoda, pagodo
 Pagurus, paguro; Paguridae, ~edoj
pah! (interj), pa!
pail, sitelo
pain, doloro; ~i [tr]; **pains**, (care, effort), klopodo(j), peno(j); **painful**, ~ig)a; **painkiller**, ~forigenzo, analgezikio; **painstaking**, diligenta, klopodema, penema; **take pains to**, klopodi [tr]; **on pain of**, sub puno de; **pain in the neck**, (bother), ĉagreno
paint, (art), pentri [tr]; (color, gen), farbi [tr]; farbo; (depict, lit or fig), ~i, figuri [tr]; desegni [tr]; **painter**, ~isto; farbisto; **painting**, (act), ~ado; farbado; (work of art), ~aĵo; (art form), pikturo; **paintbrush**, peniko; **oil-base paint**, olefarbo; **water-base paint**, akvofarbo; **greasepaint**, ŝminoko
pair, paro; ~igi; ~iĝi; **thermoelectric pair**, termoelektrika pilo, termo~o
pajama(s), piĵamo [note sing!]; ~a
Pakistan, Pakistano; **Pakistani**, ~ano; ~a
pal, kamarado, amiko; **pal around (with)**, ~i [int] (kun)
palace, palaco; **palatial**, ~a
paladin, paladino
 Palaemon, palemono
palaeo-, [see "paleo-"]
 Palaeodictyoptera, paleodiktiopteroj
palaestra, palestro
palanquin, palankeen, palankeno
palatable, agrabla, bongusta; **unpalatable**, mal~a, malbongusta
palate, palato; **palatal**, (re palate), ~a; (bone; phon), palatalo; **palatitis**, ~ito
Palatinate, Palatinato
palatine, palatino
Palatine, Palatino
palaver, palavro; ~i [int]
pale, (not bright), pala; ~igi; ~iĝi; (stake), paliso; (limit), limo
palea, paleo
Paleocene, paleoceno; ~a
paleograph/y, paleografio; **paleogra-**

pher, ~o
paleolithic, paleolitiko; ~a
paleontology, paleontologio; **paleontologist**, ~o
Paleozoic, paleozoiko; ~a
Palermo, Palermo
Palestine, (modern), Palestino; (ancient), Filiŝtujo; **Palestinian**, ~ano; ~a; Filiŝta
palestra, palestro
palette, paletro
Pali, (la) Palia (lingvo)
palimpsest, palimpsesto
palindrome, palindromo
palinode, palinodo
 Palinurus, palinuro, langusto
palisade, (pole), paliso; (fence of same), ~aro; (escarpment), krutaĵo
pall, (bore), tedi [tr]; (funeral cloth), ĉerkotuko; (any dark covering, veil, etc.), vualo, mantelo; (dusky gloom), krepusko; **pallbearer**, ĉerkoportanto
palladium, (metal), paladio
Palladium, (statue), Paladio
Pallas, (goddess), Palasa; (man's name; asteroid), ~o
pallet, (bed), litaĉo; (platform for forklift), (tabul)paledo†; (storage chest), (pak)kestego; (potter's tool), platigilo; **palletize**, paledizi† [tr]
palliasse, pajl/matraco, ~olito
palliate, mildigi; **palliative**, paliativo; ~a
pallid, pala
pallium, (gen), paliumo
pallor, paleco
palm, (tree, gen), palmo; (of hand), polmo, manplato; **palm off**, forĵongli [tr], trompdoni [tr]; **palm reading**, **palmy**, kiromancio; **palm reader**, **palmy**, kiromanciisto; **Palm Sunday**, P~odimanĉo, P~festo; **betel palm**, kateĉuareko; **cabbage palm**, (Aus: *Livistona australis*), basikarbo; **coconut palm**, kokosarbo, kokos~o; **date palm**, daktil~o [see "date"]; **jupati palm**, **raffia palm**, rafio; **sago palm**, cikaso, sagu~o
 Palma, (bot), palmo; Palmae, ~acoj
palmetto, palmeto
palmiped, palmipedo
palmitate, palmitato; **palmitic acid**, ~a

acido, heksadekan-acido
palomino, kremkolora ĉevalo
palp, ĉiro
palpable, palpebla
palpate, palpi [tr, int]
palpebral, palpebra; **palpebritis**, ~ito, blefarito
palpitate, palpitacii [int]; **palpitation**, ~o
palpus, ĉiro
palsy, paralizo; ~i [tr]
paltry, nura, bagatela
Pamir, Pamira; **Pamiri**, ~ano; **Pamirs**, (Mountains), ~o
pampa, (gen), pampo; **Las Pampas** (of Argentina), la P-oj
pamper, dorloti [tr]
pamphlet, (gen informative), broŝuro; (pol attack, satire), pamfleto, agit-folio; **pamphleteer**, pamfletisto; pamfletadi [int]
Pamplona, Pampluno
pan, (shallow, as frying pan), pato; (deeper pot), potoj; (for washing, as dishpan), kuveto, pelvo; (scale tray), pespleto; (wash for gold), orlavi [tr]; (phot), panoram(ad)i [tr, int]; (criticize), mallaŭdi [tr]; **panhandle**, (of pan; strip of land), ~tenilo; (beg), almozi [tr]; **panhandler**, almozulo; **pan out**, (succeed), sukcesi [int]; (have any result), rezulto [int]; **bed-pan**, litpelvo; **frying pan**, (frit)~o
Pan, (myth), Pajno; **Panpipes**, pipes of **Pan**, ~oŝalmo [note sing]
Pan troglodytes, (zool), ĉimpanzo
pan-, (pfx: all), tut- (e.g.: *Pan-American*: tut-Amerika) [note: sometimes absorbed into Esperanto root as "pan-"; see separate entries below]
panacea, panaceo
panache, (plume), plumaro; (flair), brilo, puceco
Panama, (country), Panam/io; **Panama Canal**, Kanalo de ~o; **Panama City**, ~o
Panax, panako; **Panax schinseng**, **Panax ginseng**, ginsengo
panchromatic, pankromata
pancratium, (sport), pankracio
Panocratum, (bot), pankracio
pancreas, pankreato; **pancreatic**, ~a;

pancreatotomy, ~ektomio; **pancreatitis**, ~ito
pancreatin, pankreatino
panda, (gen), pando; **lesser panda**, (*Ailurus fulgens*), malgranda ~o; **giant panda**, (*Ailuropoda melanoleucus*), granda ~o
Pandalus, pandalo; **Pandalidae**, ~edoj
Pandava, Pandavo(j)
pandemic, (prevalent everywhere, gen), ĉiea, universala; (disease), pandemio*
pandemonium, **Pandemonium**, pandemonio
pander, prostituisto, parigisto; **pander to**, fiflati [tr]
Pandion, pandiono, fiŝaglo; **Pandionidae**, ~edoj
Pandora, Pandora
pane, (glass), vitro(panel)o; (wood panel etc.), panelo
panegyric, panegiro; **panegyric**, ~a; **panegyryze**, ~i [int]
panel, (covering of wood etc.; instrument panel etc.), panelo; ~i [tr]; (group), grupo, ~aro [sfx] (e.g.: *panel of judges*: juĝistaro)
pang, ekdoloro
panga, maĉeto
panolin, maniso
panic, (fear; grass), paniko; ~i [tr]; ~iĝi
panicle, paniklo
Panicum, paniko; **Panicum miliaceum**, milio
pannier, (modern pack for bicycle, horse, etc.), flanktornistro; (basket on back), dorskorbo
Pannonia, Panonio
panoply, panoplio; **panoplied**, ~izita
panoptic, panoptika; ~o
panorama, panoramo; **panoramic**, ~a
pansy, violego, trikoloreto
pant, (gasp), anheli [int]; ~o
Pantagruel, Pantagruelo
pantechnicon, (truck), meblokamiono
pantheism, panteismo; **pantheist**, ~a; panteisto
pantheon, panteono
Pantheon, Panteono
panther, leopardo, pantero
pantoff(l)e, pantoflo
pantograph, (gen), pantografo
pantomime, pantomimo [cp "mime",

“mummer”]

pantothenic, pantotena; **pantothenic acid**, ~a acido

pantoum, pantumo

pantry, manĝosranko

pants, pantalono [note sing]; **panty**, **panties**, kalsoneto [note sing]; **underpants**, (modern briefs), kalsone-to; (old-fashioned, long), kalsono

Panurge, Panurgo

panus, panuso

pap, (nipple), cico; (mush), kaĉo

papa, paĉjo

papacy, papeco

papain, papino

papal, papa

many times, ofte, multfoje, multajn fojojn; **mark time**, starmarŝi [int]; (wait), por~e atendi [tr, int]; **mean time**, [see "standard time" below]; **Greenwich Mean Time**, Grenviĉa Meza T~o [abb: GMT] [also see "Universal Coordinated Time" below; for oth time zones, see following "standard time" below]; **next time**, la venontan fojon, venontfoje; **on time**, (punctual), akurata; akurate; (to be paid in installments), partopaga; partopage; **on one's own time**, dum sia libera ~o; **one-time**, (former), iama, antaŭa, eksa; (on one occasion only), unufoja; **overtime**, (pay for overtime work), krompago, kromsalajro; (the work), krom~o, kromlaboro; **pass the time of day**, saluti (sin reciproke); **prime-time**, ĉef-hora; **real time**, reala ~o; **serve (one's) time**, resti en prizono; **since time immemorial**, de post ~o nememorebla; **standard time**, meza ~o; **Newfoundland, Atlantic, Eastern, Central, Mountain, Pacific, Alaska, Hawaii, Bering Standard Time**, Novlanda, Atlantika, Orienta, Centra, Montara, Pacifika, Alaska, Havaja, Beringa Meza T~o [note: abbreviations for these North American time zones are not universally understood in Esperanto and hence should be avoided]; **Universal Coordinated Time**, Universala T~o; **Chicago time, Moscow time, Sydney time, (etc.)**, (clock time in specified place w/o naming zone), ~o de Ĉikago, Moskvo, Sidnejo (etc.); **summer time**, [see "daylight savings time" above]; **take up someone's time**, okupi ies ~on; **the time has come (for, to)**, la ~o jam venis (por, ke); **the time is ripe**, jam estas la ĝusta tempo; **there's a time for everything**, al ĉio sia ~o; **there's no time like the present**, nun estas la plej bona momento; **three (etc.) times running**, tri (etc.) fojojn sinsekve; **what time is it?**, kioma horo estas?; (colloq), kiomas? [see also "o'clock"]; **while away the time**, forpasigi la ~on

timid, timida; **timidity**, ~eco

Timor, Timoro

timorous, timida, timema

timothy, (bot), fleo

Timothy, (man's name), Timoteo

timpano, (kettledrum), timbalo [not "timpano"]; **timpani**, ~oj; **timpanist**, ~isto

Timur, Timuro

tin, (metal), stano; (coat w tin), ~i [tr]; (Br: seal in cans, or the can), [see "can"]; **tinsmith**, ~isto; **tin-snips**, ĉizoj [note sing]

tinamou, tinamo

Tinamus, tinamo; Tinamiformes, ~oformaj (birdoj)

Tinca, tinko

tincture, (gen), tinkturo; ~a; ~i [tr]

tinder, tindro

tine, dento

tinea, (skin infection), tinio; **tinea amiantacea**, amianteca ~o; **tinea favosa**, fava ~o, favo

Tinea, (zool), tineo; Tineidae, ~edoj

ting, tinti [int]; ~igi; ~o

ting-a-ling, ting-ting, (etc.), (jingling sound, onom), tin tin tin, giling-gilang

tinge, nuanco; ~i [tr]

tingle, piketadi [tr, int]; ~o

tinker, (putter, work w), laboreti [int], amatori [int]; pri~i [tr]; (tinsmith), ladisto

tinkle, tinti [int]; ~igi; ~(ad)o

tinsel, brilajeto; ~a

tint, (kolor)nuanco; ~i [tr]

tintinnabulation, sonorado

tintype, (process), ferotipio; (product), ~aĵo

tiny, eta

tip, (gratuity), gratifiko, trinkmono; ~i [tr], trinkmonigi; (top, apex; point, end, as of pencil), pinto; pintigi; (hit glancing blow), tanĝe frapi [tr]; tanĝa frapo; (suggestion), sugesto; (secret information), kaŝinformo; (raise slightly), leveti [tr]; levetiĝi; (tilt, lean), klini [tr]; kliniĝi; **tip off**, malkaŝi [tr], riveli [tr] (la sekreton al); **tip over**, (overturn), renversi [tr]; renversiĝi; **tiptop**, (highest), (plej alta) pinto; (best), plej bona

tippet, pelerino

tipple, (drink), drinkadi [int]; (mining), malŝarĝilo

tipsy, (unsteady), malstabila, ŝanceliĝema; (drunk), ebr(et)a

Tipula, tipulo

tirade, riproĉ/(eg)o, ~bombasto, ~deklamado

tirailleur, tiraljoro

Tirana, Tirano*

tire, (pneumatic, for car, bicycle, etc.), pneŭo, pneŭmatiko; (fatigue), lacigi; lacigiĝi; (bore), enuigi; enuigiĝi; **tired**, laca; enua; **be tired**, laci [int]; enui [int]; **dead tired**, lacega, ellaciĝinta; **tiring**, laciga; teda, enuiga; **tireless**, senlaca; **tiresome**, (boring), teda, enuiga; **tire chain**, ~ĉeno; **tire tool**, (to remove tire from rim), ~levilo; **all-weather tire**, ĉiavetera ~o; **flat tire**, malŝvela ~o; **snow tire**, neĝo~o; **spare tire**, krom~o, vic~o; **tube-type tire**, ~o kun interna aertubo; **tubeless tire**, sentuba ~o

Tiresias, Tirezio

Tisa, (river), Tiso

tisane, tizano

tissue, (soft paper, as toilet tissue, facial tissue), tualetpapero; (firmer, for wrapping, protecting pictures, etc.), silkopapero; (gauze), gazo; (organic, as flesh, bone, etc.), histo; **connective tissue**, konektivo

Tisza, (river), Tiso

tit, (titmouse), paruo; (teat), cico; (breast), mamoo; **tit for tat**, bato por bato

Titan, (myth; ast), Titano

titanate, titanato

Titania, (ast), Titanio*; (myth), ~a

titanic, (gigantic), titana, kolosa; (chem: re titanium), ~a; (w valence 4), ~ata;

titanic acid, ~ata acido

titanium, titano†

titbit, frandaĵeto

titer, titro

tithe, dekonoĝo; kontribui per ~o

titi, kalicebo, titio

Titian, Ticiano

Titicaca, (Lake), Lago Titikako

titillate, tikli [tr]

titivate, beligi (sin), pimpigi (sin)

titlark, pipio

title, (name of book etc.; term of address, as "doctor" etc.; section of law etc.), titolo; ~a; ~i [tr]; (claim, right), rajto; (right of ownership), posedrajto; (document, deed), posedakto; **subtitled**, (gen), sub~o; sub~i [tr]; **titled (person)**, ~ulo

titmouse, paruo

titrate, titri [tr]; **titration**, ~ado

titre, titro

titter, subridi [int]; ~o

tittle, joto, streketo

titular, (re title; titled), titol(it)a; (nominal, in name only), titulara

Titus, Tito

tizzy, ekscit/iĝo; **in a tizzy**, ~ita

tmesis, tmezo

TNT, (abb of "trinitrotoluene"), TNT [abb of "trinitrotolueno"]

to, (motion or direction toward; gen relation, possession, etc.; addition or completion; etc.), al (e.g.: *we were flying to London*: ni flugis ~ Londono; *a ticket to the play*: bileto al la dramoo; *it seems to me*: ŝajnas ~ mi; *it belongs to him*: ĝi apartenas ~ li; *add 3 to 5*: adicii 3 ~ 5); (motion reaching goal, completing action, achieving state; until), ĝis (e.g.: *we flew to London*: ni flugis ĝis Londono; *a fight to the death*: batalo ĝis la morto; *wet to the skin*: malseka ĝis la haŭto; *open from 9 to 6*: malfermita de la 9-a ĝis la 6-a); (in conformity, according to), laŭ (e.g.: *it's too sweet to my taste*: ĝi estas tro dolĉa laŭ mia gusto); (in order to), por (~i) (e.g.: *I went there [in order] to visit a friend*: mi iris tien por viziti amikon); (before infinitive), [not translated] (e.g.: *I want to go*: mi volas iri; *to err is human*: erari estas home); **to and fro**, tien kaj reen

toad, bufo; **toadflax**, linario; **ivy-leaved toadflax**, cimbalario; **toadstool**, (venena) fungoo; **toady**, lakeoo; **tree toad**, hilo

toast, (bread: each slice), toasto (e.g.: *two slices of toast*: du ~oj); (heat, cook), rosti [tr]; (drink to health etc.), tosto; tosti [tr]; **toaster**, panrostilo; **toastmaster**, toastmistress, preleĝestr(in)o; **French toast**, ovaĵpano

tobacco, tabako; ~a; **tobacconist**, ~isto; **tobacco plant**, nikotiano; **chewing tobacco**, mač~o; **chew tobacco**, ~mači [int]

Tobiah, Tobias, Tobio

Tobit, Tobio

toboggan, tobogano

Toby, Tobio

toccata, tokato

Tocharian, toĥario; ~a

tocology, obstetrikio, tokologio

tocopherol, tokoferolo; **alpha-tocopherol**, alfa~o; **beta-tocopherol**, beta~o

tocsin, (bell), alarmsonor/ilo; (sound), ~ado

today, (adv), hodiaŭ (e.g.: *it arrived today*: ĝi alvenis ~; *today is hot*: ~ estas varme; *today's*, la ~a (e.g.: *today's newspaper*: la ~a ĵurnalo)

toddle, paŝeti [int]; **toddler**, ~anto, ~ulo

toddy, grogo

toe, (of foot), pied/fingro; ~umi [tr]; (of shoe etc.), (ŝu)antaŭo; **toehold**, ~oteno; **toe-in**, (re car wheels etc.), konverĝeco; **toenail**, ~ungo; **tiptoe**, ~pinto; ~pinta; ~pinte; marŝi [int] ~pinte; **on tiptoe(s)**, ~pinte; **on one's toes**, viglega; **tread on one's toes**, ofendi iun

toffee, tofeo*

tofu, tohuo

toga, togo

together, kune(n); ~a; kun- [pfx] (e.g.: *he pushed the books together*: li ~puŝis la librojn [or] li puŝis la librojn ~en); **togetherness**, ~eco; **together with**, ~e ~; **"alone together"**, (man and woman together), gesolaj; gesole

toggle, (rod, pin, etc.), stifto; (elec) switch back and forth), reŝaltiĝ(ad)j

Togo(land), Togolando

toil, labor/adi [int], ~egi [int]; ~ado, ~ego; **toilsome**, ~iga, peniga

toilet, (flushable fixture for excretion), klozeto; ~a; (any toilet facility, including nonflushable), fekseĝo; (room), necesejo; (grooming, toilet-ry), tualetio; tualeta; **toilettry, toilette**, tualetio; **toilettries, toilet articles**, tualetaĵoj; **toilet bowl**, klozeta pelvo;

toilet paper, ~papero; **toilettries case**, tualetaĵujo

Tokay, (region in Hungary), Tokajoĥ; (re wine), ~a

token, (for bus, tolls, games, etc.), ĵetono; (sign, mark), signo, simbolo; (slight, nominal), nominala; **betoken**, (show), signi [tr], montri [tr]; (presage), aŭguri [tr]; **by the same token**, (in same way), sammaniere; (for same reason), samkiale

Tokharian, Tokharic, toĥario; ~a

Tokyo, Tokio

Toledo, (gen), Toledo

tolerate, toleri [tr]; **tolerable**, ~ebla; **tolerance**, (ability to tolerate, as re disease), ~ateco; (inclination to tolerate, as re differing opinions), ~emo, ~o; (mech: tolerable variation), ~o; **tolerant**, ~ema; **intolerable**, ne~ebla; **intolerance**, ne~emo; ne~ateco; **intolerant**, ne~ema

toll, (any tax), imposto; (bridge), pont~o; (road), voj~o; (adj: requiring toll), pag- [pfx] (e.g.: *toll bridge*: pagponto; *toll road*: pagvojo; *toll call*: pagvoko); (number, sum lost etc.), (perdo)sumo (e.g.: *the storm's death toll reached 23*: la mortosumo de la ŝtormo atingis 23); (ring bell), (mort)sonori [int]; (mort)sonorigis

tolu, (resin), toluo; **toluene**, ~eno; **toluidine**, ~idino; **toluol**, toluolo, tolueno; **toluyl**, ~ilo **tolu balsam, balsam of Tolu**, ~balzamo

Tom, Tom(ĉi)o, Toĉjo

tomahawk, tomahoko

toman, tomano

tomato, (plant or fruit), tomato; **cherry tomato**, ~eto; **strawberry tomato**, fizaralido

tomb, tomo; **entomb**, en~igi; **tombstone**, ~oŝtono

tombac, tombak, tombako

tombola, tombolo

tome, volumo

~tome, (med sfx), ~tomo; **~tomic**, ~a; **~tomize**, ~izi [tr]; **~tomy**, ~io

tomography, tomografio

tomorrow, (adv), morgaŭ (e.g.: *we will arrive tomorrow*: ni alvenos ~; *tomorrow will be hot*: ~ estos varme); **to-**

morrow's, la ~a (e.g.: *tomorrow's newspaper*: la ~a ĵurnalo); **day after tomorrow**, post~; **a week from tomorrow**, ~ post semajno

tomtit, (titmouse), paruo

tomtom, tamtamo; ~i [int]

ton, (unit of weight, gen), tuno [note: unless context is clear, avoid confusion by using "tuno" only in the metric sense (see § 20); see subentries below; however, since the American ton and British ton are each close in size to the metric ton, one can translate either of those tons as "tuno" when an exact weight is not expressed (e.g.: *large trucks weighing several tons*: grandaj kamionoj pezantaj plurajn ~ojn)]; (unit of ship volume, register ton [2,83 m³ or 100 ft³]), tonelo; (unit of air-conditioner capacity [12 000 BTU]), 3024 (grandaj) kalorioj; **kiloton**, kilo~o; **tonage**, (weight), ~aro; (capacity), tonelaro; **short ton**, (Am: 2000 pounds), 0,7072 (metra) ~o; **long ton**, (Br: 2240 pounds), 1,016 (metraj) ~oj; **register ton**, tonelo; **measurement ton**, **freight ton**, (40 ft³), 2,5 toneloj; **displacement ton**, (35 ft³), 2,86 toneloj

tonal, (re any tone), tona; (re mus tonality), tonala; **atonal**, netona; netonala; **tonality**, ~eco; (key), tonalo

tone, (mus, sound, color, nuance, manner, etc.), tono; ~igi; (of muscle or oth organ), tonio; (elasticity, as of rubber), elasteco; **toner**, (phot; for photocopy machine, laser printer, etc.), ~enzo; ~iga bano; **tone cluster**, ~fasko; **tone down**, moderigi, mildigi; **half-tone**, (mus, art), duon~o; duon~a; **overtone**, (gen), krom~o; **semitone**, duon~o; **two-tone**, (2 colors), du~a; **twelve-tone**, (mus), dekdu~a

toneme, tonemo

Tonga, Tongo†

tongs, prenilo [note sing]; **fireplace tongs**, fajro~o

tongue, (anat, or any similar object), lango; (of land), ter~o; (small piece, as on oboe; tab, as for soldered con-

nection; etc.), ~eto; (mus: act on by tongue, as re wind instrument), ~i [tr, int]; (language, gen), lingvo; (local language), idioma [cp "dialect", "language"]; **tongue and groove**, ~o kaj foldo; **tongue-in-cheek**, ~en-vanga; ~en-vange; **with tongue in cheek**, kun ~o en la vango, ~en-vange; **tongue-lash**, riproĉegi [tr]; **tonguetied**, (as from fear etc.), konsternita; **tongue-twister**, ~otordilo; **mother tongue**, gepatra lingvo; **hold one's tongue**, regi la ~on, bridī la buŝon; **be on the tip of one's tongue**, ŝvebi sur la ~o, esti sur la pinto de la ~o

-tonia, (med sfx: tone), ~tonio

tonic, (mus; med), toniko; ~a; **subtonic**, sub~o

tonight, ĉi~nokte, hodiaŭ vespere, ĉi~vespere; **tonight's**, la ĉi~nokta, la ĉi~vespera

tonka, (bean), tonka* fabo

Tonkin, Tonkino; **Gulf of Tonkin**, Golfo de ~o

tonolysis, tonolizo

tonsil, tonsilo; **tonsillectomy**, ~ektomio; **tonsillitis**, ~ito

tonsilla, **tonsilla palatina**, tonsilo

tonsorial, barbira

tonsure, tonsuro; ~i [tr]

tonus, tonio

Tony, (man's nickname), Tonĉjo

too, (excessively), tro (e.g.: *it is too big*: ĝi estas ~ granda; *you speak too fast*: vi parolas ~ rapide); (also), ankaŭ [see "also"]; (indeed), ja (e.g.: *he said I couldn't bicycle that far, but I can too do it!*: li diris ke mi ne povas bicikli tiel malproksimen, sed mi ja povas fari ĝin!); **too much**, **too many**, ~ (da), ~ multe (da) (e.g.: *you talk too much*: vi babilas ~ [or: ~ multe]; *he put in too much salt*: li enmetis tro (multe) da salo); **much too much**, **much too many**, multe ~ (da)

tool, (gen), ilo; (specified type), ~ilo [sfx] (e.g.: *sharpening tool*: akrigilo); (form, work w a tool), prilabori [tr]; **tool up**, ilarizi [tr]; ilariziĝi; **hand tool**, mana ~o [not "manilo"]; **power tool**, pova ilo, povo~ilo [not "potenca ilo"; not "povilo"]

toot, (whistle etc.), fajfi [int]; ~igi; ~o; (car horn etc.), hupi [int]; hupigi; hupado; (onom, gen), hup!

tooth, (anat, or similar object), dento; (of gearwheel), noĉo†; (provide w teeth), ~izi [tr]; (notch, make jagged), noĉi [tr]; **toothache**, ~odoloro; **toothbrush**, ~obroso; **toothpaste**, ~opasto; **toothpick**, ~opikilo; **toothwort**, (*Lathraea*), latreo; **eye-tooth**, (canine), kanino; **false teeth**, ~a protezo, artefarita ~aro [note sing]; **sweet tooth**, dolĉavido; **wisdom tooth**, saĝo~o; **tooth and nail**, furioze; **in the teeth of**, plene kontraŭ; **sink one's teeth into**, (fig), (plene) sin miksi en, plen~e mordi [tr]

tootle, (whistle), fajfeti [int]; ~o; (car horn etc.), hupeti [int]; hupetado

top, (highest point, summit; lid, cover; etc.), supro; (surface), ~aĵo; (of convertible car, camper top for pickup truck, etc.), kovrumo, kapuĉo; (seats on top of bus etc.), imperialo; (child's spinning toy), turbo; (platform on ship mast), topo; (primary, main), ĉefa; (exceed, surpass), superi [tr]; (cross top of rise of ground etc.), suriri [tr]; (be at head of, lead), estri [tr]; **topless**, sen~a; sen~e; **top-notch**, unuaranga; **topping**, sur(verŝ)aĵo; **on top**, ~e; **on top of**, sur; **on top of that**, ne nur tio; aldone al tio, krom tio; **top off**, kompletigi, fini [tr]; **top up**, replenigi; **blacktop**, asfalto; asfalti [tr]; **blow one's top**, perdi sian sinregon, ekkolerigi

topaz, topazo

topee, sunkasko

topgallant, bramo; ~a; **topgallant sail**, ~velo

tophus, tofo

topiary, (the art), arbotondarto; ~a; (topiary work), ~aĵo

topic, (theme, subject), temo; (rhetorical category), topiko; **subtopic**, sub~o; **topical**, (local), loka; (arranged by topic), laŭ~a; (current), aktuala

topinamb(o)ur, topinamburo

topography, topografio; **topographic(al)**, ~ia; **topographer**, ~o

topology, topologio; **topological**, ~a

toponymy, toponimio

topple, (overturn, fall), renversi [tr], faligi; ~iĝi; (totter), ŝanceli [tr]; ŝanceliĝi

topsy-turvy, tohuvabohuo; ~a, renversita; ~e

toque, ĉapo

tor, pintmonteto

Torah, Torao

torch, (flaming stick etc.; for welding etc.), torĉo; (Br: flashlight), poŝlam-po; **blowtorch**, blov~o; **cutting torch**, tranĉ~o

toreador, toreisto, toreadoro

torii, torijo

Torino, Torino

torment, turmenti [tr]; ~o

tornado, (gen), tornado; (whirlwind), trombo

toroid, toroido

Toronto, Toronto

torpedo, torpedo; ~i [tr]

Torpedo, torpedo

torpid, torpora; **torpor**, ~o

torque, tordo

Torquemada, Torkemado

torrent, torento; **torrential**, ~a

torrid, varm/ega, brul~a, arda

torsion, tord/ado; **torsion bar**, ~ostango

torso, torso

tort, delikt/eto; (more precise), nekontrakta civila ~o

torticollis, tortikolo

tortilla, maizpaneto

tortoise, (land tortoise, *Testudo*), testudo; (sea tortoise, *Chelonia*), helonio

Tortrix, tortriko

tortuous, serpenta, sinua; **tortuosity**, ~eco, sinueco

torture, torturi [tr]; ~(ad)o

torus, (math; geom), toro; (of flower), toruso, receptaklo

toss, (throw), ĵeti [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (flip coin etc.), frapeti [tr]; frapeto; **toss about**, (knock, bump), ŝanceladi [tr], skuadi [tr]; ŝanceliĝadi, skuiĝadi; **toss-up**, (equal chance), egalŝanco; **toss and turn**, (be restless), ~iĝadi

tot, (child), etulo; (Br: add up), sumigi

total, totalo, tuto; ~a, tuta; ~igi, sumigi; **totality**, ~eco; ~aĵo; **totalizator**, **totalizater**, (gen), totalizatoro; subto-

tal, sub~o; sub~igi; **teetotal**, tuttua, absoluta; **teetotaler**, abstinulo
totalitarian, total/isma; ~isto; **totalitarianism**, ~ismo
tote, (carry), porti [tr]; **tote bag**, ~osaketo
totem, totemo; ~a; **totemism**, ~ismo; **totem pole**, ~fosto
totter, ŝanceliĝi; ~o
toucan, tukano
touch, (contact, feel, make impression on, etc., gen), tuŝi [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (sense of feel), ~ado; (palpate), palpi [tr, int]; (concern), koncerni [tr]; (relate to, have to do w), aludi [tr], temi pri, rilati al; (stir feelings), emocii [tr], afekcii [tr], kor~i [tr]; (skill), lerteco (e.g.: *I've lost my touch with tennis*: mi perdis mian lertecon ĉe teniso); (small amount, trace), nuanco, gusteto (e.g.: *a touch of sadness in her voice*: nuanco de malĝojo en ŝia voĉo); (child's game), ~ludo; **touching**, (impressing emotions), kor~a; **touchy**, (taking offense), ofendiĝema; (delicate), delikata; **touch down**, (plane etc.), surterigi, alterigi; surteriĝi, alteriĝi; **touchdown**, (landing), surteriĝo; (football), celtrafo; **touchline**, ~linio; **touch-me-not**, (bot), ne~umino, ĝardena balzamino; **touch off**, (set off, detonate, lit or fig), eksplodigi; **touch on**, (supraĵe) rilati al, aludi [tr], trakti [tr]; **touchstone**, ~ŝtono; **touch up**, (photo etc.), re~i [tr]; **touch upon**, aludi [tr], koncerni [tr]; **touchwood**, tindro; **retouch**, (phot etc.), re~i [tr]; **a touch of**, (slight amount), iomete da, nuanco da, gusteto da; **touch-and-go**, necerta, kriza, delikata; **in touch (with)**, en kontakto (kun); **keep in touch (with)**, resti en kontakto (kun); **lose touch (with)**, perdi kontakton (kun); **get in touch (with)**, kontaktiĝi (kun)
touché trafite
tough, (resistant), rezista; (strong), fortika; forta [see "strong"]; (firm), firma; (hard), malmola, hardita; (tenacious), tenaca; (difficult), malfacila; (unfortunate), malfeliĉa; (hoodlum), gangstero, bandito; **toughen**, fortiki-

gi; fortikiĝi; fortigi; fortiĝi; firmigi; firmiĝi; hardi [tr]; hardiĝi

Toulon, Tulono

Toulouse, Tuluzo

toupee, peruketo

tour, (trip), veturo, vojaĝo; ~i [int], vojaĝi [int] (tra, al, en, ĉirkaŭ); (as by performing group to various cities), turneo; fari turneon (tra, al, etc.); **tourism**, turismo; **tourist**, turisma; turististo; **tour of duty**, deĵorperiodo; **on tour**, (re performer etc.), en turneo

Touraine, Tureno, Turlando

tourmaline, turmalino

tournament, turniro; ~i [int]

turnedos, turnedoso

tourney, turniro; ~i [int]

tourniquet, turniketo

Tours, (city), Turo

tousle, taŭzi [tr]

tout, (praise), laŭdi [tr], paradigi; (solicit), varb(aĉ)ji [tr]

touze, taŭzi [tr]

tow, (pull behind, drag), treni [tr]; ~iĝi; ~(iĝ)o; (pull as trailer), remorki [tr]; remorkiĝi (e.g.: *we drove to the beach towing a boat*: ni veturis al la strando remorkante boaton); (fiber), stupo; **in tow**, ~ata; remorkata; **undertow**, kontraŭfluo; **tow-headed**, stup-hara
toward(s), (in direction of), al (e.g.: *walk toward town*: marŝi al la urbo; *steps toward peace*: paŝoj al la paco) [cp "to"]; (more emphatic), cele al, direkte al; (concerning, about), pri, al (e.g.: *antipathy toward new music*: antipatio pri nova muziko); (close to), ĉirkaŭ (e.g.: *toward sunset*: ĉirkaŭ la sunsubiro); (for; as goal), por, cele ~ (e.g.: *save toward a new car*: ŝpari por [or] cele ~ nova aŭto)

towel, (gen), viŝtuko; ~i [tr]; (for bath), bantuko; (any small towel), mantuko; **throw in the towel**, kapitulaci [int]

tower, (structure, gen), turo; (rise high, stand high over), ~i [int], alte leviĝi, alte stari [int]; (high-voltage elec transmission tower, pylon tower), latismasto; **conning tower**, rekognoska ~o; **wachtowel**, gvato~o

town, (small city), urb/eto; (re any urban area), ~o; ~a (e.g.: *town plan*

ning: ~a planado; *I'm going to town*: mi iras al la ~o); **town hall**, ~domo; **townhouse**, (in continuous row), vicdomo; **township**, komunumo; **down-town**, (town center), ~centro; ~centra; ~centre(n); **uptown**, ekster~centra; ekster~centre(n)

toxemia, toksemio

toxic, toksa; **toxicity**, ~eco; **toxicology**, ~ologio; **toxicologist**, ~ologo; **detoxify**, **detoxicate**, sen~igi

toxin, (any toxic substance), tokso; (specific toxin from microbe etc.), toksino; **antitoxin**, anti~a; antitoksino

toy, (for play), ludilo; (toy copy of specified thing), ludil- [pfx] (e.g.: *toy giraffe*: ~ĝirafo); **toy with**, (play w), ludi [int] per; (dabble), diletanti [int] kun; (consider, as idea), konsideri [tr], pripensi [tr]

trabecula, trabeklo

trace, (copy drawing etc.), paŭsi [tr]; ~iĝi; (track, footprint, etc., left behind), spuro; (follow same; track, search for), spuri [tr]; (follow, gen), sekvi [tr]; (any sign, mark), signo; (mark route of future road etc. on map or ground), tracei [tr]; traceo; (outline), konturo; konturi [tr]; (sketch briefly), skizi [tr]; (path, trail), pado, vojeto; (tiny amount), iometo, sugesto, nuanco; (record, register), registri [tr]; (harness strap), tirrimeno; **tracer**, (tracking inquiry), spurenketo; **tracer bullet**, **tracer shell**, spurkuglo; **tracing**, (traced drawing etc.), ~aĵo; **tracing paper**, ~papero; **tracery**, aĵuraĵo, retaĵo; **retrace**, resekvi [tr], respuri [tr]; **kick over the traces**, plene ribeli [int]

trachea, traĥeo; **tracheitis**, ~ito; **tracheotomy**, ~otomio

Tracheata, traĥeuloj

trache(o)-, (anat root), traĥe(o)-

Trachinus, traĥino

trachoma, trakomo

track, (footprints, scent, wake of boat, or oth sign left by passing person, animal, object), spuro; (follow same; follow star, spaceship, satellite, etc., by telescope, radar, etc.), ~i [tr]; (path of moving object; re magnetic tape,

movie film, etc.; 2 parallel rr rails; etc.), trako (e.g.: 4-track stereo recording: 4-traka stereoa registraĵo); (one rr rail), relo; (go, follow, run along a track or course), kuri [int] (e.g.: *in turning, the rear wheels track inside the front ones*: turniĝante, la postaj radoj kuras interne de la antaŭaj); (trail, path), pado, vojeto; (racetrack etc.), vego†; (distance between wheels on one axle of vehicle), ŝpuro (e.g.: *a wide-track car*: larĝaŝpura aŭto); (roller belt on which caterpillar vehicle moves), raŭpo; (track sports, as running, high jump, pole vault, etc.), trakspertoj; (leave behind, as dirt, snow, etc.), postlasi [tr] (e.g.: *the children tracked mud on the rug*: la infanoj postlasis koton sur la tapiŝo); **track down**, ~kapti [tr]; **track up**, (leave dirty tracks), ~malpurigi; **tracking station**, ~stacio; **beaten track**, batita vojo; **racetrack**, kurejo; **sidetrack**, (lit or fig), flank-trako; flanktrakigi; **get sidetracked**, flanktrakiĝi; **soundtrack**, (of movie, video), sonstreko; **spur track**, (rr), sprona trako; **the Wool Track**, (Aus), la Tondista Vojo; **in one's tracks**, (where one is), kie oni staras (~is, ~os) (e.g.: *the sight stopped him in his tracks*: la vido haltigis lin kie li staris); **keep track of**, (maintain control, check on), kontroladi [tr], teni kalkulon de; (follow, gen; keep informed about, etc.), sekvi [tr] (e.g.: *keep track of new discoveries*: sekvi novajn malkovrojn); (keep, hold), konservi [tr] (e.g.: *a cabinet to keep track of my papers*: ŝranko por konservi miajn paperojn); **lose track of**, perdi (kontakton kun, kontrolon sur); **be on the right (wrong) track**, sekvi la (mal)ĝustan ~on; **be (get) off the track**, **jump the tracks**, (lit or fig), elreliĝi, devojigi; **you're off the track**, vi elreliĝis

tract, (anat, zool), traktuso; (treatise, short work), traktaĵo; (pamphlet, leaflet), pamfleto, flugfolio; (stretch, expanse, area), regiono, etendaĵo, vastaĵo

tractable, (docile), obeema; (malleable, easily worked), maleebla, prilaborebla

traction, (pulling, gen), tirado; (of train etc.), trakcio†; (friction, as of tire on road), (rul)frotado, malglito

tractor, (gen), traktoro; **tractor-trailer** (truck, rig), tir-kamiono, kamionego

tractus, (anat), traktuso

trade, (bsns), komerco; ~a; ~i [int]; (occupation), metio; metia; (swap, exchange), interŝanĝi [tr]; interŝanĝo; (deal in used or cheap items), brokanti [int]; **trade in**, (resell car etc. in buying new one), revendi [tr]; **trade-in**, revend(aĵ)o; **trademark**, varnomo; **trade off**, (compromise), kompromisi [int]; kompromisigi; **trade-off**, kompromiso; **trade on**, **trade upon**, (exploit), ekspluati [tr]; **tradesperson**, **tradesman**, metiisto

tradition, tradicio; **traditional**, ~a; **traditionalism**, ~ismo; **traditionalist**, ~isma; ~isto

traduce, kalumnii [tr] [not "traduki"]

traffic, (movement of vehicles, people, goods), trafiko; ~a; (re illegal commerce), ŝakri [tr]; ŝakrado (e.g.: *drug traffic*: narkot-ŝakrado); **trafficker**, ŝakristo (e.g.: *drug trafficker*: narkot-ŝakristo)

tragacanth, (gum), traganto; (plant), as-tragalo

tragedy, tragedio; **tragedian**, ~isto

tragic, tragika; (esp re theat tragedy), tragedia

tragicomedy, tragikomedio

Tragopogon, tragopogo, bokbarbo

Tragulus, tragolo

tragus, trago

trail, (footpath etc.), pado; vojeto; (footprints, track, etc., left by person, animal, or object), spuro; (follow same), spuri [tr]; (drag, pull behind), treni [tr]; treniĝi (e.g.: *a rope trailed behind the car*: ŝnuro treniĝis malantaŭ la aŭto); (pull behind, as trailer), remorki [tr] (e.g.: *we drove to the shore trailing a boat*: ni veturis al la marbordo remorkante boaton); (leave behind), postlasi [tr] (e.g.: *a car trailing smoke*: aŭto postlasanta fumon);

(grow along ground, re plants), rampi [int]; (follow, lag behind), postsekvi [tr]; posteniĝi; **trailer**, (towed vehicle), remorko (e.g.: *camper trailer*: kampada remorko, (w canvas top), tendoremorko); (large mobile home), ruldomo; (movie preview), antaŭfilmo; **trailer park**, **trailer court**, ruldomejo; **semitrailer**, duonremorko

train, (rr), trajno; (hang behind; thing hanging down, trailing), treni [int]; trenajo; (retinue), sekvantaro; (procession), procesio; (caravan), karavano; (series), serio; (subway or el), metroo [cp "subway", "tram"]; (coach, teach, rehearse, etc.), trejni [tr]; trejniĝi; (rear, bring up, educate), eduki [tr]; (study), studi [tr, int]; (teach animals behavior, tricks, etc.), dresi [tr]; dresiĝi (e.g.: *that dog is not house-trained*: tiu hundo ne estas hejmdresita); (aim, direct), celumi [tr]; **trainee**, trejnato; **trainer**, trejnisto; dresisto; **training**, trejnado; trejniĝo; dresado; dresiĝo; (received by professionals etc. to update knowledge, for new position, etc.), staĝo; **train of events**, eventserio; **freight train**, var~o; **passenger train**, pasaĝer~o; **power train**, (mech linkage from motor to load), transmisiilaro; **train of thought**, pensfadeno

traipse, promeni [int], vagi [int]

trait, trajto

traitor, (gen), perfid/ulo; (pol), ŝtat~ulo; **traitorous**, (ŝtat)~a

Trajan, Trajano

trajectory, trajektorio

tram, (trolley; mine train), tramo; **tramroad**, ~vojo; **tramway**, (on rails),

~vojo; (on overhead cables), telfero

trammel, (shackle), ŝeklo; en~igi, kate-ni [tr]; (fishnet), tramelo

tramontane, (beyond mountains), transmonta; (wind), tramontano; tramontana

tramp, (hobo; unscheduled ship, plane, etc.), trampo; ~i [int]; (trample, stomp), treti [tr, int]; treti(ado)

trample, **trample on**, treti [tr, int]

trampoline, trampolino

trance, tranco; **be in trance**, ~i [int]; **go**

into **trance**, ek~i [int]; **come out of trance**, el~iĝi; **entrance**, (bewitch), ensorĉi [tr]
tranquil, trankvila; **tranquility**, ~*(ec)o*; **tranquelize**, ~iĝi; **tranquilizer**, (drug etc.), ~iĝenzo
trans-, (pfx), trans-
transact, (any transfer of \$), spezi [tr]; (carry on, conduct, do), fari [tr], konduki [tr]; **transaction**, ~o, negoco, transakcio; **transactions**, (written record), aktoj; **transact business**, negoci [int]
transceiver, ricevosendilo [cp "transponder"]
transcend, transcendi [tr]; **transcendent**, **transcendental**, (gen), ~a; **transcendentalism**, ~ismo; **transcendentalist**, ~isma; ~isto
transcribe, transskribi [tr]; **transcript**, ~o; **transcription**, ~o; ~ado
transducer, transduktoro
transect, transsekti [tr]
transept, transepto
transfer, (give, convey, put over, change over, gen), trans/iĝi, ~doni [tr]; ~iĝi, ~doniĝi; ~igo, ~dono; ~ig-aĵo; ~iĝinto; (coupon, as for bus transfer), ~igilo; (any \$ transaction), spezi [tr]; spezo; (psych: transfer feelings, reactions, etc., from person or self to oth), ~ŝovi [tr]; ~ŝovo; **transference**, ~igo; ~iĝo; ~dono; spezo; ~ŝovo
transfix, (make motionless, gen), senmovigi; (impale), trapiki [tr]
transform, transformi [tr], aliformi [tr], ŝanĝi [tr]; **transformation**, ~iĝo; **transformer**, ~ilo
transfuse, transfuzi [tr]; **transfusion**, ~o
transgress, transpaŝi [tr], peki [int]; **transgression**, ~o, peko
transient, (fleeting, momentary), maldaŭra, efemera; (elec), ~a kurento; (person), trapasanto
transistor, transistoro; **transistorize**, ~izi [tr]
transit, (any going across), transiri [tr]; ~o; ~a; (bns: goods crossing country w/o paying import tax), transiti [int]; transito; transite; (public transportation system), (publika) vetursistemo

(e.g.: *rapid transit*: rapida vetursistemo); (surveying), (horizontala) teodolito; (ast: passage across, as of sun by Venus), transpaso; transpasi [tr]; **in transit**, survoja; survoje
transition, (change), ŝanĝo; (passing over, between), transiro, transpaso; **in transition**, ~iĝanta
transitive, transitiva; **intransitive**, ne~a
transitory, efemera, pasanta, maldaŭra
Transjordan, Transjordanio
translate, (from one language or form to another), traduki [tr]; ~iĝi; (move object; transfer legal right to), translacii [tr]; **translation**, ~o; ~ado; translacio; **translator**, ~into; ~anto; ~isto; **mistranslate**, ~i [tr]; **mistranslation**, mis~o
transliterate, transliteri [tr]
translucent, diafana; **translucence**, ~eco
transmigrate, transmigri [int]; **transmigration**, ~ado
transmit, (send, gen), sendi [tr] (e.g.: *transmit the information by mail*: poŝte ~i la informon); (broadcast by radio), dis~i [tr]; (TV), tele~i [tr]; (transfer, move substance across), transdoni [tr], transmeti [tr]; (transfer energy, force, motion), transmisii [tr]; (transfer disease), kontaĝi [tr], transmisii [tr]; (impart, communicate), komuniki [tr]; (give over), transigi, transdoni [tr]; (lead), konduki [tr]; **transmission**, ~(ad)o; dis~(ad)o; tele~(ad)o; transdon(ad)o, transmet(ad)o; transmisi(ad)o; kontaĝado; komunikado; transigo; (machinery, power train), transmisiilo; **transmittal**, ~aĵo; **transmitter**, dis~ilo; tele~ilo
transmute, (transform, gen), transformi [tr]; (chem: from one element to another), transmutacii [tr]; **transmutation**, ~(ad)o; transmutaci(ad)o
transom, crosspiece, lintel, lintelo; (small window above door etc.), vazistazo
transparent, travidebla; **transparency**, ~eco; ~aĵo; (film, slide), diapozitivo, diafilmo*; **semitransparent**,

duon~a
transpir/e, (perspire, re plant or animal), transpiri [int]; (breathe, pass gas through leaves, membranes, etc.), transpiri [tr, int]; (through skin), perspiri [int]; (occur), okazi [int]; (become known), evidentiĝi, aperi [int], riveliĝi
transponder, respondosendilo [cp "transceiver"]
transport, transporti [tr]; ~ado; ~a; (ship, train, etc.), ~a ŝipo (trajno, etc.)
transpose, (gen), transponi [tr]; (math: transposed matrix), ~ato; **transposition**, ~o; (of words, as in poetry), inversio
Transvaal, Transvalo
transverse, transversa; ~e; ~o
transversus, transversalis, (in anat names), transversa; ~o
transvestite, transvestulo
Transylvania, Transilvanio
trap, (catch), kapti [tr]; ~ilo; (pit), enfalujo; (in drainpipe), U~tubo; (carriage), kabrioleto; **trapper**, ~ilisto; **trappings**, (accouterments), garnituro, akcesoraĵoj; **trapdoor**, klap(pord)o
 Trapa, trapo
trapeze, trapezo
trapezium, (Am: no sides parallel), (neregula) kvarlatero; (Br: 2 sides parallel; anat: bone), trapezo
trapezius, (muscle), trapezo
trapezoid, (Am: 2 sides parallel), trapezo; (Br: no sides parallel), (neregula) kvarlatero; (anat: bone), trapezoido
Trappe, (abbey), Trapo; **Trappist** (monk), ~isto
trash, rubo, forĵetaĵo; ~igi
Trasimeno, Trasimenus, (Lake), Trazimeno
trauma, traŭmato; **traumatic**, ~a; **traumatism**, (gen state caused by trauma), ~ismo; **traumatize**, ~izi [tr]; **traumatology**, ~ologio
travail, (difficulty, bother), ĉagreno; (agony), agonio; (toil), laborego, peno; (pains of childbirth), akuŝodoloro
travel, (gen), veturi [int]; ~(ad)o; (voyage, connoting set itinerary), vojaĝi [int]; vojaĝ(ad)o; (move, as re mech

parts), movi [int]; moviĝi; moviĝ(ad)o; **travel(er)**, ~anto, vojaĝanto; **travel agent**, vojaĝagento; **travel agency**, vojaĝagentejo; **air travel**, aer~ado; **space travel**, kosmo~ado; **traveller's-joy**, (bot), klematido; **travelog(ue)**, vojaĝprelego
traverse, (go across), trans/iri [tr]; ~pasi [tr]; ~iro, ~paso; (go through), trairi [tr], trapasi [tr]; trairo, trapaso; (way across, passage), ~pasejo; trapasejo; (crossbar), ~stango; (beam), ~trabo; **traverse rod**, ~stango
travertine, travertino
travesty, travestio; ~i [tr]
trawl, troli [int]; **trawl(net)**, ~o; **trawler**, (boat), ~barko
tray, pleto; **warming tray**, hejto~o
treachery, (perfidy), perfido; **treacherous**, ~a; (dangerous), danĝera
treacle, (remedy), rimedo; (Br: molasses), melaso
tread, (walk on, tromp), trovi [tr]; ~o; (outer layer, as of tire, shoe, etc.), tegaĵo; (stairstep or analogous thing), ŝtupo; **treadmill**, (lit or fig), paŝrado; **tread water**, akvo~i [int]; **retread**, (tire etc.), retegi [tr]; retegaĵo
treadle, pedalo
treason, ŝtatperfido; **treasonous**, ~a
treasure, (wealth; anything treasured), trezoro; (greatly appreciate), ŝategi [tr], estimegi [tr]; (save), zorge konservi [tr], ~igi; **treasurer**, (of government), ~isto; (of club, organization, etc.), kasisto; **treasury**, (storage place of treasurer; government department; \$ held by government), ~ejo, fisko; (\$ of club etc.), kaso
treat, (deal w; subject to some process; etc.), trakti [tr]; (med), kuraci [tr] [cp "cure"]; (pay for food, drink, etc., of oth person), regali (iun per io); regalo (e.g.: *I'll treat you to supper*: mi regalos al vi per vespermanĝo); (delightful thing, experience), delektio; **treatment**, ~ado; kurac(ad)o; (one session, as for therapy etc.), seanco; **treat of**, (have to do w), temi pri; **mistreat**, mis~i [tr]
treaty, traktato
Trebizond, Trebizondo

treble, (mus: high range), soprano; ~a; (singer), ~ulo; (instrument), ~aĵo; (triple), triobla; trioblīgi; trioblīgi
tree, (gen), arbo; ~a [note: in names of specific trees, "arbo" is usually omitted (e.g.: *oak tree*: kverko) unless tree is named for fruit or nut (e.g.: *orange tree*: oranĝ~o)]; if specific tree name not found below, check individual tree name]; (chase up a tree), en~igi; **tree of heaven**, **tree of the gods**, ailanto; **allspice tree**, pimento; **apple tree**, pom~o; **bay tree**, laŭro; **big tree**, (*Sequoiadendron*), sekvojadendro; **blackthorn tree**, prunel~o; **bottle tree**, (Aus: *Brachychiton*), brakikito*; **Brazil-nut tree**, brazilnuksa ~o; **camphor tree**, kamfor~o; **ceiba tree**, kapok~o; **chinaberry tree**, melio; **chocolate tree**, kakao~o; **Christmas tree**, Krist(nask)~o; **clothes tree**, veststango; **clove tree**, kariofil~o, kariofilmirto; **cocoa tree**, kakao~o; **cranberry tree**, viburno; **deciduous tree**, falfolia ~o; **dragon tree**, draceno, drak~o; **ebony tree**, ebon~o; **evergreen tree**, ĉiamverda ~o; **family tree**, genealogio; **fruit tree**, frukt~o; **God tree**, kapok~o; **gum tree**, eŭkalipto; **gum arabic tree**, Senegalia akacio; **Japanese lacquer tree**, Japanese varnish tree, uruŝio; **mastic tree**, lentisko, mastik~o; **mealy tree**, viburno; **nutmeg tree**, miristiko; **oak tree**, kverko [for varieties, see "oak" or "*Quercus*";]; **orange tree**, oranĝ~o; **palm tree**, palmo [for varieties, see "palm"]; **pea tree**, karagano; **pear tree**, pir~o; **pimento tree**, pimento; **pine tree**, pino [for varieties, see "pine" or "*Pinus*";]; **plane tree**, platan; **plum tree**, prun~o; **silk-cotton tree**, kapok~o; **singletree**, timono; **spindle tree**, evonimo; **strawberry tree**, arbut~o; **tea tree**, kajeput~o; **tulip tree**, tulip~o; **wayfaring tree**, viburno; **(be) up a tree**, (esti) en embaraso, en malfacilaĵo, en dilemo; (sidi) en amaso de embaraso
trefoil, (plant or design), trifolio; **bean trefoil**, laburno, orpluvo; **marsh tre-**

foil, menianto

trek, (in wagon), ĉar/vojaĝi [int], ~iri [int]; ~vojaĝo, ~iro; (on foot), piedvojaĝi [int], piediri [int]; piedvojaĝo, piediro; (migrate), migri [int]; migr(ad)o
trellis, pergolo [cp "bower", "lattice"]
Trematoda, trematodoj
trematode, trematodo
tremble, tremi [int]; ~o; (med: as from disease), trepidi [int]
tremendous, (huge), enorma, kolosa, grandega; (dreadful), tremiga; (to any extreme degree), ega
tremolo, tremado [not "tremolo"]
tremor, (trembling, gen), tremo
tremulous, tremeta
trench, (gen), tranĉeo; ~igi; **retrench**, (economize), ŝpari [tr]; ekonomiiĝi, limigi elspezojn
trenchant, (incisive), morda, tranĉa, akra; (forceful), forta, vigla; (effective), efika; (clear-cut), klara
trend, tendenco; ~i [int]; **trendy**, (following fads), furorema
Trent, (Italian or oth city; English river), Trento; (Italian region), ~io
Trento, [see "Trent"]
trepan, (med: trephine), trepano; ~i [tr]; (well-driller etc.), drilego
trepang, tripango
trephine, trepano; ~i [tr]
trepidation, trepidado
treponema, Treponema, treponemo; **treponematosis**, **treponemiasis**, ~ozo; **treponemicide**, ~icido
trespass, (go on property w/o right), transpaŝi [tr]; (transgress, sin), ~i, peki [int]; ~o, peko; (intrude, encroach), entrudi sin
tress, buklo
trestle, (bridge), trusponto; (sawhorse), stablo
Treves, Treviro
trey, (Aus), tripenca monero
tri-, (pfx), tri-
triad, triopo
trial, (any test), provo, testo; ~a, testa; (hardship, affliction), aflikto; (law), proceso; procesa; **mistrial**, misproceso; **on trial**, ~ata, testata; priprocesa; **time trial**, (sport), tempokurumo†;

trial and error, (per) ~o kaj eraro
triangle, triangulo; **triangular**, ~a; **triangulate**, ~i [tr]; **triangulation**, ~ado
Triassic, triaso; ~a
tribe, tribo; **tribal**, ~a; **tribesman**, ~ano; **tribalism**, ~ismo
tribo-, (pfx: friction), tribo-
 Tribonema, konfervo
tribrach, tribrako
tribulation, mizero, aflikt(eg)o, malfeliĉ(eg)o
tribunal, (gen), tribunalo
tribune, (Roman official etc.), tribunuso; (dais), tribuno
tributary, (river), flankrivero, enfluvivero; (paying tribute), tributanta; (re tributes), tributa
tribute, (gen), tributo; **pay as tribute**, ~i [tr]
trice, momento
tricentennial, **tricentenary**, tricentjara; ~a datreveno, ~a jubileo
triceps, (muscle), tricepso
 Trichecus, manato
trichiasis, triĥozo, trikozo
trichina, triĥino, trikino
 Trichinella, triĥino, trikino
trichinosis, triĥinozo, trikinozo
trich(o)-, (med pfx: hair), triĥ(o)-, trik(o)-
trichomycosis, **trichomycetosis**, triĥomicetozo, trikomicetozo
trichopathy, triĥopatio, trikopatio
 Trichophyton, triĥofito
trichophytosis, triĥofitozo
trichoplasia, triĥoplazio, trikoplazio
 Trichoptera, triĥopteroj
trichromatic, trikromia; **trichromatism**, ~o
trick, (ruse, deceit, artifice), ruzo, artifikado, trompo; ~i [int] (kontraŭ), super~i [tr], friponi [tr], trompi [tr]; (joke), ŝerci [int] (kontraŭ), priŝerci [tr]; (clever, skillful act; knack), lertaĵo; (expedient), rimedo (e.g.: *the tricks of the trade*: la rimedoj de l' metio); (cards won in game), preno; (uncertain, unreliable, as injured knee or back), nefidinda; **trickery**, ~ado, artifikado, friponado, trompado; **trickster**, ~emulo, fripono; **tricky**, (inclined to trick, deceive, fool),

~ema, artifikema; (difficult), tikla, malfacila, delikata; **dirty trick**, fitrompo, fi~o; **play a trick on**, (joke), priŝerci [tr]; **do the trick**, atingi la rezulton
trickle, flueti [int]; ~igi; ~o
triclinal, trikлина
tricot, (fabric), trikoto; (garment), ~aĵo
trictac, triktrako
tricycle, triciklo
 Tridacna, tridakno
trident, tridento
Tridentine, trenta
Tridentum, Tridentino [cp "Trent"]
triennium, jar/trio; **triennial**, tri~a
Trier, Treviro
Trieste, Triesto; **Gulf of Trieste**, Golfo de ~o
trifle, (trivial, unimportant), bagatelo; (small amount), ~o, iometo; (of \$), (mon)sumeto; **trifling**, ~a; **trifle with**, ludi per, frivole trakti [tr], priŝerci [tr]
 Trifolium, trifolio
triforium, triforio
trigeminal, triĝemina; **trigeminal nerve**, ~o
trigger, (of gun etc.), ellasililo; (set off, gen), ekagigi; **trigger-happy**, **quick on the trigger**, pafema; (fig), tuj aĝema
 Trigla, triglo; *Trigla gumardus*, gurnardo; *Triglidae*, ~edoj
triglyph, triglifio
trigon, **trigone**, **trigonum**, (ast; naut), trigono; **trigonal**, (re trigon, gen), trigona; (3~sided symmetry), trigonala
Trigonella foenumgraecum, fenugreko
trigonometry, trigonometrio; **trigonometric**, ~a; **trigonometric function**, ~a funkcio
trill, (gen), trili [tr, int]; ~o
trillion, (Am: 10¹²), duiliono; (Br: 10¹⁸), triiliono [see § 19(b)]
trilobate, triloba
 Trilobita, trilobuloj
trilobite, trilobulo
trilogy, trilogio
trim, (clip, cut, as hair, grass, etc.), tond(et)i [tr]; ~o; (prune tree or similar action), stuci [tr]; (decorate, garnish), ornami [tr], garni [tr];

ornamaĵo, garnaĵo; (balance), ekvilib-rigi; (in good order; neat), neta, bon-orda; netigi; bonordigi, ordi [tr]; **trimming(s)**, garnaĵo(j)

trimaran, trimarano†

trimester, trimestro

trimeter, trimetro

trine, (threefold), triopa; (triad), ~o

Tringa, tringo; Tringa totanus, ruĝkru-ra ~o

Trinidad, Trinidado; **Trinidad and To-bago**, ~o kaj Tobago

trinitrotoluene, trinitrotolueno [abb: TNT]

trinity, (gen), triunuo; **Trinity**, (Chris-tian), T~o, Trinitato; **Ttrinitarian**, trinitatano; trinitatana

trinket, breloko

trinomial, tritermo; ~a

trio, (any group of 3), triopo; (mus: work for 3 voices or instruments), ter-ceto

triode, triodo

triolet, trioleto

trip, (any travel), veturo (e.g.: *a trip to the store*: ~o al la butikoj); (esp w spe-cific itinerary; voyage), vojaĝo (e.g.: *a trip to Bolivia*: vojaĝo al Bolivio); (any going), iro (e.g.: *three trips to the kitchen*: tri iroj al la kuirrejo); (excur-sion, pleasure trip), ekskurso; (stum-ble, make misstep, err), stumbli [int]; stumblo; (make person or animal stumble), krurfalĉi [tr], stumbligi; krurfalĉo, stumbligo; (skip, caper), kaprioli [int]; kapriolado; (release mech part, as from pawl), elklkigi; (pawl), kliko; (start to operate), ekagi-gi, funkciigi; (drug experience or analogous experience), revego; rev-egi [int]; **round-trip**, rondvojaĝo, iro-reiro; rondvojaĝa, ira-reira

tripartite, (w 3 parties), tripartia; (3 parts), triobla, triparta

tripe, (animal organs), tripo; (non-sense), sensencaĵo; **rock tripe**, rok~o

triphthong, trifongo

triple, triobla; ~e; ~o; ~igi; ~iĝi; triopa; triope [see "double"]

triplet, (any group of 3, triad), triopo; (one of 3 born together), trinaskito; (mus: 3 notes in time of 2), trioleto

triplicate, (threefold), triobla; ~e; ~aĵo; (3rd copy), triplikato; **in triplicate**, ~e

tripod, (gen), tripedo

Tripoli, (any of several cities), Tripolo; (region), ~io

Tripolitania, Tripolio

triptych, triptiko

triquetrum, (bone), triketro

trireme, triremo

trisect, trisekci [tr]

triskaidekaphobia, dektrifobio

Trismegistus, Trismegisto

trismus, trismo

Tristan, Tristano

trite, banala

Triticum, tritiko; Triticum spelta, spel-to

tritium, tricio

triton, (phys), tritono

Triton, (ast; myth), Tritono

Triton, (zool), trituro

triumph, triumfo; ~i [int]; **triumphal**, **triumphant**, ~a

triumvir, triumviro; **triumvirate**, ~aro; **triumviral**, ~(ar)a

triune, triunueca [see "trinity"]

trivet, tripedeto

trivia, bagateloj; **trivial**, ~a [not "trivia-la"]

Troas, the Troad, Troado

trocar, trokaro

trochaic, trokea

trochanter, (anat), trokantero

trochar, trokaro

trochee, trokeo

Trochillidae, kolibroj, muŝbirdoj

trochiter, (trochanter major), granda trokantero; (tuberculum majus hu-meri), granda trokitero

trochlea, trokeo; **trochlear**, ~a

troglodyte, troglodito

Troglodytes, troglodito

troika, trojko*

Troilus, Troilo

Trojan, Troja; ~ano

troll, (myth), trolo; (fish w moving bait), trenlogi [tr] [not "trolli"; cp "trawl"]; (fishing line), trenlogilo

trolley, (vehicle), tramo, ~veturilo; (pulley etc. on pole, for directing elec to trolley car), troleo; (carriage etc.

rolling on overhead cable or track; Br: various small carts or trucks), ĉareto; **trolley bus, trackless trolley**, trolebuso; **trolley car**, ~ (veturilo)

Trollius europaeus, trolio

trollop, putino

Trombicula, trombidio

trombiculiasis, trombidiozo

trombidiasis, trombidiosis, trombidiozo

Trombidium, trombidio

trombone, trombono

trommel, tromelo

trompe l'œil, okultromp/aĵo†; ~a; ~e

troop, (mil, scouting, theat, etc., group), trupo; (any organized band), bando, brigado, roto; (walk), marŝi [int]; **troops**, (soldiers, gen), ~oj, soldatoj, soldataro; (those left in garrison), depoto; **trooper**, (soldier), soldato; (police), policano, policisto; (on horseback), rajdpolicisto; **paratroop**, paraŝuta; **paratrooper**, paraŝut-soldato, paraŝutisto; **paratroops**, paraŝut~o, paraŝutsoldataro, paraŝut-istaro; **storm-trooper**, sturmanto

Tropaeolum, tropeolo

trope, tropo

trophic, trofia

troph(o)-, (med pfx), trof(o)-

trophoneurosis, trofoneŭrozo

trophy, trofeo

tropic, tropiko; ~a; **tropical**, ~a; **semi-tropical**, duon~a; **subtropical**, sub~a; (**the**) **tropics**, (la) ~oj, ~landoj; **Tropic of Cancer**, T~o de Kankro; **Tropic of Capricorn**, T~o de Kaprikorno

~**tropic**, (sci sfx: showing affinity), ~tropa†

Tropidonotus, tropidonoto

tropism, tropismo

tropopause, tropopaŭzo

troposphere, troposfero

trot, troti [int]; ~igi; ~(ad)o; **trot out**, (for presentation), elporti [tr]; **the trots**, (colloq: diarrhea), diareo

Trotsky, Trocki; **Trotskyism**, ~ismo; **Trotskyist**, Trotskyito, ~isma; ~isto

troubador, trobadoro

trouble, (bother), ĝeni [tr]; ~o (e.g.: *may I trouble you for a glass of wa-*

Analogous to the latitude and longitude given for each geographical name in the PIV and PIVS, the location of each moon named in this Glossary is specified by the moon's mean orbital radius (semimajor axis) as well as its parent planet.

Following each keyword below, a brief etymological note in parentheses is also given, to show the source of each Esperanto neologism from English and/or other ethnic languages. These etymological notes also serve to cross-refer back to the English keyword in the body of this dictionary (or one of the keywords) under which the Esperanto neologism is used as a translation.

Abigano, (nacilingve, "Abidjan"), la ĉefurbo de Eburio (4°W, 5°N)

Abudabo, (nacilingve, "Abu Dhabi"), la ĉefurbo de la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj (54°E, 24°N)

aĉakatur, (Itale kaj Angle, "acciacatura"), tre mallonga muzika noto, sonata ĵus antaŭ ĉefa noto, skribata kiel malgranda trastrekita okonoto

Adelajdo, (Angle, "Adelaide"), la ĉefurbo de Sud-Aŭstralio [la AED donas ĉi tiun formon, kvankam la PIV donas la malpli taŭgan formon "Adelaido"]

Adirondakoj, (Angle, "Adirondacks"), montoĉeno en nord-orienta Nov-Jorkio (74°W, 44°N)

afganio, (nacilingve, "afghani"), la

monunuo de Afganlando

Agano, (nacilingve, "Agana"), la ĉefurbo de Gvamo* (146°E, 14°N)

agistrodono, (Angla komuna nomo, "copperhead"), genro de venena serpento (*Agkistrodon contortrix*), ofta en Nord-Ameriko, kun kuprokolora kapo kaj malhelbrunaj iks-formaj strioj sur la dorso

Ajo, (nacilingve, "Io", laŭ la Greka diino Esperante nomata "Ioa"), la plej proksima el la ĉefaj lunoj de Jupitero (meza orbita radiuso 422 000 km)

akantropagro, (Aŭstrali-Angla komuna nomo, "bream"), Aŭstralia marfiŝo iom simila al la bramo (*Acanthopagrus*)

Akapulko, (nacilingve, "Acapulco"), ferurbo ĉe la Pacifika bordo de Meksikio (100°W, 17°N)

Akrao, (nacilingve, "Accra"), la ĉefurbo de Ganao (0°, 5°N)

aktinono, (Angle, "actinon"), izotopo (atommaso 217) de radono, estigata de la radioaktiva malkomponiĝo de aktinio

Albena, (Angle, "Albany"), la ĉefurbo de Nov-Jorkio, ĉe la Rivero Hudsona (74°W, 43°N)

Algonkena, (Angle kaj Algonklingve, "Algonquin"), karakterizanta iom grandan aron da Indianaj triboj kaj la familion de iliaj lingvoj, en centra Nord-Ameriko

algoritmo, (Angle, "algorithm"), speciala metodo por solvi ian matematikan problemon; serio de kalkuloj kiun faras komputoro por atingi iun celon

alniko, (Angle, "alnico"); el la komencaj silaboj de la alojantaj metaloj, alojo de fero kun aluminio, nikelo, kaj kobalto, kaj kelkfoje kupro kaj aliaj metaloj; uzata por fabriki potencajn magnetojn

ambiverti, [tr], (Angle, "ambivert"), doni al homo la trajtojn kaj de introvertiteco kaj de ekstravertiteco, tiamaniere estigante ekvilibron en la personeco; **ambivertito**, tia homo

amniocentezo, (Angle, "amniocentesis"); formo ankaŭ vidata en "paracentezo" en PIV), eltiro de specimeno

de amnia fluido el la utero de gravedulino, por esplori la staton de la feto aŭ por aliaj medicinaj motivoj

aneroida, (Angle, "aneroid"), senlikva (aparte kiel rilatas al neelektronikaj barometroj) [menciita en PIV sub "barometro", sed ne mem difinita]

angoforo, (Angle, "angophora"), Aŭstralia arbo parenca al la eŭkalipto

Apalaĉoj, (Angle, "Appalachians", el Indiana vorto "Apalaĉi"), granda montoĉeno en orienta Nord-Ameriko, etendiĝanta ĉ. 2500 kilometrojn de Alabamo ĝis Kebekio (87°W, 34°N ĝis 66°W, 49°N); **Apalaĉio**, la montareca regiono de Alabamo ĝis Pensilvanio, kaj ĝia kulturo

apastro, (Angle, "apaster", el Grekaj elementoj por "for de" + "astro"), punkto en orbito plej malproksima de la ĉirkaŭorbitata astro [ĝeneralaĵo de la terminoj "afelio" (= "ap-helios" = "for de suno") kaj "apogeo"; cp "perastro"*]

Apio, (nacilingve, "Apia"), la ĉefurbo de la Okcidenta Insularo Samoa† (172°W, 14°S) [menciita en PIVS sub "Samoa" sed ne mem difinita]

Appia, (Itale, "Appia"), nomo de fama Romia vojo (Vojo Appia) en Italio [menciita en PIV sub "vojo", sed ne mem difinita]

Arielo, (nacilingve, "Ariel"), la plej proksima ĉefa luno de Urano (meza orbita radiuso 191 800 km)

askoto, (Angle, "ascot"), speco de larĝa kravato, origininta en Anglio

aŝramo, (Angle, "ashram", el la Sanskrita, "aŝrama"), izola loko por komunumo de Hinduoj sekvantaj vivon de simpleco kaj religia meditado

Atlanto, (Angle, "Atlanta"), urbego kaj plej grava komercocentro en sudorienta Usono, la ĉefurbo de Georgio (84°W, 34°N)

aŭtoharpo, (Angle, "autoharp"), 36-korda muzik-instrumento, iom simila al la citro (de kiu ĝi devenas), sed kun butonoj por aŭtomate elektii akordojn; ofta en Nord-Amerika folkloro muziko

Bahaa, (nacilingve, "Baha'i", "Bahai"),

rilata al Bahaismo; **Bahaismo**, religio fondita de Baha'u'llah en Irano en la 19-a Jarcento, emfazanta universonalecon kaj socian egalecon; **Bahaano**, ano de Bahaismo

balaklavo, (Angle, "balaclava", el la urbo Balaklava en Krimeo), ŝtofa ĉapo kiu etendiĝas malsupren por kovri la tutan kapon ĝis la kolo, kun truoj por la okuloj kaj nazo; portata por protekti kontraŭ ekstrema malvarmo

Bandar-Seri-Begavano, (nacilingve, "Bandar Seri Begawan"), la ĉefurbo de Brunejo† (115°E, 5°N) [menciita en PIVS sub "Brunejo" sed ne mem difinita]

bandikoto, (Angle, "bandicoot"), tre granda rato trovata en Hindio kaj Cejlono (*Bandicota*)

Bangvio, (nacilingve, "Bangui"), la ĉefurbo de la Centrafrika Respubliko† (19°E, 4°N) [menciita en PIVS sub "Centrafrika Respubliko" sed ne mem difinita]

banksio, (Angla komuna nomo, "bankisia"), Aŭstralia ĉiamverda planto kun helaj flavaj floroj (*Banksia*)

baramundo, (Aŭstralia komuna nomo, "barramunda", "barramundi", el aborigena nomo), manĝebla Aŭstralia freŝakva fiŝo (*Neoceratodus forsteri*)

barmicvo, (Hebree, "bar micva", t.e., "filo de la leĝo"), Juda rito por 13-jaraĝaj knaboj, kiuj tiam atingas religian plenaĝon; **barmicvulo**, tia knabo

batmicvo, (Hebree, "bat micva", t.e., "filino de la leĝo"), Juda rito por 13-jaraĝaj knabinoj, kiuj tiam atingas religian plenaĝon; **batmicvulino**, tia knabino

behavioristo, (Angle, "behaviorist"), ano de behaviorismo

Biafro, (nacilingve, "Biafra"), orienta regiono de Niĝerio, kiu sensukcese klopodis starigi sian sendependecon en 1967—70)

bilabongo, (Aŭstrali-Angle, "billa-bong", el aborigena nomo), lageto distranĉita de rivero kiam la rivero tranĉas novan ŝanelon

bingo, (Angle, "bingo"), vetludo en kiu vokisto elvokas numerojn, kaj ĉiu

ludanto metas ĵetonojn sur la samnumerajn kvadratojn aleatore presitajn sur kartona tabulo; la gajnanto estas la unua kiu faras rektan vicon da kvin ĵetonoj, aŭ alian antaŭanoncitan aranĝon

bolonjo, (Angle, "bologna"; el la samnoma Itala regiono—vidu sube), speco de granda, fumaĵita kolbaso el bovaĵo, porkaĵo, aŭ bovidaĵo, aŭ miksaĵo de tiuj; ofte manĝata en maldikaj tranĉaĵoj en sandviĉoj

Bolonjo, (nacilingve, "Bologna"), regiono kaj urbo en norda Italio, apud la Apeninoj (11°E, 44°N)

botulismo, (Angle, "botulism"), veneniĝo kaŭzata de la toksino produktata de iu bacilo foje trovata en nutraĵoj mishermetikigitaj

brakikito, (Aŭstrali-Angla komuna nomo, "bottle tree"), Aŭstralia speco de arbo (*Brachychiton*), kun ŝvela, botelforma trunko

Brazavilo, (Angle, "Brazzaville"), ĉefurbo de Kongolo (15°E, 4°S) [menciita en PIV sub "Kongolo", sed ne mem difinita]

breco, (Germane, "Bretzel"; Angle, "pretzel"), German-devena speco de malmola kaj seka (aŭ foje mola), forte salita biskvito, en formo de vergeto ordinare fleksita kvazaŭ krucitaj brakoj

brevo, (nacilingve, "breve"), la suprenkurba diakrita signo uzata sur la Esperanta litero "ŭ", kaj internacie uzata por indiki mallongecon de vokalo kaj por aliaj motivoj [en PIV nomata "hoksigno", sed la brevo devus esti distingita disde la vere hokforma (angula) diakritaĵo "dukorno", uzata en kelkaj orient-Eŭropaj lingvoj (ekz-e, "ç", "ç", "ç")]

Brigtaŭno, (nacilingve, "Bridgetown"), la nomo de diversaj urboj, i.a. la ĉefurbo de Barbado† (60°W, 13°N) [menciita en PIVS sub "Barbado" sed ne mem difinita]

briofitoj, (Latine, "*Bryophyta*"), divizio botanika, kiun konsistigas la muskoj kaj hepaticoj [menciita en PIV sub "musko", sed ne mem difini-

ta]

brolgo, (Aŭstrali-Angla komuna nomo, "broлга"), granda arĝentogriza gruo de norda kaj orienta Aŭstralio (*Grus rubicunda*)

budgerigo, (Angla komuna nomo, "budgerigar", "budgie"), speco de melopsitako* kun verdflava korpo, bluo sur la vangoj kaj vostoplumoj, kaj brune striitaj flugiloj (*Melopsittacus undulatus*)

Bujumburo, (nacilingve, "Bujumbura"), la ĉefurbo de Burundo† (29°E, 3°S) [menciita en PIVS sub "Burundo" sed ne mem difinita]

burgo, (vortelemanto el Angla "hamburger", "cheeseburger", k.s.), sandviĉo el bulko plenigita je ia hakviando, kun aŭ sen aliaj saporajoj kiel fromaĝo, laktuko, saŭco, peklaĵoj, k.s.; specifajn burgojn oni nomu laŭ la fontbesto de la viando, ekz-e, bovburgo (Angle, "hamburger"), fromaĝobovburgo (Angle, "cheeseburger"), kokinburgo, k.s.

centrarkedoj, (Angla komuna nomo, "bass"), familio (*Centrarchidae*) de oftaj Nord-Amerikaj karnovoraj perkoidaj sensalakvaj fiŝoj

codorama, (Angle, "CD-ROM", siglo por "compact disk, read-only memory", t.e., "kompakta disko, neredaktebla memoro"), karakterizanta diskon sur kiu estas registrita teksto aŭ datenoj en duaria kodo lase re legata

ĉakro, (Angle, "chakra", el la Sanskrita), laŭ iuj orientaj religiaj filozofioj, unu el la sep centroj aŭ vorticoj de spirita energio en la fizika korpo, proksimume respondaj al sep fizikaj glandoj

Ĉarlestono, (Angle "Charleston"), (1) ĉefurbo de Okcident-Virginio (82°W, 38°N); (2) havenurbo en Sud-Karolinio (80°W, 33°N) [menciita en PIV sub "Virginio", sed ne mem difinita]

ĉatnio, (Angle, "chutney"; Hindie, "ĉatni"), Hindedevena frandaĵo el fruktoj, spicaĵoj, kaj aromherboj, ofte manĝata kun kareoj

ĉaŭo, (Angle, "chow"), speco de mezgranda Ĉindevena hundo, kun kom-

pakta, muskola korpo, dika bruna aŭ nigra felo, kaj nigre-bruna lango

Ĉesapika, (Angle, "Chesapeake"), nomo de granda golfo en orienta Usono, etendiĝanta ĉ. 350 kilometrojn tra Marilando kaj Virginio (76°W, 37°N)

dajkirio, (nacilingve, "daiquiri"), alkohola trinkaĵo farita el rumo, sukero, kaj limeta aŭ limona suko

Dakaro, (nacilingve, "Dakar"), ĉefurbo de Senegalio kaj ĉefa komercocentro en okcidenta Afriko (17°W, 15°N) [menciita en PIV sub "Senegalo", sed ne mem difinita]

Dar-es-salamo, (nacilingve, "Dar es Salaam"), ĉefurbo de Tanzanio (39°E, 7°S) [menciita en PIV sub "Tanzanio", sed ne mem difinita]

daŝiko, (Angle, "dashiki", el la Svahila), Afrikdevena, loza, helkolora ĉemizo aŭ mallonga robo

dekstrozo, (Angle, "dextrose"), dekstroglukozo, C₆H₁₂O₆

Dejmoso, (nacilingve, "Deimos"), la pli malgranda kaj pli malproksima el la du lunoj de Marso (meza orbita radiuso 23 000 km)

demografo, (Angle, "demographer"), demografiisto

Denpasar, (nacilingve, "Denpasar"), la ĉefurbo de Balio† (115°E, 9°S) [menciita en PIV sub "Balio" sed ne mem difinita]

Denvero, (Angle, "Denver"), urbego kaj grava komercocentro en centra Usono, la ĉefurbo de Koloradio (105°W, 40°N)

diafilmo, (Angle, "slide"; el internaciaj vortelementoj "dia-" [tra] + "filmo"), diapozitivo

digeriduo, (Aŭstrali-Angle, "digeridoo", el aborigena nomo), unutona blovinstrumento de la Aŭstralijaj aborigenoj

distrofo, (Angle, "dystrophy"), (med), misformiĝo aŭ morba degenerado de organo aŭ histo

dobro, (Angle, "dobro"), Usona speco de gitaro, kun kaŭĉuka membrano kovranta la resonanc-aperturon, pro tio havanta pli malakutan sonon ol ordinara gitaro

Dohao, (nacilingve, "Doha"), la ĉefurbo de Kataro† (52°E, 25°N) [menciita en PIVS sub "Kataro" sed ne mem difinita]

dulcimer, (Angle, "[hammered] dulcimer"), kord-instrumento, en formo de malprofunda trapeza skatolo kun la kordoj streĉitaj horizontale trans (ordinare) du pontoj, ludata per frapi la kordojn per du malgrandaj marteloj (la cimbalo estas pli granda parenco); **fretodulcimer**, (Angle, "mountain dulcimer", "fretted dulcimer"), kord-instrumento, origininta en Apalaĉio* sed kredeble kun radikoj en Eŭropo, ordinare kun vespoforma (foje larmoforma) sonkesto, fretoj, kaj tri ĝis kvin kordoj, unu el kiuj estas unutona zamkordo; oni plektras ĝin sidante kaj kuŝiganta ĝin sur la femuro; ofta en Nord-Amerika folkloro muziko

ekosistemo, (Angle, "ecosystem"), ekologia sistemo

ekstroverti, [tr], (Angle, "extrovert"), direkta ies libido aŭ personecon ekstere; estigi iun sociema [PIV listigas la partupon, "ekstrovertito": tia homo]

ekzo-, (Angle, "exo-", el la Greka), teknika prefikso kun la signifo "ekstera"; la malo de "endo-"

ekzobiologio, (Angle, "exobiology"), branĉo de la biologio, kiu koncernas sin pri la ebleco de vivo origininta ekster Tero

ekzoskeleto, (Angle, "exoskeleton"), ekstera skeleto, kiel havas kraboj, iuj insektoj, k.a.

-enzo, (nacilingve, "-ence" k.s.), teknika sufikso indikanta substancon kiu plenumas la agon de la radiko (ekz-e: halucinenzo, solvenzo, rivenlenzo)

epiciklo, (Angle, "epicycle"), cirklo, kiu ruliĝas sur la ekstera aŭ interna flanko de fiksa cirklo, tiel naskanta respektive epicikloidon aŭ hipocikloidon

esceto, (Germane, "Eszett", t.e., "s-z"), litero ("ß") uzata en la Germana lingvo, ligaturo* de "ss"

eŭgenio, (Angle, "eugenia", el la Gre-

ka), granda genro (*Eugenia*) de tropikaj arboj kaj arbustoj, el la familio de mirtacoj; ĝiaj specioj inkludas la grumiksamarbon, la kariofilarbon, la jamboson, la pimenton, kaj la pitangarbron

Eŭropao, (nacilingve, "Europa"), la dua ĉefa luno de Jupitero (meza orbita radiuso 671 000 km)

eŭtamio, (Angla komuna nomo, "chipmunk"), genro (*Eutamias*) de oftaj malgrandaj Nord-Amerikaj sciuroj, kun strioj sur la kapo kaj dorso, vivantaj ĉefe sur la grundo

faksi [tr], (Angle kaj internacie, "fax", mallongigo de "faksimilo"), sendi faksimilon (faksaĵon) de dokumento per faksilo; **faksaĵo**, ricevita faksimilo transmissiita fakse; **faksilo**, aparato kiu skanas dokumenton kaj transmisiias la tiel kodigitajn signalojn telefone kaj ricevas tiajn signalojn el alia faksilo kaj elprintas faksimilon (faksaĵon) de la aliloke transmissiita dokumento

Fanafutio, (nacilingve, "Funafuti"), la ĉefurbo de Tuvalo† (178°E, 8°S) [menciita en PIVS sub "Tuvalo" sed ne mem difinita]

fenobarbitalo, (Angle, "phenobarbital"), kristalaĵo (C₁₂O₃N₂H₁₂), uzata kiel sedativo kaj antispasmaĵo

filibustri, [int], (Angle, "filibuster"), en parlamento, kunveno, k.s., intence prokrasti voĉdonon pri leĝopropono k.s. per longa kaj ofte nerilata prelegado; **filibustro**, tia ago

flamenko, (Angle kaj Hispane, "flamenco"), speco de Hispana muziko kaj dancado, tre vigla kaj ritma

Foboso, (nacilingve, "Phobos"), la pli granda kaj pli proksima el la du lunoj de Marso (meza orbita radiuso 9000 km)

fonduo, (Angle kaj France, "fondue", t.e., "fanditaĵo"), manĝaĵo ordinaro el fandita fromaĝo kun vino, varmigata en poteto super kandelo k.s., uzata kiel trempaĵo por pecetoj de viando, pano, k.s.

fraktalo, (Angle, "fractal"), matematika kurbo, surfaco, volumeno, k.t.p., kies ĉiu parto konsistas en pli malgrand-

skalaj kurbiĝoj, kaj simile ĝis infinito **frankfurto**, (Angle, "frankfurter", "hot dog"), maldika, mildgusta kolbaso, ofte rostata super fajro ĉe pikniko k.s. kaj manĝata sandviĉe en bulko kun mustardo ili keĉupo*, hakita cepo, fromaĝo, k.s.; **frankfurta bulko**, tia sandviĉo

frusto, (Angle kaj Latine, "frustum"), geometria solido formita sub ebena kiu tranĉas konuson aŭ piramidon paralele al ĝia bazo

gajlusaco, (Angla komuna nomo, "huckleberry"), genro (*Gaylussacia*, el erikacoj) de plantoj, kun blujaj beroj iom similaj al mirtelberoj, sed kun dek grandaj semoj; la beroj estas ofte uzataj por tortoj, benjetoj, k.s.

Ganimedo, (nacilingve, "Ganymede"), la tria el la ĉefaj lunoj de Jupitero (meza orbita radiuso 1 070 000 km) [difino aldona al tiu en PIV]

Gaspeo, (nacilingve, "Gaspé"), granda duoninsulo en sudorienta Kebekio, ĉe la enmariĝo de la Rivero Sankta-Laŭrenco (65°W, 49°N)

gavio, (Angla komuna nomo, "loon"), genro (*Gavia*) de relative grandaj, primitivaj akvobirdoj kun la kruroj situantaj ĵus antaŭ la vosto, kaj kun naĝhaŭto inter la piedfingroj; parenca al la kolimbo, sed distingita disde ĉi tiu per tio ke la kolimbo estas malpli granda kaj ne havas piedfingran naĝhaŭton [PIV erare diras ke la kolimbo ja havas naĝhaŭton kaj erare indikas ke la kolimbo (*Colymbus*) kaj podicipo (*Podiceps*) ne estas identaj]

Georgtaŭno, (nacilingve, "Georgetown"), urbnomo, i.a. de la ĉefurbo de Brita Gvajanio† (58°W, 7°N) [menciita en PIVS sub "Gvajano" sed ne mem difinita]

gerontokratio, (Angle, "gerontocracy"), regado far maljunuloj

gerontologo, (Angle, "gerontologist"), specialisto pri gerontologio; **gerontologio**, la medicina scienco pri maljuniĝado kaj la problemoj de maljunuloj

gingamo, (Angle, "gingham"), speco de katuno teksita en strioj, kvadratoj, aŭ plejdoj

granolo, (Angle, "granola"), manĝaĵo farita el la kernoj de diversaj grenoj kaj mielo kumbakitaj; manĝata kun lakto ĉe matenmanĝo aŭ uzata kiel ingredienco en kuketoj k.s.

gupio, (Angle, "guppy"), malgranda tropika nesalakva fiŝo (*Lebistes reticulatus*), ofta en akvarioj

Gvamo, (Angle, "Guam"), la plej granda el la Insuloj Marianaj, posedata de Usono; ĉefurbo, Agano* (146°E, 14°N)

ĝinzo, (Angle, kaj nun internacie, "jeans"), pantalone el drelika ŝtofo, plej ofte blua

halio, (Angla komuna nomo, "abalone"), genro (*Halotis*) de mara molusko, kun ovala, iom spirala konko kun vico de truoj proksimaj al la rando kaj tegita de perlamoto

Halovino, (Angle, "Halloween", el "All Hallows' Evening", t.e., "Vespero de Ĉiuj Sanktuloj"), festo je la 31-a de oktobro, origine asociita kun la Kelta Novjar-Tago je la 1-a de novembro, poste asociita kun la Tago de Ĉiuj Sanktuloj ĉe Kristanoj ankaŭ je la 1-a de novembro, nun nereligia festo en Nord-Ameriko por distriĝado kaj petolado, ĉefe ĉe infanoj

Hampŝiro, (Angle, "Hampshire"), graflando en suda Anglio (1°W, 51°N) [en PIV aparte listiĝas "Nov-Hampŝiro", la Usona ŝtato, sed mankas "Hampŝiro"]

Hobarto, (Angle, "Hobart"), la ĉefurbo de Tasmanio (147°E, 42°S)

holokaŭsto, (Angle, "holocaust", el Grekaj radikoj kun la signifo "plenbruligo"), grandskala, amasa genocido, ekz-e de la Judoj far la Nazioj antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito

Honiaro, (nacilingve, "Honiara"), la ĉefurbo de la Salomon-Insuloj† (160°E, 8°S) [menciita en PIV sub "Salomon-Insuloj" sed ne mem difinita]

Ĥanukao, (Angle, "Chanukah", "Hanuka"; Hebreo, "Ĥanukah"), ok-taga Juda festo, komenciĝanta je la 25-a de la monato Kislev (ordinare meze de decembro), por rememorigi la rede-

diĉon de la Templo en 165 a.K.

ikteruso, (Angla komuna nomo, "orivole"), genro (*Icterus*) de Nord-Amerikaj birdoj, kiuj similas laŭ koloraĵo al la oriolo, kaj kiuj konstruas pendantajn nestojn

introverti, [tr], (Angle, "introvert"), direkti ies libidon aŭ personecon internen; estigi iun introspektema [PIV listigas la particon, "introvertito:" tia homo]

Islamabado, (nacilingve, "Islamabad"), la ĉefurbo de Pakistano† (73°E, 34°N) [menciita en PIV sub "Pakistano" sed ne mem difinita]

Jafeto, (Angle kaj Latine, "Iapetus", el la Hebrea "Jafeth"), unu el la lunoj de Saturno (meza orbita radiuso 3 560 800 km) [difino aldaŭ al tiu en PIV]

Jaunde, (nacilingve, "Yaoundé"), la ĉefurbo de la Kamerunia Respubliko (11°38'E, 3°50'N) [PIV donas la ne-Esperantan literumon "Jaunde" sub "Kameruno"]

kaki, [int], (triviala slango, el Ĝermanaj lingvoj), feki; **kako**, fekaĵo

kalipso, (Angle, "calypso"), speco de muziko origininta en Trinidado, satiraj baladoj kun forte sinkopa ritmo

Kalisto, (nacilingve, "Callisto"), laŭ la Greka mitologia figuro Esperante nomata "Kalistoa"), la kvara el la ĉefaj lunoj de Jupitero (meza orbita radiuso 1 880 000 km)

Kampalo, (nacilingve, "Kampala"), la ĉefurbo de Ugando† (32°E, 0°) [menciita en PIV sub "Ugando" sed ne mem difinita]

kandlo, (nacilingve, "candela"), unuo de lumintenso, 1/60 de la lumintenso de unu kvadrata centimetro de nigra korpo je la temperaturo de solidiĝo de plateno

kardio, (Angla komuna nomo, "cockle"), genro (*Cardium*) de duklapaj moluskoj, kun granda piedo por surrampi la marfundon, vaste ŝatata kiel marmanĝaĵo

Karono, (nacilingve, "Charon", laŭ la Greka mitologia figuro "Ĥarōn"), la sola luno de Plutono, preskaŭ ĝemela planedo kun Plutono (meza orbita ra-

diuso 653 600 km) [difino aldona al tiu en PIV]

Kastrio, (nacilingve, "Castries"), la ĉefurbo de Sankta Lucia† (61°W, 14°N) [menciita en PIVS sub "Sankta Lucia" sed ne mem difinita]

keĉupo, (Angle, "catsup", "ketchup", el la Ĉina, "keĉjap"), speco de tomata saŭco, saporizita per cepo, salo, sukero, kaj spicaĵoj; ofte uzata sur viandoj

Kingstaŭno, (nacilingve, "Kingstown"), urbno, i.a. de la ĉefurbo de Sankta Vincento kaj Grenadinoj† (61°W, 13°N) [menciita en PIVS sub "Sankta Vincento kaj Grenadinoj" sed ne mem difinita]

Kigalo, (nacilingve, "Kigali"), la ĉefurbo de Ruando† (30°E, 2°S) [menciita en PIVS sub "Ruando" sed ne mem difinita]

klevo, [tr], (French, "clef", "clé"; Usono, "wrench"; Brito, "screwspanner"), simpla ilo kun du makzeloj kaj tenilo, uzata por streĉi aŭ malstreĉi bolton aŭ boltingon, turni aŭ teni tubon, k.s.; ankaŭ nomata "ŝraŭbŝlosilo"; **klevi**, [tr], streĉi, malstreĉi, turni, teni, k.s., per tia ilo

kniki, [int], (Angle, "buckle"; Germane, "knicken"), fleksiĝi, tordiĝi, aŭ fraksiĝi pro troa laŭlonga premforto, parolante pri fertrabo, tubo, betono, genuoj, k.s.

kolacii, [tr], (Angle, "collate"), meti (paĝojn, ekz-e de bindota libro) en ĝustan ordon, prepare al bindado

komjuno, (Angle, "commune"), speco de kolektiva komunumo, formita far kelkaj ĝis pli ol cent homoj, por sia komuna ekonomia kaj spirita bonfarto; loĝantaj sur unu terpeco, ofte en unu konstruaĵo, kun kompleta aŭ parta komuneco de laboro, mono, manĝaĵo, posedaĵoj, ĉefaj celoj kaj motivoj, seksrilatoj, religiaj kaj/aŭ politikaj konvinkoj, k.s.

Konektikuto, (Angle, "Connecticut", el Indiana nomo), (1) unu el la ŝtatoj de Usono; ĉefurbo, Hartford (73°W, 42°N); (2) rivero en nordorienta Usono, originanta inter Vermonto kaj Nov-Hampŝiro kaj finiĝanta en la

Markolo Long-Insula (72°W, 41°N)

Konjako, (France, "Cognac"), Franca urbo en la regiono kie oni faras konjakon (0°, 45°N)

konteo, (Angle, "county"; France, "comté"), la plej granda subdivizio de Usona ŝtato aŭ Kanada provinco [Esperanta formo ankaŭ vidata en "Franĉkonteo" en PIV; "konteo" distingiĝas de la Brita graflando (ankaŭ "county" en la Angla) per tio ke en Nord-Ameriko neniam estis grafoj, sekve ne povas esti graflandoj]

kontragitaro, (Hispane, "guitarrón", t.e., "gitarego", basa gitaro), muzikinstrumento similforma al gitaro sed pli granda, kun pli profunda sonkesto, kaj kun pli basa tonetendo; ofta en Meksikia populara muziko

kontratenoro, (Angle, "countertenor"), la plej alta rango de matura vira kantvoĉo, super la tenoro; **kontratenorulo**, tia kantisto

koroborio, (Aŭstrali-Angle, "corroborree", el aborigena nomo), danĉesto de Aŭstraliaj aborigenoj

kribaĝo, (Angle, "cribbage"), kartludo en kiu oni registras la poentaron per meti pinglojn en truitan tableton

krisopogono, (Aŭstralia komuna nomo, "beard grass"), Aŭstralia speco de herbo (*Chrysopogon*)

kulabao, (Aŭstrali-Angla komuna nomo, "coolabah", "coolibah"), Aŭstralia speco de eŭkalipto, ofta en la Aŭstralia landinterno (*Eucalyptus microtheca*)

kundalina, (Angle kaj Sanskrite, "kundalini"), karakterizanta forton kiu, laŭ Hindua psikologio kaj jogo, situas ĉe la bazo de la spino kaj estas intime asociita kun la seksa forto kaj ĝenerale kun la krea potenco; kiam ekscitiita (ekz-e dum meditado), ĝi moviĝas supren laŭ la spino ĝis la supraj ĉakroj*

Kuracao, (nacilingve, "Curaçao"), antaŭe, la Nederlandaj Antiloj; nun, la plej granda insulo de la Nederlandaj Antiloj; originejo de kuracao (69°W, 12°N)

kurio, (nacilingve, "curie", laŭ Marie

Curie), unuo de radioaktiveco, egala la la kvanto de iu ajn radioaktiva substanco en kiu la nombro da malkombiniĝoj en sekundo egalas $3,7 \times 10^{10}$)

kvadrafonia, (Angle, "quadraphonic"), karakterizanta sistemon de sonoreproduktado en kiu estas kvar apartaj kanaloj, tiamaniere ke aŭskultanto meze de ili aŭdas sonojn el ĉiu direkto, kvazaŭ sidante meze de la orkestro aŭ alia sonfonto

labruskano, (Angla komuna nomo, "catawba"), variaĵo de vinberujo (*Vitis labruscana*), vaste kultivata en orienta Nord-Ameriko por la vinberoj kaj vino

leno, (Angle, "lane"), unu el la paralelaj irejoj (koridoroj) de ŝoseo aŭ larĝa strato, laŭ kiu veturas unu vico de veturiloj

ligaturo, (Angle, "ligature"), (1) kunŝoviĝo de du literoj en unu karakteron (ekz-e, "æ", "œ", "B"); (2) kurba linio super aŭ sub du aŭ pli da skribitaj muzikaj notoj, por indiki ke la notoj estu ludataj aŭ kantataj glate, senrompe [difinoj aldonaj al tiu en PIV]; **ligaturi**, [tr], (Angle, "slur"), ludi aŭ kanti sinsekvajn muzikajn notojn glate kaj senrompe

Lilongvo, (nacilingve, "Lilongwe"), la ĉefurbo de Malavio† (34°E, 14°S) [menciita en PIVS sub "Malavio" sed ne mem difinita]

Limeriko, (Angle, "Limerick"), provinco (kaj ĝia ĉefurbo) en Irlando, el kiu eble originis la poezia formo "limeriko" (6°W, 53°N)

limetado, (Angle, "limeade"), trinkaĵo farita el limeta suko, akvo, kaj sukero, analoge al limonado

majno, (Angle, "myna"; Hindie, "majna"), iu el grupo de Aziaj birdoj (aparte *Eulabes religiosa*), parenca al la sturno, kapabla imiti homan parolon; konservata kiel kaĝbirdo

Makenzio, (nacilingve, "Mackenzie"), granda rivero en nord-okcidenta Kanado, originanta ĉe Lago Grand-Sklava, fluanta tra la Teritorioj Nord-Okcidentaj, kaj finiĝanta en la Maro Boforta (135°W, 69°)

makrameo, (Angle kaj France, "macramé"; el la Araba, "mikramah"), speco de malfajna punto el ŝnuro, kun nodoj kaj maŝoj en diversaj aranĝoj, ofte uzata por ornamado

Malabo, (nacilingve, "Malabo"), la ĉefurbo de Ekvatora Gvineo† (9°E, 4°N) [menciita en PIVS sub "Gvineo" sed ne mem difinita]

Maleo, (nacilingve, "Male"), la ĉefurbo de Maldivoj† (74°E, 4°N) [menciita en PIVS sub "Maldivoj" sed ne mem difinita]

mandalo, (Angle kaj Sanskrite, "mandala"), cirkla desegnaĵo kun samcentraj geometriaj formoj, bildoj, k.s., simbolanta en Hinduismo kaj Budhismo la universon aŭ tutecon

Maputo, (nacilingve, "Maputo"), la ĉefurbo de Mozambiko† (32°E, 26°S) [menciita en PIVS sub "Mozambiko" sed ne mem difinita]

marŝmalo, (Angle, "marshmallow"), speco de mola, spongeca bombono, kutime en malgrandaj blankaj buloj, farita el sukero, amelo, maizosiropo, kaj gelateno; ofte rostata super fajro ĉe pikniko k.s.

martino, (Angle, "martini"), alkohola trinkaĵo el ĝino aŭ vodko kun vermuto, ofte servata kun verda olivo en la glaso

Mbabano, (nacilingve, "Mbabane"), la ĉefurbo de Svazio† (31°E, 26°S) [menciita en PIVS sub "Svazio" sed ne mem difinita]

melopsitako, (Angla komuna nomo, "parakeet"), familio de Aŭstraliaj papagetoj inkludante la buĝerigo* (*Melopsittacus*)

Menonito, (Angle, "Mennonite"), laŭ la fondinto, Menno Simons), ano de Protestant Kristana sekto kontraŭanta ĵurojn kaj bapton de infanoj, favorantan simplajn vestojn kaj vivstilon

metadono, (Angle, "methadone"), sinteza narkotaĵo (C₂₁H₂₇ON), ofte uzata i.a. por kuraci heroinmanion

mikrofiĉo, (nacilingve, "microfiche"), mikrofilma karto enhavanta mikroskope malpligrandigitajn kopiojn de

pluraj normgrandaj dokumentoj aŭ paĝoj, kiujn oni legas per aparato kiu projekcias repligrandigitan imagon sur ekranon

Mogadiŝo, (nacilingve, “Mogadishu”), ĉefurbo de Somalio (45°E, 2°N) [menciita en PIV sub “Somalio”, sed ne mem difinita]

monofonia, (Angle, “monophonic”), karakterizanta sistemon de sonproduktado en kiu estas nur unu sonfonto aŭ kanalo (kontraste al “stereofonia” kaj “kvadrafonia”)

Monrovia, (nacilingve, “Monrovia”), la ĉefurbo de Liberio (11°W, 6°N)

mordako, (Angla komuna nomo, “American smelt”), Amerika genro de osmero (*Osmerus mordax*), nun vivanta nur en nesalakvo

Moronio, (nacilingve, “Moroni”), la ĉefurbo de Komoroj† (44°E, 12°S) [menciita en PIVS sub “Komoroj” sed ne mem difinita]

moŝavo, (Angle, “mohav”, el la Hebreo, “moŝav”), speco de Israela vilaĝo, kun agroj kooperative kultivataj sed kun individuaj loĝejoj (kontraste al “kibuco”)

Nancio, (France, “Nancy”), urbo en Loreno, Francio (6°E, 49°N) [menciita en PIV sub “Loreno”, sed ne mem difinita]

Naŭatlo, (nacilingve, “Náhuatl”), ano de unu el granda familio de gentoj indiĝenaj al Meksikio kaj Centra Ameriko, inkluzive la Aztekoj; **Naŭatla**, karakterizanta la lingvon de la Aztekoj kaj parencaj gentoj, trovatan en pluraj dialektoj

nikada, (Angle, “nicad”; mallongigo en ambaŭ lingvoj de la du metaloj), karakterizanta baterion kies elektra tensio ŝuldiĝas al kemia interago inter nikelo kaj kadmio

Nukualofo, (nacilingve, “Nuku'alofa”), la ĉefurbo de Tongo† (175°W, 21°S) [menciita en PIVS sub “Tongo” sed ne mem difinita]

Oberono, (nacilingve, “Oberon”), unu el la ĉefaj lunoj de Urano (meza orbita radiuso 586 600 km)

obskuranto, (Angle, “obscurantist”),

ano de obskurantismo [“obskurantismo” troviĝas en PIV, sed ne “obskuranto”]

oocito, (Angle, “oocyte”), la unua, nematura stadio de ovo (la femala analogo de “spermatocito”)

pandemio, (Angle, “pandemic”), epidemio okazanta ĉie

Paramaribo, (nacilingve, “Paramaribo”), la ĉefurbo de Surinamo† (55°W, 6°N) [menciita en PIVS sub “Surinamo” sed ne mem difinita]

paramecio, (Angle, “paramecium”), genro (*Paramecium*) de unuĉelaj, pantofloformaj protozooj, moviĝantaj per cilioj

paramelo, (Aŭstralia komuna nomo, “bandicoot”), iu el diversaj Aŭstraliaj marsupiuloj, iom similaj al la bandikoto*

parastacedo, (Aŭstrali-Angla komuna nomo, “crayfish”), Aŭstralia familio de krustuloj similaj al la astako (*Parastacidae*)

paskalo, (nacilingve, “pascal”, laŭ Blaise Pascal), unuo de premo, egala al la premo de unu nutono de forto sur unu kvadrata metro; 100 000 paskaloj egalas unu baron; simbolo: Pa

pejotlo, (Angle kaj Hispane, “peyote”, el la Naŭatla* “peyotl”), malgranda kaktaco (*Lophophora williamsii*) de norda Meksikio kaj sudokcidenta Usono, sur kiu kreskas “butonoj” entenantaj meskalinon [menciita en PIV sub “meskalino”, sed ne mem difinita]

periaŝtro, (Angle, “periaster”, el Grekaj elementoj por “ĉirkaŭ” + “astro”), punkto en orbito plej proksima al la ĉirkaŭorbitata astro [ĝeneralaĵo de la terminoj “perihelio” kaj “perigeo”; cp “apastro”]

Perto, (Angle, “Perth”), (1) urbo en Skotlando (3°W, 56°N); (2) la ĉefurbo de Okcident-Aŭstralio (116°E, 32°S)

Pesaĥo, (Hebreo, “pesaĥ”; Angle, “Passover”), la Hebrea Pasko; vorto uzata por eviti konfuzon kun la Kristana Pasko

pibroĥo, (Angle, “pibroch”, el la Skotgaela, “piobaireachd”), Skota muzikpeco por la sakŝalmo, ĝenerale en

ritmo de funebra marŝo

popa, (Angle, "pop"), populara, laŭmoda (pri muziko, arto, k.s.); celata al laikoj aŭ la ĝenerala publiko (pri scienca verko k.s.)

Port-Luizo, (nacilingve, "Port Louis"), la ĉefurbo de Maŭricio† (58°E, 20°S) [menciita en PIVS sub "Maŭricio" sed ne mem difinita]

Potomako, (Angle, "Potomac", el Indiana nomo), granda rivero en mezorienta Usono, inter Marilando, Okcident-Virginio, kaj Virginio, fluanta preter Vaŝingtono kaj finiĝanta en la Golfo Ĉesapika* (76°W, 38°N)

psikometrio, (Angle, "psychometry"), la supozata psika kapablo percepti informon pri homo aŭ objekto, aŭ pri homo asociita kun objekto, per tuŝi la homon aŭ objekton

rado, (nacilingve, "rad"; difino aldona al tiuj en PIV), unuo de dozo de ensorbita radiado, egala al la ensorbo de 100 ergoj da energio en unu gramo da materio

rago, (Angle kaj Sanskrite, "raga"), tradicia Hinda muzikformo, kun karakterizaj intervaloj, ritmoj, ktp., uzata kiel matrico aŭ fontomaterialo por improvizado

Reo, (nacilingve, "Rhea", laŭ la Greka mitologia figuro Esperante nomata "Rea"), unu el la ĉefaj lunoj de Saturno (meza orbita radiuso 527 070 km)

rekteno, (Angle, "rectenna", el "rectifying antenna array", t.e., "rektiga antenaro"), aranĝo de tre multaj antenoj kovrantaj plurajn kvadratajn kilometrojn de la tersurfaco aŭ marsurfaco, uzata (ankoraŭ "-ota") por ricevi kaj retransformi mikroondajn transmisiojn de elektrogenerata (-ota) per sunenergiaj potencosatelitaj

ribosomo, (Angle, "ribosome"), malgrandega, sferforma korpusklo, konsistanta en ribonuklea acido (RNA) kaj proteinoj kaj multnombro trovata en la citoplasmo de ĉeloj

Riĉmondo, (Angle, "Richmond"), ĉefurbo de Virginio (77°W, 38°N) [menciita en PIV sub "Virginio", sed

ne mem difinita]

rilo, (Angle kaj France, "reel"), (1) vigla folkloro paŝdanco origininta en Keltaj landoj, ankaŭ ofta en Usono, Kanado, ktp.; (2) la akompananta muziko, en rapida duopa takto kaj la formo AABB

rumio, (Angle, "rummy"), speco de kartludo, ludata laŭ multaj varioj; la celo estas kunmeti kartojn laŭ difinitaj aroj

sanktapaŭlio, (Angla komuna nomo, "African violet"), genro (*Saintpaulia*) de Afrikdevenaj plantoj, kun violaj, blankaj, aŭ ruĝetaj floroj kaj malhelverdaj, vilaj folioj; ofta endoma ornamplanto

Saskaĉevano, (Angle, "Saskatchewan"), preria provinco en centra Kanado; ĉefurbo, Regina (105°W, 50°N)

Seatlo, (Angle, "Seattle"), urbo en Vaŝingtonio, la plej granda urbo kaj ĉefa haveno de nord-okcidenta Usono (122°W, 47°N)

seranio, (Angla komuna nomo, "bass"), genro (*Serranus*) de Pacifikaj salakvaj fiŝoj; **seraniedoj**, familio (*Serranidae*), el kiu la seranio estas la tipo

setaro, (Angle kaj Hindie, "sitar"), Hinda kord-instrumento, iom simila al granda liuto, kun kutime ses plukataj kordoj kaj pluraj kunresonantaj zumkordoj

sialio, (Angla komuna nomo, "bluebird"), genro (*Sialia*) de oftaj Nord-Amerikaj kantbirdoj; la virbirdo kutime havas bluan dorson

Sidarto Gotamo, (nacilingve, "Siddhartha Gautama"), denaska nomo de la Budho [menciita en PIVS sub "Kapilavasto" sed ne mem difinita]

sklerenkimo, (Angle, "sclerenchyma"), planta histo el malmolaj, dikseptaj, mortintaj ĉeloj, kiel ekz-e trunkligno, nuksoŝelo, k.s. [cp "parenkimo" en PIV]

skono, (Angle, "scone"), Britdevena sensukera kekso, ofte manĝata en Britio kaj Britidaj landoj kun butero ĉe te-manĝo

skvaŝo, (Angle, "squash"), iu el du ludoj, iom similaj al teniso sed ludataj en

kvar-mura endoma tereno
sociopato, (Angle, "sociopath"), psiko-pato kies konduto estas agreseme kontraŭsocia
spireo, (Angla komuna nomo, "spirea"), genro (*Spiraea*) de plantoj el rozacoj, kun densaj amasoj de malgrandaj ruĝetaj aŭ blankaj floroj [menciita en PIV ĉe "ulmario", kiu estas unu el ĝiaj specioj, sed ne mem difinita]
Srilanko, (nacilingve, "Sri Lanka"), lando sur la insulo Cejlon; ĉefurbo, Kolombo (80°E, 7°N)
staĥanovisto, (Angle, "Stakhanovite"), ano de staĥanovismo
Sufio, (Angle kaj Perse, "Sufi"), ano de Persdevena Islama mistikismo (Sufismo)
sukotaŝo, (Angle, "succotash", el Indiana origino), limaj fazeoloj kaj maizkernoj kune bolkuiritaj
suso, (Latine, "sus"), genro (*Sus*) de mamuloj el la subordo de parhufuloj, al kiu apartenas la porko kaj apro
Suskevhano, (Angle, "Susquehanna", el Indiana nomo), granda rivero en orienta Usono, fluanta tra Nov-Jorkio, Pensilvanio, kaj Marilando; ĝia enmariĝo formas la Golfon Ĉesapikan* (76°W, 39°30N)
Suvo, (nacilingve, "Suva"), la ĉefurbo de Fiĝioj† (178°E, 18°S) [menciita en PIVS sub "Fiĝioj" sed ne mem difinita]
ŝablizo, (Angle kaj France, "chablis"), speco de seka, blanka, burĝona vino, origininta en samnoma Franca regiono (proksimume 4°E, 48°N)
ŝenandoo, (Angle, "Shenandoah", el Indiana nomo), rivero kaj larĝa intermonta valo en Virginio, finiĝanta en la Rivero Potomako* (77°45W, 39°20N)
ŝofaro, (Angle, "shofar", el la Hebrea, "šofar"), virkapra korno kiun la Judoj rite uzas kiel trumpeton
ŝotiŝo, (Angle, "schottische"; Svede, "schottis"; Hispana, "chotis"), popol-danco por geparoj en duopa takto, iom simila al la polko sed iom pli malrapida; ofta en Skandinavio, Irlando,

Nord-Ameriko, Meksikio, kaj aliloke
ŝusi, [int], Germane kaj Angle, "schuss", t.e., "pafo"), en skiado, rapide kuri rekte malsupren deklivon; ŝuso, tia kuro
Tagalogo, (nacilingve, "Tagalog"), ano de Malaja gento en la Filipinoj; la Tagaloga lingvo estas la ĉefa indiĝena lingvo de la Filipinoj
tempro, (Angle, "distemper"), kontaĝa, febra, virusa malsano ĉe bestoj, aparte ĉe hundoj [PIV krucreferencas de "detempro" al "tempro", sed "tempro" mem mankas]
Tetiso, (nacilingve, "Tethys"), unu el la ĉefaj lunoj de Saturno (meza orbita radiuso 294 670 km)
tezaŭro, (Angle, "thesaurus"), speco de vortaro kiu konsistas en listoj da sinonimoj kaj antonimoj
tifao, (Usona komuna nomo, "cattail"; Brita komuna nomo, "reed mace"), genro (*Typha*) de altaj marĉaj plantoj, kun longaj, brunaj, vilaj spikoj, kiuj similas katvostojn; la fragmitecajn foliojn oni uzas por fari korbojn, mat-aĵojn, k.s.
Timbuo, (nacilingve, "Thimphu"), la ĉefurbo de Butano† (90°E, 27°N) [menciita en PIVS sub "Butano" sed ne mem difinita]
tipio, (Angle, "teepee", el la Siua), konusforma Indiana tendo, tegita de feloj
Tirano, (Angle, "Tirana"; Albane, "Tiranë"), ĉefurbo de Albanio (20°E, 41°N) [menciita en PIV sub "Albano", sed ne mem difinita]
Titano, (nacilingve, "Titan"), la plej granda luno de Saturno kaj unu el la malmultaj lunoj kun atmosfero (meza orbita radiuso 1 221 860 km) [difino aldona al tiu en PIV]
tofeo, (Angle, "taffy" aŭ "toffee"), karameleca, glueca dolĉaĵo farita el sukero aŭ melaso, tiritita en longajn ŝnurojn kaj dishakita en oportunajn pecojn
tonka, (Angle, "tonka"), karakterizanta specon de fabo (*Dipteryx odorata*, *D. oppositifolia*), fonto de kumarino [menciita en PIV sub "kumarino", sed ne mem difinita]

Tritono, (nacilingve, "Triton"), la pli granda kaj pli proksima el la du ĉefaj lunoj de Neptuno (meza orbita radiuso 653 600) [difino aldona al tiu en PIV]

trojko, (Angle, "troika", el la Rusa, "trojka"), (1) veturilo tirata de tri ĉevaloj; (2) (analoge), alispeca triopo, ekz-e de regantoj

uako, (Angle, "wok", el la Ĉina), Ĉindevena pato kun konkava fundo, uzata por fritado, vaporkuirado, k.s.

Ulan-Bator, (nacilingve, "Ulan Bator"), ĉefurbo de Mongolio (107°E, 47°N) [menciita en PIV sub "Mongolo", sed ne mem difinita]

Umbrielo, (nacilingve, "Umbriel"), unu el la ĉefaj lunoj de Urano (meza orbita radiuso 267 300 km)

uvulario, (Angla komuna nomo, "bellwort"), genro (*Uvularia*) de arbaraj staŭdoj, de la familio de liliacoj, ofta en Nord-Ameriko

Vajt-Insulo, (Angle, "Isle of Wight"), Brita insulo en Maniko, apud la suda Angla marbordo (1°W, 51°N)

vano, (Angle, "van"), aŭtomobilo plimalpli skatolforma por maksimumigi la internan spacon rilate al la eksteraj dimensioj

Vilao, (nacilingve, "Vila"), la ĉefurbo de Vanatuo† (168°E, 18°S) [menciita en PIVS sub "Vanatuo" sed ne mem difinita]

Vindhuko, (nacilingve, "Windhoek"), la ĉefurbo de Namibio† (17°E, 22°S) [menciita en PIVS sub "Namibio" sed ne mem difinita]

Vinipego, (nacilingve, "Winnipeg"), (1) la ĉefurbo de Manitobo (97°W, 50°N); (2), granda lago en centra Manitobo (98°W, 53°N)

Vjentiano, (nacilingve, "Vientiane"), la ĉefurbo de Laoso (103°E, 18°N)

About

Peter Benson

Pete Benson first learned Esperanto in the 1960s. Quickly feeling the lack of adequate dictionaries, he began compiling a glossary for personal use to supplement the small, old dictionaries that were available. It wasn't long before his personal glossary became the nucleus of the dictionary you now hold. The manuscript grew over a period of many years.

As with most Esperantists, Pete has always held strong feelings about the importance of improving the quality of human life in general and, in particular, the role of international communication in that effort. Because of the crucial importance of establishing large-scale human civilization in space to the improvement of life back on Earth, and because the U.S. and Russia have been among the leaders in space development, in recent years Pete has combined his technical training and linguistic talents by becoming a Russian-English technical translator, hoping to make a small contribution to cooperative efforts in space. He has recently begun work on a new Russian-English technical dictionary.

What the experts say about the Comprehensive English- Esperanto Dictionary...

"Esperanto has an important role to play in broadening the international horizons of English-speakers, and this dictionary can make a substantial contribution in that direction. It will be a great help for those learning Esperanto, as well as for more experienced speakers who want to express themselves more effectively in the language."

—Grant Goodall, Associate Professor of
Linguistics University of Texas at El Paso

"For those of us who want to make American literature available to the rest of the world through Esperanto, a good English-Esperanto dictionary is an absolute must. At last we have one that's up to the job."

—Donald J. Harlow, President, Esperanto
League for North America

"Speakers of the international language Esperanto in the U.S.A. and in other English-speaking lands have long awaited an English-Esperanto dictionary which is not only up-to-date, but which even more importantly contains English idioms and idiomatic usage. Peter Benson deserves high praise for his excellent and thorough-going dictionary; and ELNA deserves praise for publishing it."

—Wm. R. Harmon, Chief Delegate for
U.S.A., World Esperanto Association

"A bilingual person is one who knows two languages, but even experts face the problem of trying to express in one language something that they can better express in the other. Whether the topic is computer programming, medical procedures, bird calls, or tax evasion, for the bilingual person, one of the most important books in the house is the bilingual dictionary. The more comprehensive it is, the more it helps."

—David K. Jordan, Professor of
Ethnography, University of California at
San Diego

"The *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* fills a great gap and does it well. Users of the international language will make Benson a household word."

—E. James Lieberman, M.D., Director,
Esperantic Studies Foundation

ISBN 0-939785-03-X



9 780939 785032

51995 >

